


INTERNACIA
MONDA
LITERATURO

TAKEO
ARISIMA:
DEKLARACIO

FERDINAND
HIRT & SOHN
LEIPZIG
ESPERANTO-FAKTO



E. Pomder

*Internacia
Mondliteraturo
Volumoj 11-12*

INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj
el ĉiuj naciaj literaturoj



FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1924
ESPERANTO-FAKO

T. ARIŜIMA

DEKLARACIO

El la japana originalo
tradukis kun permeso de la aŭtoro

T. Tooguu

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1924
ESPERANTO-FAKO



82-3

821.521-6 = 922

ČIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

ANTAŬPAROLO

La aŭtoro, sinjoro Takeo Ariŝima, naskiĝis la 4an de Majo 1878 en Tokio kiel unua filo de iu oficisto de financa ministrejo. 1882 lia patro fariĝis estro de l' lim-impostejo en Jokohama kaj transloĝiĝis tien kun sia familio. Tie la aŭtoro estis edukita en la domo de nord-amerika sinjoro kaj vizitis „Anglo-japanan lernejon“. Tiam li unue vidis kristanisman vivon kaj vizitis dimanĉan lernejon. 1887 li forlasis la anglo-japanan lernejon kaj eniris en la preparan klason de pornoblula gimnazio en Tokio. 1896, fininte la mezan klason de la pornoblula gimnazio, li eniris en la agrikulturan kolegion en Hokkaido kaj loĝante ĉe sinjoro D-ro Nitobé li vizitis la kolegion.

Li alproksimiĝis al kristanismo kaj fariĝis 1900 ano de „Sendependa Eklezio“. 1901 li rekonstruis kun kelkaj junuloj la eklezion, tute sendependiginte ĝin de dogmoj.

1903 li transveturis al Usono kaj tie studis la ekonomian sciencon. De tiam li eksentis maltrankvilecon en religia vivo kaj fariĝis skeptikulo. Li eklegis verkojn de Emerson, Whitman, Brandes, Turgenjeff, Ibsen, Tolstoj, Kropotkin ktp., kaj nun estis ĵetita antaŭ la praktika problemo, ĉu fariĝi agrikulturisto, aŭ pedagogo, aŭ literaturisto.

Forlasinte Usonon 1904, li vojaĝis tra Italujo, Svisujo, Germanujo, Holando, Belgujo, Francujo kaj Anglujo, kaj reveninte al la patrujo li fariĝis profesoro de angla literaturo je Sapporo Agrikultura Fakultato.

En Julio 1917 li publikigis du noveletojn: „Posteuloj de Kaino“ en la „Literatura gazeto“, „Nova Novelo“ kaj „Letero de iu ordinara homo“ en „Nova Tajdo“. Ili altiris atenton de l' legantaro, kaj li fariĝis tuj favorito en la japana literatura mondo, kio ja malofte okazas. Poste li publikigis kelkajn novelojn kaj dramojn kaj lia famo iom post iom pligrandiĝis. Li nun havas la plej multajn legantojn inter kleraj gejunuloj.

Je nia miro, li senpage disdonis 1922 la kampobienon, kiun li heredis de sia patro, al la farmantoj. Ĝia amplekso estis ĉirkaŭ 40 000 arojn.

„Deklaracio“ estas novelo verkita de li en la formo de leteroj interŝanĝitaj inter du junuloj: studento kaj juna licenciato de scienca fakultato. La kaŭzo, kial mi preferis ĉi tiun verkon por esperantigi ĝin, estas, ke mi kredis, ke ĝi bone montros, kiel japanaj junuloj pensas, suferas ktp.

La tradukinto.

NOTO

Mi atentigas la legantaron de la „Internacia Mondliteraturo“, ke la apero de la verko de la japana aŭtoro T. Ariŝima en esperantlingva traduko estas atentinda okazantaĵo. Laŭ mia scio, ĉi tiu libro estas la unua — pli ampleksa — Esperanto-tradukaĵo el la japana literaturo, kiu aperas en eldonejo de la eŭropa kontinento.

Ĝi bone montras, ke nia lingvo ankaŭ taŭgas por la celoj de la orient-aziaj popoloj.

Por ne difekti ĝin, mi lasis la ĉarman originalecon de la stilo de nia samideano Tooguu tute netuŝita, ankaŭ tiam, kiam mi estus preferinta aliajn frazmanierojn, kaj dum la trastudado de lia manuskripto mi korektis nur tre malmultajn evidentajn skriberojn ktp.

D-ro Dietterle.

DEKLARACIO

(De A. al B.)

Tokio, la 15an de Septembro 1912.

Kara B.!

Laŭ via lasta letero mi nur atendis, ke vi povos reveni; sed vane.

La antaŭlegado komenciĝis hieraŭ, sed ĝi estas ne-interesa laŭkutime. Je la komenco de l' nova studjaro mi ĉiam havas ian novan atendon, sed mi ĝin trovas ĉiam precize perfidita. Antaŭlegado de sinjoro prof. A. sufiĉas, por min tute enuigi post 30minuta aŭskultado. Je nia miro sinjoro C. jam ĉeestas ĉi tiun jaron kaj kiel kutime li ĉiujn ĉirkaŭrigardas kun ironiaj okuloj de sur la altkreska korpo.

Kia do estas via farto? En Tokio estas ankoraŭ iom varmege, sed havante daŭre belan veteron kaj iom pli sekan aeron, ni kelkajn fojojn trovas la vesperon tre bela. Ĉu vi ne kuraĝas reveni ĉi tien? Mi nepre prezentos al vi D-ron B., kiu laŭ onidiro havas konfidindan sperton je la malsano de l' spiradorgano kaj efektive bonan famon; ankaŭ mia onklo estas kuracita iam de li. Havante de la infaneco nenian rilaton al la malsano, mi ne povas plene imagi vian sentadon; sed ŝajnas al mi, ke vi pensas iom hipoĥondre pri via malsano. Antaŭ ĉio mi nun opinias, ke estas malbone por vi, pensi pri

tro diversaj aferoj. Ĉu la loko Ŝiobara¹ estas bona por via malsano? Onidire la ŝanĝo de la klimato estas granda en via loko kaj mi opinias, ke tie malvarmiĝos pli frue ol en Tokio.

Ankaŭ por mi mem mi deziras, ke vi nun restu en Tokio; ĉar mi sentas, ke mi ankaŭ ekkomprenis la religion. Entute la familio de miaj gepatroj tute ne atentis religian vivon, kaj tio ne devenis de memkonscio. Eble mia patro pensis iom pri tio, sed al la aliaj familianoj tio okazis nur pro malvigla, senmemkonscia vivado. Implikite en tiun atmosferon, mi ankaŭ havis ĝis nun ne niun rilaton al religia vivo. Akceptinte supraĵan antaŭopinion, kiu devenis de iu scienca antaŭjuĝo, tiel, kia ĝi estas, mi pensis, ke por mi estas nenecese rigardi la religion rekte; kaj efektive mi estis tiam tiel senpripensema, ke ĝi estis nenecesa por mi. Sed ŝajnas al mi, ke ankaŭ mia vivo ekstravisis strangan turnotempon. La mondo ekŝajnis al mi tiel vivoplena, al la celo progresanta kaj organika, ke mi ĝin nur sub abstrakta, dubsenca vorto kiel „sorto“ ne povas kompreni. Dum tia penso ekkreskis en mi, mi unue ekinteresiĝis je la kristanismo, kiun vi konfesas. Mi denove rigardis mian ĉirkaŭon kaj vidis kun miro, ke mistera mondo, de mi ĝis nun tute neatentita, antaŭ mi disvolviĝas. Eksciiginte, ke homa vivo povas tiel ŝanĝiĝi laŭ la maniero de rigardo, mi nur miregas pri ĝia riĉa amplekso. De antaŭ nelonge mi regule legadis la leteron „al la Romanoj“ ĉiuvespere antaŭ enlitiĝo kaj, sentinte en mia koro ĉiun tiaman sekreton, mi timis antaŭ la profunda kaj akra sagaceco de Kristo. Mi pensas, ke povis observi tiel akre kiel ambaŭklinga glavo nur Paŭlo reviv-

¹, ², ³ ktp.: vidu la notojn en la fino de la libro.

igita de Kristo. Jen min kaptas timo, ke, se mi antaŭenpaŝos unu paŝon, tiom da peko disvastiĝos ĉirkaŭ mi, kaj se mi malantaŭenpaŝos du paŝojn, tiom da pento estos tie postlasata.

Ĝis nun mi min rigardis viro energia, pli vigla kaj iom kuraĝa; sed mi min sentas soleca, kiam mi pensas, ke, se mi akceptus religian vivon, mia ĝisnuna memkonscio tute senpure malaperus; mi min sentas tro soleca.

En tia okazo mi nenion povas krom deziri, ke vi estu ĉe mi.

Nun mi transiru al tute alia temo kaj vin demandas, kiel vi opinias pri la amo? Feliĉe — mi volas tiel diri, sed povas esti malfeliĉe — mi ankoraŭ ĝis nun havis neniun okazon havi aman aferon kun iu ajn virino kaj enprofundiĝi en ĝin. Se fremdaj amrakontoj, kiujn miaj samklasanoj ofte babilis ĉirkaŭ la forno k. c., min atingis, mi ĉiam forlasis la lokon tirite de iu pura forto en la koro, dum mi sentis iun hontindan allogon kaj scivolemon. En tia okazo mi ĉiam rememoris viajn akrajn, helajn okulojn rigardantajn de post la ferkadraj okulvitroj. Do vi min demandas, ĉu la amo malhelpas studadon; ĉu pura, malegoista kaj solece-brila kortuŝo, kiun, al mi ŝajnas, nur homoj enamiĝintaj travivas, ne estas ambrozio, kiun la junuloj devas almenaŭ unu fojon gustumi? En la vortoj de Paŭlo kaj Tolstoj parolitaj pri la rilato inter viro kaj virino kuŝas kompreneble forta kaŭzo nerifuzebla. Mi ankaŭ ĝin jesas; sed, ĉu ĝi estas la plej profunda fundo de la vivo?

Skribinte longan sensencaĵon mi timas, ke mi vin ĝenas. Sed mi tre ĝojos, se vi skribos al mi pri via opinio, kiam vi vin sentos pli bonfarta.

Hieraŭ estis antaŭdecidite iri post la antaŭlegado al Haneda² por kolekti materialon; sed ne interese mi tion rifuzis kaj iris sola promeni ĝis la ĉirkaŭo de bo-

tanika ĝardeno en Koiŝikaŭa³. Lastatempe mi mem min sentas iom neordinara. Al mi la muskoloj kvazaŭ malstreĉiĝis, kaj kiam mi rekonsciĝis, mi pripensadis pri absurdaj aferoj. Tio povas esti kaŭzita ankaŭ de tio, ke vi ne estas ĉi tie en Tokio.

La monon petitan mi al vi sendos. Vi devos elspezi pli multe ol en la universitato. Mi vin ne kontraŭopiniis pri memkuirado, sed vin gardu antaŭ malpermesitaj aferoj. Monon vi povas elspezi senzorge, ĉar mi havas iom pli multe ol bezone.

Ĉi tiun nokton mi ial sentas deziron, plie skribadi al vi; tamen, ĉar la nokto estas jam malfrua kaj mi timas malbone influĵi sur vian malsanon, mi ĉi tie ĉesas.

Estas ja nokto, en kiu mi eksentas amon al ĉiuj ajn. Do (*de tie ĉi la letero estas forstrekita*).

Via A.

(De B. al A.)

Ŝiobara, la 20an de Septembro 1912.

Kara A.!

Promeninte, sur la revena vojo mi kaptis unu maloftan tineon ankaŭ hodiaŭ. Ĝi povas esti nova speco. Ŝiobara estas iom pli bona loko por kolektado de materialo.

Vi eksciis amon? Lastatempe miaj nervoj iom pli akriĝis.

Kiu povas esti favorito de amo krom vi? Vi havas sanan korpon, sinceran karakteron, allogan vizaĝon kaj puran naivecon. Antaŭ vi estas entreprenoj kaj malantaŭ vi riĉeco.

Tio ne estas sarkasmo, sed nur sinsekva aranĝo de faktoj tiel simplaj, ke ili povus ŝajni sarkasmaj.

Amo estas forteodora esenco, kiu povas fermenti nur en la provizejo plena je nutraĵoj.

La kompatinda malsanulo kiel mi eĉ ne flaras ĉi tiun esencon sen pulsobatego. Ne pro envio . . . ne, pro envio, pro klara envio.

Sed estas en la mondo homoj, kiuj meritas amon, kaj ankaŭ homoj, kiuj ne meritas amon.

Mi vin kuraĝigas, nepre efektiviĝi vian amon. Mi eĉ povas diri, ke estas eraro de Dio, ke vi ne havas aman historion.

Tolstoj estas, oni povas diri, optimisto, kiu ebriiĝinte de bona vino deliradas. Kia simpla aminda koro!

Vi, kiu predikas pri Tolstoj kaj Paŭlo samtempe, erare metis infanon apud la diablon.

Kristo estis dufoje krucumita, unue de judoj kaj duafoje de Paŭlo.

Per la unua sufero li ĉieleniris, sed per la dua li estis teren forĵetita.

Mi antaŭ ĉio malamas la konfuzajn vortojn de Paŭlo. Ĉu li predikas la homon per la homo? Do vin gardu antaŭ falsa profeto predikanta la homon per la homo.

Nun, mia malsano estas jam diagnozita kiel efektive kompleta ftizo. D-ro B. estis tre interesa kuracisto. Li ĉion malkovris al mi, dirante, ke estas nenecese kaŝi antaŭ mi. Kiam li deklaris al mi pri tio, mi, kion vi komprenos, tiumomente tiel suferis, ke mi eĉ ne povis moviĝeti, kvazaŭ ĉiuj nervoj en mia korpo frostiĝis kaj kaŭzis la rigidecon de la membroj. Sed mia koro jam reakiris kutiman trankvilecon; tamen estos neeble, reveni al la universitato en la proksima estonteco. Mi ofte sopiras je l' atmosfero de la laboratorio; sed mi nenion povas krom rezigni.

Dankon por la mono. Mi nun loĝas en la domo apudrivera, kiun vi konas; sed konfuzate de vojirantoj mi intencas iam post nelonge lui ĉambron ĉe iu kamparano.

Nun mi ekhavis febron ree; pardonu, ke la letero fragmentiĝas, mi bone scias, ke tio estas malagrable por vi.

Mi rememoras, ke mi forgesis, skribi al mi pri mia opinio pri la religio; sed ĝi ne estas inda je skribado.

Ĉar mi apartenas al tiuj, kiuj ne povas vivi ne ebrigiĝante, mi nur volas ebrigiĝi de Kristo. Se mi estus vivinta antaŭ Baudelaire, mi certe ne estus lin antaŭe skribiginta la poezian poemon „Ebrigiĝu“!

Via B.

(De A. al B.) (poŝtkarto).

Tokio, la 22an de Septembro 1912.

Kara B.!

Promeninte en la botanika ĝardeno mi ĵus revenis kaj trovis vian leteron min atendintan. Eksciinte, ke via malsano estas ftizo, ankaŭ mia sango kvazaŭ frostiĝas. Mi elkore vin kompatas.

Vi lerte min divenis. Mi intencas, iam konfesi al vi detale kaj peti vian helpon; bonvolu ĝin legi, kiam vi vin sentos bonfarta. En Ŝiobara oni jam sentos malvarmon? Mi deziras, ke vi kiel eble plej singardeme zorgu pri via malsano.

Via A.

(De A. al B.)

Tokio, la 6an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Kiel vi kun dolorego bataladas kontraŭ la malsano, kiu senkompatate forrabas de vi ĉiujn esperojn, vin ekstreme minacas kaj maltrankviligas, tio estos eble la sekreto, kiun nur vi sola povas kompreni. Al mi ŝajnas, ke en via suferado kuŝas io tre sankta kaj estus tro malhumile por la homo kiel mi, kiu travivis neniun malsanon, eĉ

nur ĝin ekrigardi. Povas esti malprave, ke mi konsolas la malsanulon. Sed mi ne povas krom vin kompati laŭ mia maniero kaj deziri al vi la plej baldaŭan resaniĝon.

Per via lasta letero mi ne povis detale sciigi pri via farto; ĉu vi nun iom pli bone fartas? Se via humoro al vi permesos, bonvolu sciigi min pli detale pri via febro kaj apetito. Ĉu vi min demandos, por kio tio utilos? Mi senkaŭze deziras tion ekscii.

Ho, kiom ofte mi ŝanceliĝis, ĝis mi decidis skribi al vi la sekvantan konfeson. Mi timis, ke ĝi povas influi malbone sur vian malsanon; sed mi pli multe dubis, ĉu mi povos skribi ĝis la fino nenion kaŝante.

Sed, mi hodiaŭ decidis skribi. Ĝi rilatas al la ama problemo, kiel vi jam divenis. Sed mi refoje vin petas, ke vi legu, kiam via humoro tion permesos.

Al mi ŝajnas necese, ke mi ion skribu pri mia seksa vivo, antaŭ ol komenci la konfeson.

Se mi rigardas mian estintecon, mi povas rememori, ke mia koro estis jam, kiam mi estis infano, supermezure alligita al la ino. Malgraŭ ke tio estas komuna por ĉiuj viroj, nur malmultaj homoj parolas pri tio malkaŝe; se ne, mi estas tute malsama ol la aliaj kaj havas tute malsimilan travivaĵon. Mi memoras, ke mi havis iun, ĉe la viro ne senteban, amikecon al la juna edzino de mia najbaro. Tiam mi estis tia knabo, kian oni karesas dirante: „Aminda knabo!“ Kaj al mi ŝajnis, ke ŝi speciale min amis. Kiel mi ĝojis pri tio! De memfido kaj kontento — kia diferenco inter mi tiam kaj mi nun, tremanta ĉiam antaŭ maltrankvileco, — kaj kia dezirinda miraklo! — mi kondukis tiel fiere, ke mi eĉ malestimis miajn kunludantojn antaŭ ŝi.

Iam, pro la ŝanĝo de la ofico de sia edzo, ŝi subite malaperis ien de antaŭ miaj okuloj. Mia mondrigardo,

laŭ kiu mi difinis la tutan mondon tiam, kian mi ĝin aŭdas per la oreloj kaj vidas per la okuloj, tute ŝanĝiĝis, kaj de tiam en mia koro ekkomenciĝis neatendita tute alia mondo, malplena mondo. Mi rememoras, ke ia sopiro je nekomprenblaĵo ankaŭ komenciĝis de tiam. La mirindan mondon, de kiu ŝi estis malaperinta, mi tiam neniel povis klare imagi en la kapo. Mi nur sentis min tre soleca. Okazis, ke kelkajn vesperojn, atakite de stranga nostalgio, mi aŭ ekploris senkaŭze, aŭ ĝenis sencele servistinojn kaj la patrinon, tiel ke mia patro, kiu tre malofte ekkoleris, min severe riproĉis. Oni diris, ke mi suferas je neŭrastenio. Kiaj sarkasmaj vortoj! Efektive, mi tre naive malsaniĝis je neŭrastenio.

Espereble vi ne legosmian leteron, ne konsiderante pri via malsano? Bonvolu vin gardi!

Se mi rememoras la tiaman aferon, mi ankoraŭ nun min mem kompategas. Larmoj, kiaj estas sekreciataj ĉe la rememorado de la naskiĝloko, amasiĝas sur miaj okulharoj.

Poste mia memoro je la bela najbarino malaperis iom post iom. Ŝajnas al mi, ke mi ree fariĝis vigla knabo kiel antaŭe. Sed la vundo de l' eta koro, kvankam nur degradita, atendadis la forton kuracantan, dum ĝia posedanto tion ne rimarkis. Kiam mi estis dekdujara, iam mia fratineto invitis sian amikinon kun ŝia pli maljuna fratino, por kune ludi. La pli maljuna fratino estis ankaŭ dekdujara kaj nomata Cuja. Depost kiam mi ŝin vidis unuafoje, mi ŝin ekamegis. Pri la pli juna mi ne memoras, kia ŝia nomo estis, ĉar ŝi estis blinda je unu okulo kaj malbela, dum la pli maljuna estis nekompatebla. Kiam mi aŭdis, ke mia patrino ŝin admiris, dirante „bela kiel pupo“, mia koro kvazaŭ suprensaltis pro konsento al tio. Sed miaflanke, neniel povante diri tiajn vortojn, mi min sentis incitita. Mi penadis alproksimiĝi al fraŭlino Cuja

kun trankvila koro, sed pro hontemo mi neniel tion povis; ĉar tiam en mi malbeno de la karno jam eklevis sian malbelan kapon, kvankam nur iomete. Sed mi ĉiel penadis, esti nepre la unua superulo antaŭ ŝi. Mi ekhavis nur malamikojn ĉirkaŭ mi, kaj mi ree fariĝis malbonhumora knabo kun malmola koro.

Mi tion ankaŭ rememoras. En la deziro esti ĉiam en ŝia proksimo, mi volis nepre akiri ŝian fotografaĵon. Al mi ŝajnas, ke mi tiam pensis, ke estas neniu rimedo krom interŝanĝi. Sed, kiel mi kuraĝus doni al ŝi mian solan fotografaĵon. Kaj fine mi elpensis fari fotografaĵon de miaj grupanoj. Kiam la fotografaĵo estis farita, mi trovis, ke mi estis fotografita tre malbela, sed unu el miaj amikoj aminda. Mi tre ŝanceliĝis malgraŭ la juneco, sed refoje fotografiĝi estis neeble. Iun vesperon, post kiam mi kun la fratinoj kaj aliaj geknaboj multope ludis, mi ĵetis la fotografaĵon antaŭ fraŭlino Cuja kaj ŝia fratino, ŝajnigante indiferentecon. Estis fraŭlino Cuja, kiu rapide ĝin prenis. Ŝia fratino tuj alproksimiĝis al ŝi kaj ili ambaŭ ĝin rigardis. Tiam mi diris kvazaŭ duone kantante: „Kiu volas ĝin ricevi?“ Estis ŝia fratino, kiu dirinte: „Donu al mi!“ bruligis sian solan okulon. La detenema fratino pli maljuna ĝin metis trankvile sur la maton turninte la bildflankon malsupren, kvazaŭ ŝi tuŝis ion malbonan. Mi ekscitiĝis kaj nenion pripensante ĝin disŝiris en pecetojn antaŭ ĉiuj rigardantoj mirigataj.

Vi eble tre enuos legi tiajn aferojn. Sed mi vin petas esti pacienca por iom da tempo kaj legi plue.

Mi volis iel certigi, ĉu ŝi min amas. Sed ŝi kondutis naive, ĝentile kaj al ĉiuj egale, kaj pro tio mi suferadis kaj suferadis, ke mi min sentis kvazaŭ sufokata. En mia nuna stato mi ne toleras rememori la puran, fortan suferadon, kiun mi tiam travivis.

Poste alia afero okazis. Sur la vojo al la lernejo de mia fratineto loĝis bubo, kiu turmentis preterirantajn geknabojn. Ŝin atendente je la horo de ŝia lernevizito kaj hejmenreveno li ŝin minacis, ke li ŝin batos, se ŝi piedpremos eĉ unu eron de ŝtoneto kuŝanta antaŭ lia domo. Pro timo antaŭ tiu bubo la vizito de fraŭlino Cuja al ni ankaŭ komenciĝis maloftiĝi. De forta amo al mia fratino kaj samtempe de dezirego vidi fraŭlinon Cuja pli ofte, mi iun tagon faris interfrapon kun li. Nur pro la pli granda longeco de mia bambua bastono, mi fine forpelis tiun bubon en lian domon. Kun fiero mieno de triumfo mi iris tien kaj tien ĉi antaŭ la pordo de lia domo. Jen subite ŝtono, kiun li celante ĵetis sur min de interne de la barilo, celtrafis mian dekstran brovon kaj de tie sango ŝprucis. Ekkoleriĝinte mi enkuris senkonscie en lian domon kaj estis tie flegata; poste oni min portis al mia domo kaj kuŝigis en la lito post kudrado de la vundo per tri kudriloj. Oni diras, ke mi tiam eldiradis eĉ en la deliro: „Senkuraĝulo! Senkuraĝulo!“

Post ĉirkaŭ dek tagoj la vundo jam preskaŭ resaniĝis, ke mi povis promeni en la ĝardeno. Sed la kolero de mia koro neniel trankviliĝis, kaj ĝenite de mi pro tio, mia patrino rakontis al mi pri diversaj aferoj, por min konsoli, kaj sciigis min, ke unu de fraŭlinoj Kobajaŝi ĉiutage vizitadis Inari-templon⁴ por preĝi, ke mia vundo kiel eble plej baldaŭ resaniĝu. Kiam mi aŭdis pri tio, mi pro ĝojo preskaŭ eksaltis. Nun mia vundo estis sufiĉe rekompencita. Estis bone, ke mi vundiĝis. „Sed,“ mi ekpensis en mia eta koro, „kiu estas unu de la fraŭlinoj“? Mi neniel kuraĝis demandi mian patrino pri tio.

Kiam mi povis ree vizitadi lernejon, fraŭlino Cuja kaj ŝia fratino transloĝiĝis de sia loĝejo en la vendejon kaj

de tiam estis neniam donita al mi la okazo, ŝin vidi eĉ nur unu fojon. Mi pensis, ke estas pli bone, se mi estus mortinta pro interfrapo. Efektive, estas neniu epoko krom infaneco, en kiu oni povas pli facile decidi morti. Kompare kun mi tiama, mi kun miro vidas, ke mi nun estas mirinde malproksimiĝinta de la morto.

Mi ĝis nun ankoraŭ ne scias, kiu de la du fraŭlinoj preĝis por mi. Poste ni translokiĝis en la urbon Sendai⁵; sed mi ofte vizitadis mian antaŭan urbeton kaj jam sciigite, ke la patro de fraŭlino Cuja estas tevendisto, mi ĉiam atentadis sekrete, kiam mi iris preter la tevendejoj. Iam ŝajnis al mi, ke mi vidis fraŭlinon Cuja en la iom granda vendejo. Kvazaŭ frapita de tondro mi konfuziĝis kaj turninte la kapon de tie mi rapide foriris.

Tiam, je mia malĝojo, mi jam fariĝis kvazaŭ duonbesto, kiu, eltirinte fraŭlinon Cuja el fragmentitaj rememoroj kaj sin ferminte en la labirinto de la fantazio, al si permesis onanion.

Ankaŭ post tio mi kelkajn fojojn preteriris la tevendejon, en kiu, ŝajnas al mi, mi vidis fraŭlinon Cuja. Sed post nelonge la tevendejo estis fermita. Kaj fraŭlino Cuja, kiu skuis miajn tutajn animon kaj korpon, postlasinte nur neperfektan imagon en mia koro, malaperis kun tiu juna edzino en la miraklan mondon, kiu min neniom koncernas. Tio estis por mi tiam pli mistera, pli malĝojiga okazo ol morto. Ĝi estas ankoraŭ nun mistera por mi, se mi rememoras; terure mistera. Neniel revidi la homon, kiun oni antaŭe vidis... ĉu tie ne kuŝas senfunda mistero de la sorto?

Kara B.! Vi nun finaŭdis sensencan, longan uverturon. Kompreneble mia seksa vivo ne finiĝas tie; sed pensante, ke la ceteraj ne rilatas senpere al mia konfeso,



mi ilin rezervos por babilado en aliaj tagoj kaj nun skribas al vi malkaŝe pri la lasta okazintaĵo.

Kiel vi scias, ĉi tiun someron mi vizitis la banlokon Noboribecu⁶ en Hokkaido⁷ kun mia patrino. Pro longa mastrumado ŝi estigis tre kaduka, kaj konsilite de mi kaj samtempe instigite de scivolemo, mi ŝin akompanis tien, kvankam tio ŝin iom ĝenis. Por mi enlandulo, tie nomata de la insulanoj, ia dezerta naturo en Hokkaido ne estis aminda. Kiam mi veturis sur malebenega montvojo skuigante en la omnibuso, mi eĉ timis, pensinte kiam gastejo nin atendos; sed atinginte la celokon, mi trovis kelkajn pli grandajn gastejojn ol mi estis atendinta. Sed malpureco nekonvena je la grandeco kaj bangastoj kiuj konsistis nur el homoj kiel kompanianoj kaj ministroj vivantaj en la plej malalta ĝuo, tuj kaŭzis al mi malagrablan senton. Feliĉe nia ĉambro estis rezervita en la unua etaĝo, kiu havas belan perspektivon. Verda vidaĵo rigardita de tie estis tre bela; sed mi sentis, ke nenio estas pli neĝustloka krom kuŝigi la sanan korpon en la ĉambro de 1^a bangastejo.

Sed estas pli netolereble, restadi pro malsano en tiaj lokoj kiel vi. Mi timas, ke ĉi tiuj miaj vortoj vin malagrabligos.

Post vespermanĝo mi ĉirkaŭiris laŭ la verando en la unua etaĝo kaj trovinte en la ĝardeno malantaŭ la konstruaĵo du per jukataoj⁸ vestitajn homojn kaŭrantajn sur la vojo sub la parkomaniere artefarita monteto, mi haltis min apogante sur la kolonon.

Unu de ili estis malgrasa, ŝajne altkreska maljunulo kaj kontraŭ li kaŭris knabino kun japanmaniere aranĝita hararo kaj olivkolora zono. Mi atente rigardis, kaj ŝajnis al mi, ke ili senbrancigas kaj senŝeligas ĵus elfositan bambuon kun kurba radiko. La knabino aspektis ankaŭ

malgrasa, sed ŝia riĉa hararo distinge tiris mian atenton eĉ de malproksime. Nekonscie observante tion, mi elektis senkonscie pasintajn memorojn en la kapo, kaj kiam mi rekonsciigis de fantazio, mi rimarkis, ke mi pensis ŝin alligita al fraŭlino Cuja kaj mi mem miris pri mia stranga penso.

Jen la gracieco simila je la cervido, kiun mi trovas en dekdu- aŭ dektrijara knabino kaj la ĉarma hararo kun bela rando, kiu min allogas ĝin ĉirkaŭpreni kaj mordi, kaj per kiu fraŭlino Cuja distingiĝis. Al mi ŝajnis, ke la knabino antaŭ mi posedas tiujn du ecojn. Miaj ĉiuj rememoroj estintaj svarmis unu post la alia kaj mi sentis, ke la sango en mia tuta korpo enkuris en la koron min ekscitante.

Mi ne povas krom pensi, ke ironia rideto aperas sur via vizaĝo, dum vi legas ĉi tiun leteron. Tio povas ŝajni al la homoj kiel vi, kiu vi silentas, kvankam vi bone konas la mondon, sensenca epizodo infanaĵa. Sed mi, intencinte kaŝi nenion antaŭ vi, skribis ĝis ĉi tie kaj ne povas jam returneniri. Min apogante sur la kompaton vidigantan malantaŭ la ombro de via rideto, mi skribadu nedeteneme.

Kvazaŭ instigite de mia ne ordinara rigardo, la knabino subite levis sian kapon kaj min rigardis rekte. Mi koncentris energion en mia tuta korpo en la okulojn, kaj penadis ne rompi ĉi tiun sonĝon en la hela tago. Tiam la maljunulo subite ekrimarkis la sintenadon de la knabino kaj turnis siajn okulojn al mi laŭ ŝia rigardo. Konfuzite la knabino turnis sian vizaĝon teren kaj ekstarinte pli frue ol la maljunulo ŝi prezentis al mi la dorson. Kaj ili ambaŭ malaperis malantaŭ la artefaritan monteton.

Antaŭ la vespera perspektivo, mankanta je la sunlumo, miaj okuloj, kiuj rigardadis blankaĵojn, estis kvazaŭ

blindaj. Pro tio mia konscio ankaŭ malklarigis, kaj mi ne sentis la verandon sub miaj piedoj. Sed ĉi tiu iluzio tuj rompiĝis kaj iom post iom rekonsciiginte mi klare vidis, ke ĉio okazis ĉi tie antaŭ miaj okuloj. Tio ne estas sonĝo, sed realaĵo. Ĉu ekzistas tia realaĵo? Dank' al Dio! Mia koro tiel ĝojis, ke ĝi en mi pulsobategis. Ree revenis al mi la perdita mondo. Sola ridetante mi en firma paŝo iris sur la verando tien kaj tien ĉi. Mi ne povis kompreni, ĉu pasis nur unu sekundo aŭ eterno, ĝis mia patrino venis min alvoki por banado. Mi ŝin sekvis distrite kaj nur sence ridetante.

Mia laca patrino sentis agrablan dormemon eble pro efiko de la medikamenta bano kaj post banado ŝi tuj ekdormis trankvile. Mi penis legi vian traktaton „Studado pri la traĥeo kaj la larvo de la libelo“, kiun mi kunportis, sed mi ĝin neniom komprenis post kelkfoja relegado. Estis kvazaŭ Biblio. Antaŭ miaj okuloj aperadis kaj malaperadis fragmentitaj impresoj de la knabino, kiun mi vespere vidis, kaj mi tute suferis. En tiuj tagoj mi skribadis la taglibron laŭkutime, sed mi nun vidas, ke tie estas skribite nur jene:

„Alvenis hodiaŭ al la gastejo en Noboribecu; malpura, sed tre bona loko. Mi min sentis neniam tiel feliĉa. Estas vespero, kiam mi sentas deziron danci senveste kiel Davido. Dum mia tuta vivo mi neniam forgesos tion, kio hodiaŭ okazis. Kion fari kun la forto de la amo, kiu tiel ŝprucas. Dankas Dion. Kiel aminda estas la vizaĝo de mia dormanta patrino!“

Efektive pro tio, ke mi vivas en tiu ĉi mondo, mi tiun nokton dankis Dion kaj min sentis tro feliĉa, kaj ne povis dormi. Kiam la dua horo sonoris, mi decidis enlitiĝi. La litkovrilaro estis mola kaj agrabla. Tute libera de diversaj fantazioj, kiuj atakas junulojn en la

lito — ambicio, revo, pento, volupto, memriproĉo, entrepreno — mi estis kiel infano tuj entirita en la fundon de profunda, ĝoja dormo.

Kiam mi vekigis la sekvantan tagon, hela sunlumo jam eniris oblikve sur la verandon, ĉar en Hokkaido oni uzas kutime vitrajn glitpordojn anstataŭ la lignaj. Mi vekigis spontanee kiel la burĝono ekfloras, kaj senkonscie ridetis en la lito. Kaj sentinte nun konfidindan forton de mia korpo, mi aŭ prezentis ambaŭ brakojn alterne antaŭ la okulojn, aŭ prenis ilin alterne unu post la alia, aŭ preninte apudkuŝantan spegulon rigardis en ĝin montrante blankajn dentojn. Poste, kiel juna bambuo forĵetanta neĝon de si, mi abrupte leviĝis sur la lito. Jen mi vidis, ke min rigardis mia patrino, kiu jam sin vestis, frotante al si la okulojn.

Kun ĝojo en la koro mi komencis min vesti, sed subite abomena maltrankvileco, kiun mi ne estis rimarkinta, min ekkaptis. Ligante al mi zonon mi penis rememori la scenon en la lasta vespero, sentante, kvazaŭ mi ion postlasis. Kaj vidu, la sceno estis fiksita en mia kapo kun pli klara konturo ol tiam, kiam mi vidis per la okuloj. Kial do povas komenciĝi abomena maltrankvileco? Kio min maltrankviligas? Mi sentis, ke per tio, ke mi vidis la knabinon, mia vivo estis fikse destinita por la vojo al malĝojo kaj al malfeliĉo. Tie estis iu foso, kiun mi ne povas transpasi. Stranga soleco min ĉirkaŭis. „Jes, sen konsiderado li volas efektiviĝi la iluzion.“ En tiama humoro mi permesis al mi tiam malprofundan monologon. Sed, mi rememoras, ke maltrankvileco kaj pasio, pro kiuj mi nun suferas, estas kaŭzitaj ĉiuj de la diableto, kiu tiam ekaperis en mia koro.

Mi deziregis, ke mi vidu la knabinon ankoraŭ unu fojon. Ŝi loĝas en la sama gastejo kiel mi; sed kie

estas ŝia ĉambro? La tago pasis postlasinte al mi malgrandan maltrankvilecon. Vespere antaŭ enlitigo mi volis min bani ankoraŭ unu fojon. Timeme portante plene malsekajn lignoŝuojn kun malstreĉitaj rimenoj kaj celante la malhelan lamplumon, mi malsupreniris danĝeran, ŝtonan ŝtuparon kaj atingis sub la krutaĵo konstruitan banĉambron, tra kiu torenta rivereto fluas. Tie mi trovis neniun bangaston, sed nur komizojn kaj servistinojn de kelkaj gastejoj, kiuj kune sin banante malĝentile eldiradis kiel eble plej obscenajn vortojn unuj al la aliaj kaj bruludis. Pro malesperigo mi volis reveni ne banite, sed trovinte tiu momente, ke la maljunulo sin senvestiganta en la vestejo estas la hieraŭa homo, mi senŝanceliĝe eniris en la vestejon kaj min senvestiginte pli frue ol la maljunulo mi ensaltis en la bankuvon. La fortikaj Panoj kaj malbelaj nimfoj, kies ĝuado estis interrompita per la vizito de l' bangastoj, baldaŭ foriris unu post la alia, tiel, ke du grandaj bankuvoj apartigitaj per ligna tabulo estis okupitaj nur de ni du: mi kaj la maljunulo.

Do, en tia okazo estus laŭkutime, ke mi alparolas al la maljunulo kun mondeca maniero kaj konatiĝas kun li. Sed tian agon mi tute ne ŝatis. Krom tio, la maljunulo ŝajnis al mi obstina kaj de malnovaj kutimoj. Ĉiam murmurante ion en la buŝo, li ne volis eĉ turni la okulojn al mi. En la banĉambro regis silento, nur bruis akvo superfluanta el la aparta kuvo por lavado kaj sonis glate, kvazaŭ oni tuŝas oleon, kiam ni lavis al ni la vizaĝojn kaj manojn per la viŝtukoj.

Tiam subite aŭdiĝis piedsonoj de altaj lignoŝuoj. Mi ekmiris kaj maltrankviliĝis. Ankaŭ la maljunulo sin turnis al la sono. Kaj poste silento ree regis momenton.

Baldaŭ la pordo de la enirejo iomete malfermiĝis. Miaj tutaj korpo kaj animo estis nur ŝola „atento“. Lev-

inte nur la kapon el varma akvo mi kiel ĉasisto sekrete observadis la eniranton, ĉirkaŭitan de vaporo de malantaŭ la malhela lumo de l' petrolampo. „Ĉu vi estas sola, mia avo?“ kiel tondro frapis miajn orelojn soleca, sed juna voĉo. „Kia bela voĉo, pli bela ol mi atendis!“ tiel pensante, mi englutis ŝian voĉon tra la oreloj ĝis la fundo de la koro.

Malgraŭ ke la maljunulo kompreneble sciis mian ĉeston, lia buŝo eligis: „Jes“, kvazaŭ lin tedis, diri, ke mi ĉeestas. Kaj aŭdinte tion la homo ekstera malsupreniris ŝtonan ŝtuparon kun ĝojo. Kia aminda estis ŝia pozo, kiam ŝi iris paŝo post paŝo horizontale streĉante la dekstran brakon, por ke ŝi ne glitu pro malsekeco de la pavimo! Baldaŭ ŝi sidiĝis kun levitaj genuoj apud la bankuvon, el kiu varma akvo superfludis, kaj malsekiĝinte al si la bruston per la viŝtuko, ŝi serĉis per la okuloj la avon tra vaporo, kaj eksciis, ke tie alia juna homo estas. Kia kompatinda ŝi estis, kiam ŝi pro honto, kiu kaptis ŝian tutan korpon, senkonscie kuntiris la membrojn kaj mallevis la kapon! Mi nur silente rigardis la scenon kvazaŭ en sonĝo. Tiam, instigite de la maljunulo, ŝi kuraĝis sin trempi en la bankuvon. Mi akre konsciis, ke apartigite de la akvo ŝia korpo estas en la proksimeco de kelkaj futoj. Kaj mi sentis, ke pikanta incito atakadis mian haŭton, kvazaŭ mi staris en la akvo saturita je elektro. Mirinte mem pri mia troa senkuraĝeco mi penadis trankviliĝi kaj tie resti, sed vane. Ne tolerinte mi fine transiris rapide en la alian bankuvon.

Tiam, mi banante en la akvo apartigita per ligna tabulo, mi avidege kiel la kato aŭskultis, por kapti ĉiujn bruojn en la apuda kuvo. Nenia parolo aŭdiĝis, kvazaŭ la silentado, kia nur okazas inter la homoj sataj je amo, estas agrable interŝanĝata inter la maljunulo kaj la knab-

ino. Trankvila kaj sola, kun pacega rideto mi ebriiĝis de tiu elokventa silentado. Estis trankvila, paca nokto nur la bruo de l' torento, kiu el la senhoma monto rapidas al la homplena loko, vizitis miajn orelojn kiel purakompananto konvena je ĉi tiu silentado.

Tiam ŝi eklavis al si la hararon apud la aparta kuvo preta por lavado. Malhelpite de l' ligna tabulo mi ne povis vidi ŝian korpon; sed maldika antaŭbrako konvena je la virgulino kaj unu parto de riĉa, nigra hararo intercitadis mian senton kaj ebriegigis mian cerbon kune kun la ensorĉantaodoro de l' pudro. Kiam ili ambaŭ forlasis la banĉambbron kaj iliaj piedsonoj malproksimiĝis, mi alproksimiĝis al la aparta kuvo kaj volis serĉi tie ŝian postsignon. Mi ĝojsaltis kiel pasero, kiam mi el kelka akvoĉerpiloj trovis unu makulitan per pudro. Kvazaŭ el glaso por triumfanto mi enverŝis per tiu ĉerpilo malvarmegan montan akvon en mian sekan gorgon kaj revenante mi kunportis tiun akvoĉerpilon kun zorgo.

Tiun nokton, kiam mi enlitiĝis, antaŭ miaj okuloj klare aperis la bildo de „la naskiĝo de Venuso“ de Botticelli. Unue mi memoras je malgrandaj printempaj ondoj, kiu ludante je ĵus deprenitaj rozoj ĝoje brilas, dancas kaj ridetas. Due mi memoras je l' malplena, sed plena granda spaco etendiĝanta sur tiuj ondoj. En la mezo pentrita iu gracia figuro ne pure greka. Ĉu ŝaŭmoj de akvo, aŭ homo, aŭ marfeino? Figuro de gracie ekstarinta virgulino, kiu klinas la kapon, kvazaŭ ŝi ne povas subteni sian riĉan, brunan hararon kaj rigardas rekte antaŭen kun mallarĝe malfermitaj okuloj ne perfekte vekigiĝintaj de sonĝo. Figuro de virgulino naskonta senfinajn vivon kaj ĝojon. Tute sanktigita, riĉa sensacio.

Poste mi havis ofte okazojn ŝin vidi. La sekvanta tago ŝi aranĝis la lavitan hararon nur simple. Mi ial

pensis, ke ŝi tion faris min flatante. Ju pli ofte mi ŝin vidis, des pli profundigis mia amo al ŝi, kaj ĝi jam fariĝis forto, kiu apartigate de l' asociacio je fraŭlino Cuja povis ekzisti tute memstare kaj min altiradis. Mi tion timis, sed kion mi povis fari? La nigrega hararo, kiu ornamas la belan vizaĝon kiel la ebena turo bele skulptita. La nigreta, sed brila vizaĝo gracia, kiun riĉeco de l' hararo pli delikata ŝajnigas. Grandaj okuloj enigmaj. Inspiranta brusto kun mamoj ne ŝvelantaj. Graciaj gamboj kun plenaj femuroj. Pripensante tiujn en la koro unu post la alia, mi ne povis krom bedaŭri, ke mi ŝin vidis tro malfrue. Eble okuloj de kelkaj junuloj plenaj je pasio ŝin jam rigardis. Kaj ĉu ŝi el ili neniun trovis, kiu tuŝis ŝian koron? Jes, ŝi devas esti jam trovinta tiun. Estus vere miraklo, se ŝi lin ankoraŭ ne estus trovinta. En la fundo de ŝia brusto, kiu, ŝajnas al mi, nenion scias kaj neniun tuŝas. . . Sed, ho ve, tro malfrue mi ŝin vidis! Dum mi tion ne konsciis, ekkreskis en mia koro jaluzo kaj envio. Kaj strange malgajigite pro tio, mi forlasis mian patrinon kaj sola vizitis la ban-ejon en Karunisu, kiu estas malproksima ĉirkaŭ 8 kilometrojn.

Kion do vi amas en ŝi? Vi nur konas ŝian suprajn vizaĝon. Kio ja estas la nigra hararo? Kio ja estas la grandaj okuloj enigmaj? Kio ja estas la maldika brusto, kiu povas enfermi en si malsanon? Kion vi faros, se ŝia belforma kapo estas plena nur je senprudentaj ideoj? Kion vi faros, se la okuloj konvenaj je la vizaĝo de l' anĝelo estas facile allogataj de volupto? Kion vi faros, se en ŝia ŝajne naiva brusto jam estas loĝinta iu homo? Vi do ankoraŭ neniom tuŝis ŝian koron. Kia revulo kaj fantaziulo vi estas! Kien kaj kiam vi forĵetis vian animan vivon por kiu vi klopodis? Kion vi faros

kun via entrepreno? Ĉu vi kredas antaŭ ĉio, ke vi havas ion, kiu meritas postuli amon de l' virino? El via 22jara vivado, ĉu vi elfaris ion memfidan? Observu atente vian vizaĝon per la spegulo! Ĉu tie ne estas reflektataj ordinare pasigitaj 22 jaroj malklare, sen forta kaj inspiro kiel la portreto pentrita de mallerta artisto? Observu atente vian malelegantan sintenadon kaj vestaĵojn! Kion vi erare pensas? Malspritulo! Vi devas silente rompi la barelon kaj iom post iom vin elkonstrui kiel Teufelsdröckh. Se vi serĉos la virinon, serĉu ŝin inter la loĝantaro de l' regno, kiun vi plene okupis. Ĉiuj virinoj estas nun al vi fremduloj perfektaj. Neniuj estas pli erara ol via penso! Tiaj vortoj sonis unu post la alia kvazaŭ frapante al mi la kapon.

Silente mi grincigas la dentojn. Mi havas neniun forton, kiu povas kontraŭstari la kulpigon de mi mem. Sed mi scias, ke mi havas fortan intuitivon kaj ke la sorto ne estas retenebla. Ĉiu ŝia haro min kredigas ke ŝi estas la mia kaj la tempo nun maturas. Komprenindeble mi estas nur nematura junulo. Mia vizaĝo havas nenion, kio allogas virinon. Sed ĝis nun mi konservadis miajn korpon kaj animon puraj per la plej granda penado, por ke mi ilin donu al la ino, kiu kun mi kunĝojos kaj malĝojos dum mia tuta vivo. Mi estas junulo kaj ĝis nun ankoraŭ nenion indan mi elfaris; sed dum kiam mia vivo daŭros, mi ne perdos kuraĝon kaj deziron efektiviĝi ion fortan, belan kaj valoran kaŝitan en mia koro. Ĉu ŝi jam konas amon? Bone, mi ŝin sciigos per la pli forta amo; mi ŝin sciigos, kia estas vera amo. Mi intuitive sentas, ke mi havas sorton fari tion al ŝi.

Kun firmaj paŝoj mi iris sur la vojeto en la senhoma arbaro, piedpremante la forte odorantajn filikojn, kaj tie aŭ min riproĉis, aŭ min konsolis. Mia koro sin sentis

ŭ soleca kiel en vintra sezono, aŭ esperoplena kiel en
rintempa kampo. Vizitite de tia konfuza, mirinda ŝanĝo
elkfoje en unu tago, mi pasigis kelkajn tagojn songe,
vazaŭ mi vagis en tute fremda labirinto.

La 26an de Aŭgusto, la uraganego terure atakis ankaŭ
Hokkaido-n. En la tagjurnalo de l' sekvanta tago mi legis
en la margeno, ke pro la difektiĝo de l' fervojo inter
Tomori⁹ kaj Tokio la vagonaro ne veturas. La sekvantan
matenon, la servistino, kiu nin servis ĉe la matenmanĝo,
rakontis al mi, ke forveturontaj gastoj konfuziĝis pro tio
kaj ŝi aldonis, ke la knabino plorplendis tre kompatinde,
dezirante restadi ankoraŭ kelkajn tagojn, dum kiam la
maljunulo obstine insistis, nepre forveturi malgraŭ ĉia
malhelpaĵo. Manĝante mi sentis en la brusto ion mal-
armegan kiel glacio. Ne demandite, la servistino rakontis
al mia patrino, ke la maljunulo loĝas en la kvartalo
Koiŝikaŭa; ke li volas reveni tiel rapide pro tio, ke la
fernejo de lia nepino komenciĝos la unuan de Septembro;
ke li ĉiujare vizitas ĉi tiun gastejon kaj longe restadas
kaj ke li estas pura edoano¹⁰ kaj tre obstina ktp.

Estis bela, posturagana mateno; la ĉielo estis hela,
vazaŭ ĝi jam forgesis, kio hieraŭ okazis, kaj blua de
el aŭtuna nuanco. Soleca malpleneco simila al ĉi tiu
sennuba ĉielo regis ankaŭ en mia brusto.

Kiam mi revenante de l' tualetejo supreniris la ŝtuparon
kaj okaze rigardis la verandon, mi trovis, ke la knabino
staras apud la balustrado antaŭ mia ĉambro kaj vokas
kun mallaŭta voĉo: „Korvo! Korvo!“ Ŝajne ŝi portis
en la mano restaĵon de manĝaĵo. Ĝin ĵetante sur la
tegmenton ŝi alvokis la avarajn, malbelajn birdojn. Al
mi ŝajnis, ke en ŝia profilo montriĝis pli profunda soleco
ol kutime. La korvoj alproksimiĝis laŭlarĝe irante al
manĝaĵo, bruigante mallogajn piedsonojn sur la ligna

tegmento. En tiu momento ŝi ekrimarkis, ke mi aperde de l' malluma ŝtuparo, kaj min rigardis. La rigardo ŝiaj grandaj, impresoplenaj okuloj min trafis fikse la unufojon. Mirigite de l' abrupteco mi instinkte ŝanceligis sed sentante tro bedaŭrinde perdi tiun lastan okazon mi koncentris mian de ŝi turnitan rigardon ankoraŭfoje en ŝiajn okulojn. Iu dolĉa malĝojo, subite ekkreskinta tremigis miajn lipojn, kaj miaj okuloj jam ne povis ŝi disigi de ŝi. Ni estis kvazaŭ kunligitaj per forta, fata forto nerezistebla. Mi ne komprenis, kion tio signifis sed ŝi tuj malantaŭeniris du aŭ tri paŝojn. Mi sciis, ke mi devas antaŭeniri al ŝi senceremonie. Mi sciis, ke tie estis lasita al mi la sola okazo alparoli al ŝi. Sed kia malspritulo mi estis! Kiel timemulo, ne tolerante plian saton, mi min turnis al mia ĉambro laŭ la verando. Oni bezonas multajn vortojn skribi pri tio, sed tio estas nur momenta okazaĵo daŭrinta pli mallonge ol kvarono da minuto. Sed, de post tiu ĉi momento jam kaptis mia vivo la forta impreson dum la tuta vivo neforgesebla.

Mi tuj decidis, reveni jam en tiu tago al Sendai, kaj rapidigis mian patrinnon mirigitan. Konfuzite ŝi nur observadis mian frenezan agadon.

Dum mi pakadis, radoj de omnibuso sonis. Kun miri mi rigardis malsupren min apogante sur la veranda balustradon kaj trovis, ke la plej bela veturilo en la loko estis preta duone kaŝate sub la tegmento de l' antaŭa ĉambro. La geservistoj de la gastejo komencis kun enporti la pakaĵojn en ĝin. Distrite mi fikse tion rigardis kvazaŭ mi jam forgesis la ĝisnunan okupon. Baldaŭ aperis la maljunulo adiaŭe salutate de la gastejestro. Mi senkonscie manpremis firme la balustradon kaj mordis al mi la lipon. Tiam la knabino aperis. Portante purpuran mantelon sur la purpura superjupo, sed ornaminte l

riĉan, nigran hararon per nenio, ŝi vidiĝis tro soleca kaj malĝoja, sed por mi dieca. Mi klare vidis eĉ tion, ke la basko de ŝia superjupo estis faldita ie je la rando. Mi preĝis Dion en la koro, por ke ŝi suprenrigardu al mi ankoraŭ unu fojon. Pasis iom longa tempo, ĝis ili ambaŭ eniris en la veturilon kaj sidiĝis, kaj kvankam ŝi ŝajne sentis mian rigardon, ŝi min ne rigardis. Mi sentis, kvazaŭ mi kriis per raŭka voĉo; sed, nek kriante, nek moviĝante eĉ centimetron, mi nur postrigardadis la veturilon. Mi ĝin postrigardadis, dum ĝi estis videbla. Sed la kapo de l' malvarma knabino fine malaperis ekster la vidkampo eĉ ne movetiĝante.

Malplena mondo etendiĝis soleca, malvarma kaj senfina.

Kiam mi rekonsciigis, mi iun trovis tremanta manpremante la balustradon. La unuan fojon en mia vivo mi tiam sentis manion de amo, kiu povas igi min kuri de tie mortpremante aŭ mian patrinon, aŭ alian, kiu ajn ili estus. Kruela koro, kiu povas oferi ĉion ajn, bruege sonis tra la tuta korpo.

Via A.

(De A. al B.)

Tokio, matene la 7an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Hieraŭ mi komencis skribi al vi de la krepusko, kaj kompreneble ne vespermanĝis. Dormema pro lacego mi enmetis la leteron en la koverton, ne sciante, ĝis kie mi skribis, kaj sonĝoplena, malagrabla dormo ne malfermis al mi la okulojn ĝis la 9a de hodiaŭa mateno.

La kapo doloras al mi minacante je rompiĝo. Sed, antaŭ ĉio mi ne trankviliĝos, ĝis kiam mi estos ĉion konfesinta.

Soleco estas nun por mi manĝaĵo, venena medikamento, la plej granda konsolo kaj la plej granda doloro samtempe.

Iun fojon mi min sentas supermezure aminda, kaj la alia fojon tiel malaminda, ke min naŭzas nur pensi pri mi mem. Brila, sankta ĝojo, kian sentas nur la infano trempitaj en la amo de Dio, kaj maltrankviliga korpremo kian Adamo sentis forpelite el Paradizo, turmentas mian koron unu post la alia. Ĝis nun mi neniam pensis, kian tial estas la homo. Mi nun miras, kiel memmensoganti mi skribis al vi en Septembro.

Ĉu tio estas la enfalejo, kiun la naturo faris por konservi la specon? Ĉu ĉi tiu terura forto, kiu traboranti la konscion, la koron kaj la animon eniras pli profunde kaj tuŝas laŭ sia plaĉo la bazon de l' estado, estas nur ilo por konservi la naturan leĝon nomatan naskado? Mi pensas, ke estas ofendo de l' homo vivo, ke oni simple traktas kaj konkludas tian misteran funkcion interne de l' homo nur laŭ la scienco. En ĉiu fragmento de mia nuntempa vivo mi eĉ pensas, ke mi povas detrui la tutan sciencan sistemon. Sed, kio do estas, kiu estas postlasata post tia maltrankviliĝo? Estas nur grataĵo postlasita senspace sur la haŭto de l' vivoplena koro . . . kaj nenio krom tio.

Nun mi forgesis, ĝis kie mi skribis, sed mi skribados plue.

Post kiam mi akompanis mian patrinon ĝis la naskiĝloko mi tuj veturis al Tokio, kaj poste mi nenion faris krom tio, ke mi vagadis sencele interne de l' kvartalo Koiŝikaŭa Veniginte ĉe ekveturo de Noboribecu la gastonomaron mi povis ekscii ŝian nomon, sed la adreso ne staris en ĝi, eble pro tio, ke ili vizitas tiun gastejon ĉiujare. Nun kiam mi rememoras tion, ŝajnas al mi mirinde, kial mi ne penis trovi rimedon por ekscii ŝian adreson. Mi eĉ povas pensi, ke al mi mankis sincereco pri ĉi tiu amo. Kia mallertulo mi estis! Je mia miro ŝi ankaŭ havis la

saman familian nomon kiel fraŭlino Cuja. Se la horo venas, kiam la lernantinoj vizitas la lernejon, kiel somnambulo mi elvagadas el la domo perdinte sindetenon kaj senton de honto kaj vagadas sencele tra la stratoj. Posttagmeze mi faras ankaŭ la samon. Noktiĝas, kaj anstataŭ neplenumita espero maldolĉaj doloroj de l' koro min ekminacas. Mi pentas pri mia hontinda ago, konvena je la malnoblaj knabaĉoj, malĝojas, ke la estimo kaj intereso al la scienco estas malaperanta el mia koro iom post iom kaj mi eĉ koleras pri tro sendetenema distriĝo de mia animo. Maldolĉaj, solecaj larmoj de sinneado elfluadas ĉiuvespere el miaj okuloj. Unu vesperon mi min riproĉas pli forte ol alian. Kaj la alian vesperon, post suferado ellaciĝinte, mi mallevas mian kapon por preĝi, ne sciante ĉu antaŭ Dio, aŭ antaŭ ŝi. Kaj tiam larmoj elfluadas senfine el miaj okuloj.

La antaŭlegadojn mi ĉeestis nur la unuajn kvar tagojn.

Mi — kiu antaŭe malĝojis pri mia malbela vizaĝo, dubis pri mia kapablo kaj timis, ĉu ŝia amo jam apartenis al la alia — nun persistis en unu malgranda deziro, ŝin vidi nur ankoraŭ unu fojon, kaj pro tio la deziro fariĝis tiel forta, ke mi ne povis ĝin toleri.

Kion tio signifas, ke nur okaza renkonto produktas tian miraklon? Mi estas kvazaŭ blindulo, kiu estas enĵetita en la fremdan, luman mondon. Ekster la okuloj estas lumo lumanta ĉie kaj por ĉiam, sed en miaj okuloj nur eterna, nerompebla mallumo.

Kara B.! Je mia feliĉo mi povis malkaŝe skribadi mian konfesion ĝis ĉi tie. Sed mi nun sentas tion senprudenta. Mi jam tute perdis tiel esperon kiel ankaŭ ambicion, kaj mi atendas por la venonta tempo nenion — sen iu ajn emocio. Ĉesis jam interkomunikiĝo inter vi kaj mi. Mi plu nek havas necesecon, nek la kompetentecon inter-

komunikiĝi kun vi. Mi skribis al vi tian longan leteron nur pro la deziro, ke vi eksciuj pri tio.

Se ĉi tiu longa letero vin malagrabiligos, bonvolu mi pardonon por tio pro mia ĝisnuna amikeco. Plie mi timas ke mia letero senutile pligravigos vian malsanon.

Mi kore deziras, ke mia letero vin trovu en pli bona farto.

Via A.

(De A. al B.)

Tokio, la 10an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Vane mi atendis hodiaŭ de vi almenaŭ unu respondo al la letero skribita la 6an. Sed nun mi pensas, kiel egoisto mi estas, atendi de vi respondo. Eble mi ne devis skribi al vi tian leteron; sed kion mi devas fari kiam amanta koro serĉas plenan malkovron, dum ĝi aliflanke deziras profundan sekreton?

Al mi nun ŝajnas, ke ĉiuj homaj kulturoj ŝanĝiĝis. Tio scienco, kiel ankaŭ literaturo kaj moralo ŝajnas al mi arda koro nur kvazaŭ maskobalo. Mi ne povas pensi alie, ol, ke malfeliĉaj homoj, kiuj tute ne sciis pri la kortuŝo, kiam mia koro travivis, ilin supraĵe eltrovis kiel devigan rimedon, por ke ili forgesu neforigeblan solecon.

La ekstera mondo nun montras al mi specialan aperon kiam krom mi neniu scias. Neniu scienco ankoraŭ esploris pri tia apero, neniu arto ankoraŭ pritraktis tian aperon kaj neniu moralo ankoraŭ eliris el tia apero; nur mi sola estas, kiu ĝin estras. Ĉiuj homaj kulturoj moviĝas sur la periferio de tia apero kaj mi sola vivas en ĝi. Mi sentas ekscitiĝon kaj liberecon, kiajn sentas nur Diu komencanta kreadon.

Estas klare antaŭdirite, ke mia amo havos la sorton nepre plenumiĝi. Por danki por ĉi tiu grandega privilegio mi

volas ami ĉiujn homojn. Ne! — estus pli bone diri, ke la ama deziro, kiu senĉese elspruĉadas eĉ el mia doloro, atestas baldaŭan plenumon de mia amo. Kiam mi al ŝi donos miajn tutajn koron kaj animon, kiujn mi ĝis hodiaŭ rezervis sanktaj kun penado, kiam mi ricevos same la ŝiajn, saturitajn de mia amo, tiam la feliĉo, je kiu la homaro sopiradis, okazos perfekte sur ni ambaŭ. Kaj kiel nova forto ni per tuta forto penos por konstrui la novan homan kulturon.

Ŝiaj okuloj min pelas. Mi jam ne povas skribi filozofajn aĵojn sidante antaŭ la papero. Por mi estas lasata pli grava, pli viva afero.

Do, kara B.! mi vin salutas. Mian penson vi povas kompreni. Kaj mi pensas, ke via malsano devas esti pliboniĝinta hodiaŭ.

Via A.

(De A. al B.)

Tokio, la 15an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Antaŭ horoj (ĉirkaŭ la 4a posttagmeze) ĉe l' ponto Oĉanomizu¹¹ mi mi pensis, ke mi ŝin vidis. Mi rekonis ŝian simple aranĝitan hararon; ŝi portis purpuran superjupon kaj estis terure maldika. Ŝia nobla, gracia irado min konvinkigis antaŭ ĉio, ke ŝi estas tiu knabino. Mia kapo, kiu senkonscie ekscitiĝis la momenton, en kiu mi tion eksciis, baldaŭ terure trankviliĝis. Kaj vidinte, ke la okazo, kiun mi ne povos kapti refoje, venis, mi enpensiĝis kun strange terura trankvileco kvazaŭ antaŭ la duelo per veraj glavoj . . . ĉu sekvi ŝin kaj ekscii ŝian adreson, aŭ alproksimiĝi kaj alporoli al ŝi . . . Mi haltis senkonscie kaj pensadis, kaj dum mia racio al mi diris, ke la unua rimedo estas pli prudenta kaj sendanĝera, mi

kun trankvila koro rekte al ŝi alpaŝis. Perforte firme premante la teron per piedoj, kiuj volas flugi tra la aero, mi baldaŭ al ŝi alproksimiĝis kaj alparolis. En la momento, kiam mi sentis, ke eĉ por mi mem malbela, malakra voĉo eliĝis el mia gorgo, la knabino returnen rigardis kun miro. Estis tute alia persono. Ŝi eble estis sentinta, ke ŝin sekvas malnobla knabaĉo, kaj mi legis sur ŝia vizaĝo akrajn teruron kaj malamon. Kaj kiam mi rekonsciiĝis, jen mi estis kuranta senkonscie tra nekonata strato, malproksima de l' centro de la urbo.

Kia malpura degeneriĝo de l' koro!

Malestimu min, Dio kaj homo! Min ĵetu en la fundon de l' infero!

Kia, kia afero!

Via A.

(De A. al B.)

Tokio, la 16an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Antaŭhieraŭ mi skribis en la taglibro jene:

„For, senhonta diablo de l' volupto! Ĉu vi tion ne scias, ke, se vi volas aldoni pezon de l' allogo sur unu flankon de la pezilo, dum kiam mia animeco brilas kaj pezas sur la alia flanko, estas tia eraro, kia, se oni volas ne satigi la malsatan tigron metante antaŭ li la leporon?“

Ĝis antaŭhieraŭ neniu allogo de karno ekzistis por mi, nur tiu de manĝaĵo por plialtigi mian animecon. Kaj vidu, post la hieraŭa, abomena okazintaĵo mi ne povis facile endormiĝi la nokton kaj sopiradis je karno kvazaŭ spiregante. En fantazio mi per ambaŭ manoj ĉirkaŭprenis, kvazaŭ dispremante, la en teruro kaj malamo flamantan vizaĝon de la knabino. Iumomente la knabino ŝajnis al mi, ke ŝi estas ŝi. Kiel sovaĝa besto mi pro doloro tordiĝis en la lito, kaj ĝis tagiĝo mi travivis ĉian mal-

purecon, ĉian malnoblecon kaj ĉian kruelecon en mia koro. Kaj post kiam al mi tute malakriĝis la funkcio de l' cerbo kiel al idioto, mi falis pro lacego en la fundon de malluma dormo.

Mi timas min mem. Ĝis kie mi volas iri? Ĉu vi ankoraŭ ne reakiris sufiĉan sanecon por vojaĝi? Al mi ŝajnas, ke mi bezonas la gardanton kiel frenezulo. Se vi ne povos veni, mi iros al vi.

Mia koro, kiu jen ĉieleniras, jen terenfaligas la kapon sentas troan timon.

Timo — mi ĵus eksciis la veran signifon de tiu ĉi vorto „timo“.

Via A.

(De B. al A.)

Ŝiobara, la 18an de Oktobro 1912.

Kara A.!

Viaj leteroj depost la 20a de Septembro estis sufiĉaj inciti miajn nervojn, kiuj longe restadis trankvilaj kiel morta cindro. Mi eĉ sentis sencelan ĵaluzon al vi.

Ke vi vizitos Ŝiobara-n, neniom utilos por evoluigi la aferon. Se jam estas konite, ke ŝia familia nomo estas Kobajaŝi kaj ke ŝi loĝas en Koiŝikaŭa, mi kredas, ke mi vizitonte Tokion nepre povos ludi la rolon de la „kavaliro de l' rozo“. Tial mi telegrafis al vi hodiaŭ matene. Tuj kiam la cirkonstanco permesos al mi, mi forveturos al Tokio. La vorto „cirkonstanco“ signifas ankaŭ akiron de l' vojaĝelspezo. Al mi mono jam minusiĝis.

Ankaŭ mi intencas vin prezenti al sinjoro pastro; li estas almenaŭ unu el tiaj homoj, kiuj posedas sincerecon prediki kaj amike kondukti al siaj posteuloj.

Estas erare, se vi min demandas pri la kredo. Vi staras nun sur la pinto de l' vivdeziro, sed antaŭ mi

estas nenio krom la demando de l' morto. Mi ne toleras vin minaci kun miaj teruraj, paliĝintaj iluzioj — eĉ se mi havus forton renversi vian mondrigardon kaj vin fari pala pesimisto.

Elirante el samaj Alpoj, vi estas Rhejno, kiu dissemas sur siaj ambaŭ bordoj vinberojn kaj rozojn, dum mi estas Danubo nigra per taksusoj kaj cedroj. La homo havas solecon nur en sia fino. Tio estas kruco por la homo kaj samtempe fiero.

Antaŭ ĉio Dio estas ekzakta; sur lia vojo sin ne trovas eraro, ke li al ni ŝajnas tro senerara. Ke vi eksciis amon, estas decido de l' sorto, kiel mi jam al vi diris; tute egale, ĉu vi ĝojas aŭ malĝojas pri tio. Se mi estus diablo, mi eble ridus ironie, ke mi refoje estas superruzita, kaj se mi estus anĝelo mi krius halelujon plej laŭte.

Via troe plenigita vivo ĝisnuna ne allasis mian amikecon; sed vi nun havas malplenenon ne plenigatan. Via bonŝanco atestas, ke tiu ĉi malpleno estos tuj plenigata; sed, ke mi povos iel vin helpi eĉ nur momenton, estas granda plezuro por mi.

Kara A., al vi mi predikos pri moralo de l' amo: Ne estu prudenta, ne ŝanceliĝu, sed nur flamu; flamu kaj amu! Jen la tuto!

Via B.

(De A. al B.)

Tokio, la 22an de Oktobro 1912.

Kara B.!

Vi eble estas nun ankoraŭ en la vagonaro, kaj vin sekvante mi sendas nun al vi ĉi tiun leteron.

Kara B., por mi estis tiel malfacile kiel neeble, diri, ke mi kredas je Dio. Sed, mi nun kredas je Dio, preĝas al Dio kaj vivas per Dio; ĉar mi havas amon kaj Dio

ĝin plenigas. Kiu, kiam kaj kiel, povus supozi, ke mi ŝin vidos unue ĉe l' enirejo de la preĝejo, kien vi min kondukis? Mian tiaman profundan emocion vi ne povos eĉ imagi. Kiam vi ekrigardis min en tia kortuŝo, vi momenton ridetis; mi vin pardonas pri via rideto, sed vi eble ne scias, ke mi estis preskaŭ vin fraponta, kiam vi ŝin prezentis al mi, trankvile dirante: „Ĉu ĝi ŝi estas? Tiun ĉi fraŭlinon Kobajaŝi mi delonge konis.“ Tiam mi ne povis toleri, ke vi nian revidon, kiu por mi valoras super ĉio, tiel malĝentile traktis. Dum mi unuflanke travivis tian malagrabraĵon, mi aliflanke esploris, ĉu ŝiaj okuloj min memoras, almenaŭ min rememoras? Speciale elektite sola el kelkaj junulinoj kaj prezentite al mi junulo, ŝi ekmiris, hontiĝis kaj ruĝiĝis ĝis la oreloj, kaj kiam ŝiaj okuloj renkontis momente la miajn, mi ekstremitis, sentante strangan tremon, kvazaŭ mi estas superversata per malvarma kaj varmega akvoj samtempe. Ŝi min memoris.

Al mi estas, kvazaŭ mi iras en sonĝo, kiam mi rememoras, kio poste okazis. Mi tute forgesis, kion mi diris, kiam vi min prezentis al la pastro; mi nur memoras, ke mi lin trovis konfidinda. Kiam la kredantaro kantis himnojn, mi ploris pro ĝojo, sentante, ke la voĉoj de la homoj tuŝas unu la alian. Pensante, ke ŝi ankaŭ devas esti kantanta, mi ankaŭ volis tuŝi ŝian voĉon. Sed mia kanto estis subpremita en la gorĝo pro emocio. La prediko de l' pastro estis por mi enuiga. De tempo al tempo mi vin ŝtelvidis kaj miris pri via malvarmeco. Kian esprimon mia vizaĝo havis, kiam ni eliris el la preĝejo kaj vi silente donis al mi manpremon?

Mi vin dankas. Mi dankas ĉiujn estaĵojn. „Morto, kie estas via pikilo?“ Kiam mia mano estus metita sur la frunton de l' mortinto, ĉu li ne revenos reviviĝinte en

la mondon de l' amo? Mi kompatas tiujn, kiuj dubas je mirakloj. La universo estas nur bela turo konstruita el mirakloj, ĉu ne?

Sed atendu! Mi havas ankoraŭ multajn aferojn, kiujn mi devas fari. Vi elserĉis por mi ŝian (ne, de nun mi ŝin nomos per ŝia propra, bela nomo J.) adreson. Mi akiris unuan ŝlosilon, sed kiel mi povos akiri la duan, trian . . . kaj la sepan? Vi al mi rekomendas, skribi la leteron al fraŭlino J. Mi ne dubas ŝian bonvolon al mi, sed aliflanke malluma dubo estas algluita daŭre al mia kapo. Do, mi kompatinde ŝanceliĝas, komenci la unuan paŝon kuraĝan. Kien do sin kaŝis mia vigleco?

Malfermu, la plej bona vojo! Por tio mi petos kunlaboradon al ĉiuj, kiuj min helpos.

Kion mi devas fari por vi? Antaŭ ĉio mi al vi oferos ĉiun mian feliĉon superfluan.

Via A.

(De B. al A.) (poŝtkarto).

En la stacio Niŝinasuno¹², la 22an de Oktobro 1912.

Kara A.!

Mi nun refoje revenas al la monto. Jen vidiĝas malproksime la monto de l' aceroj ruĝiĝinta kiel flamo; kia hela, freŝa koloro, kiel la lampo antaŭ estingiĝo!

Por diri la veron, mi iom miris, ke ĝi estis tiu fraŭlino Kobajaŝi. Ŝi estas ankoraŭ knabino. Sed viaj okuloj eble vin ne trompas, ĉar la knabino estas la fetto de l' naturo kaj laŭ mia opinio ŝi estas fetto enhavanta ne malmulte da valoraĵoj.

Do adiaŭ! Mi nun veturigas ĝinrikion¹³ malrapide al mia loĝejo.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 3an de Januaro 1914.

Kara B.!

Ĵus ricevinte telegramon de vi, kiam mi estis manganta zoonion¹⁴ kun miaj familianoj, mi momente koleriĝis, sed samtempe trankviliĝis kaj ĝojis. Kie kaj kion vi faradis, depost kiam vi sendis al mi poŝtkarton el la stacio Niŝinasuno, la aŭtunon antaŭ du jaroj?

Tiam mi skribis al vi longan leteron respondante, sed ĝi revenis kun la slipo surskribita: „La adresito ne estas trovebla“ de la poŝtofiĉejo. Imagu mian miron tiaman! Mi tuj demandis la domposedanton per letero, sed oni ne respondis kontentige. Mi demandis pri vi ĉiujn lokojn, al kiuj vi havis ian ajn rilaton; sed al mi tute ne prosperis pri vi sciigi. Mi ĉiel pensis pri via malapero kaj pensis, ke vi revenis al via naskiĝloko malesperiginte pro neresaniĝo. Fine timante vian eventualan malfeliĉon mi rakontis pri tio al sinjoro G., sed li ridis. Kaj jam malkvietigite mi demandis la oficejon de la universitato pri la adreso de viaj gepatroj kaj al ili telegrafis demandante. Post tri tagoj oni respondis al mi telegrafe, ke laŭ onidiro ilia filo vivas, sed la adreso ne estas trovebla. Per tio mi trankviliĝis, sed samtempe la malkontenteco, kial vi perfidas eĉ mian amikecon, al mi plenigis la koron dolorigante. Ĉu vi ne ĝojis, eĉ se pro komplimento, ke la okazo min helpi venis? Malgraŭ tio vi vin kaŝis sen antaŭsciigo ĉe l' kriza momento plej grava.

La vintron, kiam mi revenis al Sendai, mi vizitis Ŝiobara-n por certigi la aferon. Kiam mi la domposedanton demandis, li respondis, ke la matenon de la 23a de Oktobro, vidinte, ke la pordo de l' enirejo de la domo, kiun vi luis, ne malfermiĝas, li miris kaj pro troa senbrueco en la domo li fine malfermis vespere kaj trovis,

ke vi jam estis forlasinta la domon. Okaze neĝis tiun tagon; oni sentis pikan malvarmon en la domo kaj mi trovis vintran vivon en la banloko sen bangastoj soleca. La ordema domposedanto estis ordaranginta viajn malnovan superjupon, botelon por insektmortigo, manuskripto-paperon kaj manĝilaron en unu angulo de l' ĉambro kaj sur tiuj aĵoj videble polvoj amasiĝis. Kiam mi tion ekrigardis, mi sentis nepriskribleblan solecon kaj silente staradis en la mezo de l' vasta, malluma ĉambro kun larmoj en la okuloj. Kaj tie mi ankoraŭfoje pensadis, kio al vi okazis; sed mi neniel povis kompreni, kion mi ne povis kompreni ĝis nun. Mi perdis tiel esperon, kiel forton, kaj piedirante sola tra neĝado mi revenis al la stacio.

De tiam dum unu jaro kaj tri monatoj vi silentadis kiel mortinto kaj vivadis nur en mia memoro.

Povas esti malbone, ke mi pro maltrankvileco de l' koro ne havis tempon pensi pri vi pli afable, dum kiam mi bone sciis, ke vi pro la tre senforta korpo kaj malluma direkto de l' pensado vivadis en malĝoja humoro, tamen, ke vi, nenion al mi anoncanta, vin kaŝis kaj silentadis pli ol unu jaron, al mi kaŭzis ne malgrandan solecon kaj maltrankvilon. Reveninte al Tokio, vi eble sciigis pri mia foresto el Tokio, miris kaj al mi telegrafis?

Kiel vi fartis de tiam? Mi jam ne povas koleri. Dum mi skribis ĝis ĉi tie, la deziro vin vidi post tiel longa silentado forte kreskis en mia koro.

Mi havas multe da aĵoj, pri kiuj mi volas paroli kun vi kaj demandi vian opinion. Sed, antaŭ ĉio, mi vin petas, sciigu min pri via vivo de post tiam, eĉ plej simple. Mi estas sana. Fraŭlino J. estas en Tokio atakite de pneŭmonio. Ni geŝanĉiĝis. Nian urbon Sendai mi ne povas forlasi dum kelke da tempo.

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 3an de Januaro 1914.

Kara A.!

Reveninte al Ŝiobara post disiĝo de vi, mi trovis, ke en la monto estas tre malvarme kaj tiea vivo ne estas bona por mia malsano. Krom tio mi sentis fortan malamon al mia malvigla vivo. La sekvantan frumatenton mi pakis mian malriĉan havaĵon kaj forvojaĝis al la insulo Ogasauĉara¹⁵ . . . antaŭ ol elĉerpigi la mono, kiun mi de vi ricevis.

Por vere ĝui kaj kompreni la solecon, mi min apartigis decide de ĉiuj miaj rilatoj. Por ke mi fariĝu sola, ĉesi la interkomunikiĝon kun vi estis la unua afero.

La insulo Ogasauĉara al mi plaĉis. Amaso da nuboj, kiuj matene kaj vesperè sidas kiel kotona ĉapelo sur la monto kaj malavare sin malaperigas tage kaj nokte, postlasante helbluajn ĉielon kaj maron. Pluvego kaj fulmotondro, kiuj kelkajn fojojn al mi ŝajnis ŝanĝi la insulon en drakon. Ondetoj kiel floroj ludantaj en la golfeto la trankvilajn tagojn. Aero peza, pura kaj iom dolĉa. Kiel nigra makuleto mi vivadis sola inter tiuj aĵoj dum unu jaro.

Iom post iom mia skeptikemo kreskis; sed mi pensas, ke mi nun pli multe kaptis „min“ ol antaŭe. Mi ne permesas al mi la provizoran rimedon supreniri la turon, kiun aliaj homoj konstruis. Kun tia penso, kun ses traktatoj, pri kiuj mi memfidis, ke ili enhavas nemalgrandajn iniciataĵojn, kaj kun iom plibonigita farto mi forlasis tiun rememorplenan insulon.

Ke vi ne estis en Tokio, estis al mi, kvazaŭ mi ne trovis stamenojn en la floro. Mi min sentas treege soleca.

Kiel fartas fraŭlino J.?

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 5an de Januaro 1914.

Kara B.!

Dum mi faris neniun meritplenan laboron, vi revenis al la ĉefurbo kiel la generalo triumfanta. Sed mi agrabligas nekompareble, ke via ora koro ree al mi revenis, pli ol granda merito de ses traktatoj.

Antaŭ ĉio mi vin gratulas kore pri via resaniĝo.

Mi nenion elfaris; sed mia ĉirkaŭaĵo ne malmulte ŝanĝis mian internon kaj eksteran konturon.

Car vi subite malaperis, mi travivis neatenditajn malfacilaĵojn por progresigi mian amaferon, kaj mi sola kiel malspertulo devis fari vojon tra ili. Mi eĉ konfuziĝis fari duan paŝon. Eble vi ne povos imagi, al kiaj mizera ŝanceliĝo kaj suferado mi humiliĝis; mi, kiun oni ĉiam konsideradis vigla kaj insistema. Tagoj pasis kaj pasis kvazaŭ kurante, sed ili nenion postlasis en mia koro krom bruliĝantan amflamon kaj pli kaj pli mallumiĝantan esperon. Preskaŭ ĉiun vesperon mi staris antaŭ la enirejo de l' domo de fraŭlino J. Sed, kiam mi vidis iun figuron similan al ŝi, mi tuj forkuris kiel ŝtelisto. Por mi estis nur unu sola konsolo, ke mi vizitis la preĝejon ĉiudimanĉe kaj ŝin vidis ne rimarkate de aliaj. Lastan Aprilon fraŭlino J. forlasis la lernejon kun bonega rezultato kaj de tiam ŝi ofte ne ĉeestis la preĝejon. Mi plie flamiĝis kaj suferis, kaj instigite de la nesubpremebla pasio, mi fine kuraĝis al ŝi skribi unuan leteron je la 12a de Majo, tago por mi neforgesebla.

La sekvantan dimanĉon mi vizitis la preĝejon kun la humoro de l' kondamnato je morto. Mi nur atentis, ĉu fraŭlino J. venas, dum kiam ĉiuj okuloj de la ĉeestantoj al mi ŝajnis penetri en la fundon de mia koro. Sed fraŭlino J. fine ne venis.

Tiujn tagojn mi estis tiel kaduka, ke mi sentis, ke mi tagon post tago malgrasiĝas; kontraŭe, miaj nervoj estis ekstreme streĉitaj, kaj mi min sentis pli streĉita hieraŭ ol antaŭhieraŭ, hodiaŭ ol hieraŭ. Mi suferis tiel, ke mi pensis, ke nenio restas por mi krom morti, se mi estos pli streĉata ol hieraŭ; sed la sekvantan tagon mi min trovis ankoraŭ vivanta, sed pli suferanta, kaj mi miregis pri tio. Okazis kelkfoje, ke mi min mem kompatis pri la infaneca pasio, kiu min tiel forte interesigis je unu virino kaj frotante al mi la brakojn, mi sentis larmojn en la okuloj. Mia deziro, kiu antaŭ la revido konsistis nur el tio, ke mi ŝin vidu nur ankoraŭ unu fojon, terure pligrandiĝis. Se ŝi jam estus promesinta kun la alia. . . En la momento, kiam mi tiel pensis, mi senkonsidere eksaltis eĉ antaŭ aliaj homoj aŭ en la nokto.

Laŭ mia karaktero mi ne povis krom ĝisiri ĝis la fino, eĉ se mi sukcesus aŭ ne, ĉar mi unu fojon jam ekinteresiĝis. Kaj mi riskis skribadi al ŝi tuj. Tiujn tagojn fraŭlino J. vizitis la preĝejon malofte, sed ne rigardante la sidejon por viroj eĉ momenton; ŝi ĉiam nur venis kaj nur revenis. Ŝi ankaŭ ne respondis al mi eĉ unu linion. Tial, fakte mi estus devinta senesperigi; sed mi ne perdis la esperon, ĉar en ŝia sintenado observata de malproksime miaj pliakrigitaj nervoj sentis iun certan reakcion. La vizaĝo de fraŭlino J. videble ekpaliĝis kaj perdis esprimojn kvazaŭ masko, tiel ke mi timis, ke ŝi koleras, kiam ŝi levis la kapon, kaj ke ŝi ploras, kiam ŝi ĝin mallevis. Mi eĉ penis legi signifon en ĉiu faldo de ŝia vesto kaj en ĉiu malligita haro. Ke ŝi ne estas indiferenta, estas certe; ke ŝi iom pripensas pri mi, estas ankaŭ certe. Do, kial ŝi tiel ŝanceliĝas? Ĉu ŝi ne estas en la stato, en kiu ŝi povas rekompenci mian amon? Tiel pensinte,

mi sentis kapturniĝon kaj plenan mallumon antaŭ la okuloj.

Tiel turmentite de ĉiaj maltrankviloj kaj afekcioj, mi apenaŭ sukcesis fari studjarfinan ekzamenon, kaj decide laŭ la letero sendita jam antaŭe el Sendai mi estis revenonta tien, kiam la pastro min venigis iutage. La pastro rakontis, ke fraŭlino J. lin vizitis antaŭ kelkaj tagoj kaj pro doloro, malkaŝante antaŭ li ĉiujn miajn leterojn, ŝi petis lian juĝon. Kompreneble mi ruĝiĝis. La pastro min admonis fervore, ke mi elektis malĝustan rimedon, kaj diris al mi kompateme kaj solene, kiel la koro de l' virgulino konfuziĝas per tia neatendita ektuŝo. Mi tiam sentis plian amon al ŝi. Li diris al mi interalie, ke mi komisiu al li solvon de tiu ĉi problemo, ke li ŝin demandos detale kaj ke mi atendu lian leteron reveninte al miaj gepatroj, ĉar li kompatas min koncerne la aferon kaj ne agos malbone al mi.

Mi lin ne obeis, sed lin petegis, ke li permesu al mi intervidon kun ŝi antaŭ li, se ne estas permesate, ke ni solaj intervidos. Ŝajnis al mi, ke la pastro iom ŝanceliĝis; sed fine li diris al mi, ke mi venu la sekvantan tagon.

La nomita tago estis la 28a de Junio. Fraŭlino J. jam tie estis, kiam mi venis, kaj tie mi trovis ankaŭ sinjoron prof. D. ne atenditan. La pastro intencis nin intervidigi ankaŭ antaŭ li; sed laŭ ties opinio estis decide, ke ni solaj intervidu en la aparta ĉambro.

Estis bela junitago, sed la ĉambro kun senornamaj, blankaj muroj en la preĝejo donis al mi iun strangan, dezertan impreson. Mi iris apud la fenestron kaj, apogante la manojn sur la fenestran kadron, mi staris rigida kaj ŝin atendis. Kvazaŭ ridanta moviĝeto de l' poplaj folioj ekster la fenestro ĵaluzigante altiris mian rigardon

kiel la danco de al mi fremda junulo plena je feliĉo. Tiam fraŭlino J. eniris sola en la ĉambron. Ŝia tuta korpo estis tiel rigida pro streĉo, ke ŝi eĉ ne povis tremi. Nur ŝiaj lipoj tremetadis je malgranda ritmo kiel ĉe agonianto. Ŝia dolorplena mieno estis tiel kompatinda, ke mi ne povis ŝin rigardi rekte. Mi nur denove povis senti forte, ke mi nun staras en pli grava krizo ol mi atendis. La streĉo trapenetranta mian tutan korpon min treege malvarmigis, kaj ĉirkaŭite de tiu malvarmo mia pasio flamis tiel turmentite kiel fajro kovrita per io.

Mi ne sciis, kion diri. Se ĉiu de ni jam konis tion, kion la alia volis diri.

„Ĉu mi povas konfidi al vi?“

Mekanike mi diris tiujn vortojn min riproĉante, kiajn mallertajn mi diras. Fraŭlino J., kiu mallevante la kapon staradis kiel statuo, nur respondis kun senesprima, mallauĉta voĉo: „Jes!“ kaj post kiam ŝi min fikse rigardis kun levitaj okuloj riproĉantaj, ŝi ankoraŭfoje turnis la kapon malsupren.

Por mi la vortoj de ni ambaŭ estis tre malkontentigaj. Mi pensis, ke mi ne atendis fari kaj diri tiel prozan aĵon. Sed samtempe tiu ĉi intervido, ŝajnis al mi, estas de la komenco ĝis la fino neplipurigeble sankta kaj bela ceremonio.

Mi simple rakontis al la pastro kaj sinjoro prof. D. pri ĉio, kaj tuj forlasis la preĝejon. Ĉio estis sonĝo. Mi estis kvazaŭ infano naskiĝinta 23jara en la mondon.

La afero min atendinta en Sendai estis tute alia. Pro tio, ke la malsano de mia patro pligraviĝas kontraŭ ĉies atendo kaj aliflanke por ordigi la familian financon, oni estis aranĝanta parencon interkonsiladon. Reveninte al

la hejmo mi rakontis al neniu pri fraŭlino J., ĉar la pastro kaj sinjoro prof. D. min tiel konsilis. Kaj dum kiam mi flegadis la patron, aliflanke mi ĉeestis la malagrablegan parencon interkonsiladon. Inter la parencon sin trovis ankaŭ tiaj, kiuj, klarigante al mi la aferon, antaŭdiris: „Vi, estante scienculo, vi eble ne povos bone kompreni tian aferon?“ Min tute tedis tiu ĉi interkonsilado. Estas tute nenecese, malfaciligi la aferon kiel ili. Estus pli bone, forvendi ĉiujn malfacile konservablajn posedaĵojn kaj aĉeti iajn obligaciojn. De l' komenco mi tiel opiniis, sed ili estis tiaj homoj, kiaj sin sentas kontentaj nur kontraŭstarante la alian.

Iun tagon mi iris promeni al la Kadan¹⁶. La rivero Hirose¹⁷ dividiĝas en kelkajn riveretojn kaj ili trankvile movas kelkajn akvomuelilojn. Kiel la nomo montras, la loko estas riĉa je floroj eble de l' malnova tempo kaj mi vidis tie kaj ĉi tie diverskolorajn, por varmega suno konvenajn florojn, florantajn inter la freŝaj verdaj aĵoj, kiuj ĵus etendis foliojn. Kiam mi vagadis tra la stratoj malproksimaj de l' urba centro en freŝa somero, penssonĝante nur pri fraŭlino J., subite mi estis vokata de iu ĝinrikiisto¹⁸ veturiganta gaston. Li min demandis pri mia domo, dirante, ĉu mi ĝin ne scias? Do, mialflanke ekzameninte la ĝinrikion mi trovis en ĝi virinon ĉirkaŭ kvardekjaran. Ŝia unua impresio min tuj malagrabiligis. Ŝi apartenis al tia tipo de Tokianino, kiu parolas kun lerta, kvazaŭ katoflata voĉo, sed de l' komenco malestimas la kunparolanton. Kiam mi respondis, ke mi estas la demandito, la virino videble miris, sed ŝajnigante trankvilecon ŝi rapide eliris el la ĝinrikio kaj diris, ke ŝi estas la patrino de fraŭlino J. Ŝi ankaŭ babilis pri sia filino kaj pri multaj aliaj aferoj, jen mallevante, jen ree levante la kapon en la maniero, al kiu

la virino kutimiĝas. Tio min ekmirigis. Kaj mi nur povis senti malagrablan senton, ke abomena formalismo rilate al la amo jam komenciĝis. Ĉar la virino diris, ke ŝi havas ion por paroli kun mi, mi antaŭ ĉio ŝin alkondukis al mia domo. Sed ŝia afero estis tia, kian oni estus povinta fari sufiĉe per letero. Ŝi ekzamenadis atente min kaj la staton de mia familio kaj post nelonge ŝi diris kun rido esprimanta kontenton, ke mi ŝin pardonu pri tio, ke ŝi sola venis, ĉar ŝia edzo ne povis veni kun ŝi pro iu afero; kaj simple salutante mian patrinon ŝi rapide foriris. Mi sentis netolereblan malagrablecon. Al mi ekŝajnis eĉ neracie, ŝin nomi mia bopatrino pro la geedziĝo kun fraŭlino J.

Du tagojn post tio la pastro min vizitis en Sendai. Nek mia patro, nek mia patrino kontraŭstaris mian edziĝon; sed mia patro proponis, ke mi prokrastu la edziĝan ceremonion ĝis Decembro. Kiel kaŭzon li nomis sian malsanon; sed nun rememorante, ke tiam al li mankis elspezo por mia edziĝo, mi kompategas mian patron suferintan pro tio en la malsanlito. Sed, ĉar la pastro insistadis, ke estus pli bone, ne edziĝi sen solena ceremonio, mi iris al Tokio, petinte prokrasti parencon interkonsiladon por unu semajno. Estis la 14a de Julio.

Poste al mi daŭris ĝojplenaj tagoj. Al mi estis donitaj ĉiaj okazoj; sekve mi ŝin karesis ĉiel, sed mi evitis komenci tiun rilaton, en kiun oni estas ordinare enkondukata per la edziĝa ceremonio. Kiam ni disiĝis ĉirkaŭ post unu semajno, ŝi malĝojiĝis kompatinde, kvazaŭ ŝi antaŭsentis ion malbonan. Min ankaŭ ĉirkaŭis stranga maltrankvileco; kaj tiu ĉi maltrankvileco min malagrabiĝis, ĉar ŝi rigardis nian estontecon kun ia ajn suspekto, mi laŭkutime ekkoleris kaj ŝin riproĉinte mi forvojaĝis de la stacio Ueno¹⁹.

En la vagonaro mi tre pentis, ke mi ŝin tiel severe
riproĉis. Mi pensis, pro kia neceso mi tion faris; sed
ĝi havis neniun kaŭzon. Kiom da fojoj mi deziris, tu
reveni al Tokio ankoraŭfoje kaj karese ĉirkaŭpreni ŝian
gracian kolon je mia brusto!

Poste, mi devis ree partopreni la bagatelan parencajn
interkonsiladon. La malsano de mia patro pligravigis ion
post iom kaj la 31an de Aŭgusto li fine revenis al la
koro de Dio de ni disiĝinte.

Kara B.! Mi nur povas beni la memoron al mia patro.
Li postlasis al mi diversajn aĵojn. Kvankam li estis
naskita kiel la filo de komercisto, lia karaktero havis tre
noblan flankon. Mi povas diri, ke li estas unu el la
disciploj de sinjoro Hukuzaŭa²⁰, kiuj komprenis tiun
superecon. Laŭ la karaktero de mia patro ŝajnas al mi
ke sinjoro Hukuzaŭa apartenis al tiaj homoj, kiuj staras
malproksime de la utilismo. Al mi ŝajnas, ke sentinte
severan malkonsenton kontraŭ la kavalirismo nomata
Buŝidoo²¹, seka kaj nenatura moralo, por kiu provincaj
kavariloj translokiĝintaj en la centron de la regno ĉe
Meiĝi-Monarĥiestarigo²² propagandis, li fariĝis amiko de
nekavalira klaso, sekve amiko de ilia vivo kaj profesio.
En la fundo, ĉu li ne estis genia idealisto? Ankaŭ
pri mia patro, kiu estis komercisto dum sia tuta vivo,
mi bone komprenis, ke laŭ lia agado komercisto
estis nur lia plej supra vivo. Mi ofte vidis ĉe li
Laŭce²³, Spinoza kaj „Kapitalo“ de Karl Marx. Li estis
ankaŭ tre stoika; mi ofte pensis, ke li tiel sintenadis
por subpremi troan pasion kaj sentemon. Mi scias, ke
li estis amata de kelkaj virinoj ĝis maljuna aĝo; sed
li ĉiam preterpasis ilin kun soleca trankvileco eĉ ne
flankenrigardante. Se mi nun lin rememoras, lia vivo
ŝajnas al mi kvazaŭ aŭtuna vento trablovanta tra la

ebena kampo trankvile kaj solece. Kia nobla, pura memoro!

Du tagojn antaŭ la morto mia patro malkovris ĉiujn siajn malsukcesojn en la financa flanko. Estas prave, ke la parenca interkonsilado konfuziĝis kaj en nenio interkonsentis. Per malmultaj vortoj, mia patro penis sola replibonigi la staton ĝis sia morto kaj pro tio neniu komprenis la veran staton. Lia financa vundo estis tiel granda, kiel neniu ĝin atendis. Estas eble nenecese skribi al vi pri tio, ke de du jaroj li suferis eĉ pro mia monata studelspezo. Tamen, malgraŭ tio li neniam montris maltrankvilecon en sia ĝisnuna vivo. Mi neantaŭzorgeme elspezadis pli multe ol la alia tian karan monon kun trankvila koro. Oni diras, ke mia patro diradis, ke nenio estas pli malbona ol malhelpi la disvolviĝon de junulo.

De la tago, en kiu mia patro mortis, mia mondo tute renversiĝis. Unu post la alia okazadis mizeraĵoj antaŭ miaj okuloj, ke mi deziris, ke mia patrino estu jam mortinta pli frue. Fine la loĝejo, fama pro fortika konstruado en tuta Sendai, devis esti aŭkciata. La pentraĵoj de mia patro tre ŝatitaj kiel „Kannono“ de Bakei²⁴, „Kverkarbaro“ de Rousseau kaj unu biblioteko da libroj, ĉiuj disiĝis al ĉiuj flankoj. Kiam mi vidis, kiel du profesoroj de Toohoku-Instituto²⁵ venis kaj en la malluma koridoro antaŭ la biblioteko disputadis kun organizantoj pri la kosto de „Kapitalo“ de Marx, ne tolerante mi subite ĝin forprenis de ili. Kiam mi rememoras la kruelan scenon okazintan en somermeza tago, al mi staras eĉ hodiaŭ larmoj pro malĝojo en la okuloj.

Poste estis decidate, ke ni, mi, miaj patrino kaj fratino, luan iun malgrandan duetaĝan domon konstruitan en la korto de iu parenco kaj transloĝigu en ĝin. Oktobro jam venis, sed mi ankoraŭ ne povis iri al Tokio por studi.

Mia zorgema patro ja postlasis muelejon al mia patrino en la nomo de iu maljuna servanto, kiu lin longajn jarojn servadis; sed por gajni monon por vivado per la muelejo oni bezonis, ke mi nepre restu hejme. Kompreneble mi ĉion skribadis al mia J. malkaŝe kaj ŝi tuj respondis el la fundo de ŝia koro. Mia amo al ŝi pli-grandiĝis iom post iom, ke mi min sentis dolorplena, kaj ŝi ankaŭ skribis, ke nia plua malkunesto ŝin povos malsanigi. Kiam mi eksciis, ke mia patro, kiu ne povis akiri monon por mia edziĝo, proponis prokraston de l' edziĝa ceremonio ĝis Decembro je l' preteksto de sia malsano, mi lin tutkore kompatis pri lia sufero kiel la patron, kaj ĉiam al mi staras larmoj en okuloj, kiam mi rememoras tion. Sed por mi la ceremonio havis neniun signifon, mi nur deziris kunvivadon. Okazis ofte, ke mi estis frenezigiĝonta sen mia J. Do, mi skribis al ŝi, ke ŝi venu antaŭ ĉio al Sendai. Tamen ne ŝi, sed la pastro al mi respondis. Estis eble en la mezo de Oktobro kaj jam estis iom malvarme. Laŭ tiu respondo mi eksciis, ke mia J. fine akiris pleŭriton kaj pneŭmonion samtempe kaj enlitigis de du semajnoj. La pastro unue skribis, ke li skribas anstataŭ ŝia patrino, ĉar por ŝi malklera tio estis iom malfacila. Mia J. nenion skribis al mi pri sia malsano eble timante, ke mi maltrankviliĝos. Mi min sentis, kvazaŭ mi estas la arbo, de kiu eĉ la lasta folio estas deprenita. Kio ajn estas skribita post tio, mi eble ĝin ne estus kompreninta, eĉ se mi estus leginta; do, ĝin ne leginte mi kiel eble plej rapide forveturis al Tokio. Mia J. tiel malgrasiĝis, ke ŝi ŝajnis al mi kvazaŭ alia homo. Niaj koroj alproksimiĝis unu al la alia, kvazaŭ ekzistus neniu en la mondo krom ni ambaŭ. Mi pasigis du tagojn ĉe ŝia malsanlito; sed, ĉar nek la reveno al Sendai kun ŝi, nek mia plua restado en Tokio estis

permesataj, mi devige disiĝis de ŝi. Post kiam mi revenis hejmen, min atingis ŝia kuraĝiga letero. Ŝi skribis, ke ŝi ĉiel penas por resaniĝi kiel eble plej baldaŭ kaj iri al Sendai, kaj ke mi miaflanke penu elhaki la vojon por la estonteco; kaj poste ŝi aldonis: „Mi timas pri l' opinio de mia patrino, ĉar mi ofte vidas ion malbonvolan al ni en ŝia parolo. Kompreneble ŝi ne proponas, ke ni rompu la fianĉecon, sed al mi ŝajnas, ke ŝi penas ĉiel nin apartigi. Sed kompreneble tio neniom konfuzas mian koron.“ Mi klare komprenis ŝian patrinon. Atendu! Atendu! Mi nepre elhakos mian propran vojon. Estu malbenata tiu, kiu deziras iel ajn malhelpi mian amon! Vidu, kiel terure tiu estos punata pro sia erara kalkulo! Mi decidis, neniam vidi ŝian patrinon ĝis tiam. Kaj deposte ĉiuj miaj penadoj estis oferataj por plibonigo de l' financa stato, por ke mi rabu mian J. triumfante de ŝia diabla patrino, trankviligu iom ajn la lastajn jarojn de mia patrino kaj plie eduku kaj klerigu mian solan fratinton.

La jaro pasis, dum mi ĉiutage vizitadis la muelejon kaj tie laboradis tute kovrita per farunoj. Kun kia soleca koro mi rigardis la vintrajn perspektivojn en la norda provinco, kiuj etendiĝas de l' polusa zono kvazaŭ manetendante! Sed por senkuraĝiĝi pro tio mi havis troan energion kaj fieracon, ankaŭ brilan esperon. Se mia fratino mastrumis iom pli ŝpareme, por malpezigi mian ŝarĝon, mi ne povis krom ekkoleriĝi kaj kriis. Sed en la fabrikejo mi laboris kiel eble plej forte kaj sentis la vivon de laborado agrabla. Por mi estis tre ĝustaloke, laboradi ŝvitplene, stari apud la enirejo sentante, ke varmegigita sango cirkulas tra la tuta korpo kiel varmega akvo tra la akvotubo, kaj esti blovata de l' vento miksiĝanta kun neĝo. Al mi eĉ ŝajnis, ke studado estas senutila. Kiam vespero venis, mi min ŝajnis vigla, ke ofte okazis, ke eĉ mia

patrino, kiu pasigis la tutan tagon malĝoja, laŭte ekridis. La amo inter patrino kaj filo, frato kaj fratino, kiu ĝis nun estis malhelpata de geservistoj, nun tute unuigis per nenio malhelpate, kaj ni tri subtenis la amon unu kontraŭ la aliaj kiel la tripieda kaldrono. Sed, eble ankaŭ tie estis iom da kaŝemo; kiam neĝa vento trablovigis skuante la domon kaj tie regis nokta malvarmo tiel severe, ke oni ne povis ĝin toleri per la forneto, ofte okazis, ke ĉiuj tri malgajiĝis kvazaŭ agorde. Ĉiu el ni tri havis apartajn pensojn kaj sentis solecon, kaj en tia okazo mia fratino ĉiam min demandis: „Kiel do fartas sinjoro B.?” Ŝi sopiris je vi, kiun mi povis nomi mia sola amiko. Mi senpacience ekkoleris: „Kia senhumanulo! Kiel ajn li fartus, tio min tute ne koncernas.“ Kaj en tiaj noktoj mi sentis ekscitiĝon eĉ dum preĝado.

Mia J. skribadis al mi de tempo al tempo mallongajn leterojn, kiujn ŝi eble skribis malgraŭ sia malbonfarto. Ŝiaj vortoj ŝajnigantaj trankvilecon min instigis aŭ al kompatemo, aŭ al ia malameto al ŝi, kaj iam mi eĉ pensis, alkuri al ŝi kaj ŝin ĉirkaŭvolvi per mia flamanta pasio ĝis ŝi sufokus; sed, kiam mi rememoris ŝian patrinon, mi tuj ekgrincigis la dentojn kaj returnis min irontan al la stacidomo.

Tia vivo ripetigis kaj pasis la jaron. Min ankaŭ vizitis la novjaro — malvarmega novjaro — en la norda provinco. Intencinte komenci la laboradon de la tria, mi manĝis zoonion tiumatene, kiam via telegramo min atingis.

Kara B.! Por mi via reveno ne estas tro malfrua. Vi ja revenis.

La nova vivo de malriĉeco min tute ne turmentas. Kun abrupta ŝanĝo de mia cirkonstanco multaj nekonataj mondoj disvolvigis antaŭ mi. Mi nun plene komprenis pri la fakto, ke ĉiuj aldonajoj de l' vivo kiel scio, kutimo, vestaĵo kaj manĝaĵo havas emon malhelpi reciproke.

alproksimiĝon de l' koroj, eĉ tute rifuzas tion je l' okazo kaj el ili nenio sentigas la homon soleca krom la aldonajo nomata riĉeco.

De kiam mi perdis ĉion, mi sentas en la koro kuraĝigon, ke mi mem estas ekira punkto. Mi neniel volas rezigni la deziron fariĝi scienculo. Sed mi sentas senfinan ĝojon pro tio, ke al mi estas aldonita la vivo, por nutri patrinon, eduki fratinton kaj konstrui kun mia edzino regnon, kvankam plej malgrandan. Tio estas la vivo, kies foreston mi ĝis nun sentis senkonscie. Se mi estus ŝargita pli peze, tiam mia ŝultro eble trovus pli trankvilan pozon.

Sed mi tre bedaŭras, ke mi nuntempe ne povas vin helpi ekonomie. Kiel mia patro mi volas sendi al vi iom da studelspezo, por ke vi studu ankaŭ por mi; sed pro malkapablo mi ankoraŭ ne atingis tiun staton. Ĉar ekzistas multaj, kiuj bedaŭras mian patron pri la bankroto, mi povus ion fari, se mi ilin petus; sed mi ne ŝatas esti kompatata de ili iel ajn. Mi ne volas kreski sub la kompatato al mia patro.

En mia lasta letero mi al vi skribis, ke mi ne povos viziti Tokio-n; sed mi nun ne povas alie: mi devas veni tien. Se eble, mi deziras vidi nur vin kaj mian J., ne vidonte ŝian patrinon.

Pri ceteraj aferoj mi rakontos al vi dum nia revido. Jam estas tagmezo kaj de nun mi iros al la fabrikejo por ekkomenci laboradon de l' nova jaro.

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 10an de Januaro 1914.

Kara A.!

La pastro konsilas kaj vi ankaŭ tiel insistas; do mi decidis, laŭ viaj konsiloj loĝi ĉe fraŭlino J. de hodiaŭ.

Por mi estas destinita ĉambro kun ok matoj²⁶ kaj fenestro kontraŭanta nordon; por mi ekzistas neniu skribĉambro, kiu povas sendi pli bonan lumon ol ĉi tiu. La pakajoj, kiujn mi enportis, aspektas speciale malpuraj. La unuan fojon en mia vivo mi travivas tiel trankvilan vivon.

En ĉiuj punktoj estis tre bone, ke mi iris al Sendai por vin vidi. Mia karaktero havas ian strangan econ timi alvenon de l' feliĉo. Mi ĝin ne timas en la senco, en kiu mallaboremuloj sekrete timas tro grandajn rekompencojn; sed ĝi devenas de tio, ke mi scias, ke feliĉo estas la masko, kiu povas eltrompi eĉ pli sinceran karakteron. Kiam mi staras rekte antaŭ la „vero“, mi povas senti tian agrablecon, kian mi sentas, kiam mi eltrinkas glason da malŝatata viĥo per unu tiro. Sed kiam mi devas taksi „veron“ kaŝitan post la feliĉo, mi sentas timon, kvazaŭ mi taksas la sorton mem. Sed en via modesta domo apud la rivero Hirose „vero“ ridetis ne portinte la maskon de feliĉo. „Vero“ ridetas, — la fakton, ke „vero“ ankaŭ ridetas kiel la homo, mi eltrovis en via hejmo. Kvankam ĝi estis via afero, mi ĝin sentis tre agrable. Via patrino, kia ĉarma patrino ŝi estas! Kia aminda virgulino via fratino estas! Kaj, kia sincera junulo plena je kreskemo vi estas! Tie, kie vi tri estas, ŝajnas al mi, ke eĉ la naturo refariĝas pratempa naturo.

Kompare kun la via la hejmo de Kobajaŝi montriĝas tute alia mondo. Ŝajnas al mi, ke la patro ĉiam vojaĝanta tute ne rilatas al la formado de l' familia atmosfero. La maljunulo, kiun vi vidis en Noboribecu, ŝajnas tre obstina, kiel vi diris, kaj estas tielnomata edoano. La karaktero de edoano kondiĉas havi bonecon en sia fundo. Sed ekstrema artifikado de l' karaktero kaj malantaŭenemo min malagrabiligas. Montri eĉ perforte viran fierecon,

nepre kontraŭstari la pli fortan kaj ĉiamaniere peni insistadi tion, kion oni jam komencis; la malforteco de lia karaktero ŝati tiajn malkarajn formalismojn kiel vivon mem, min kolerigas. La patrino apartenas al la tipo de l' plej malnoblaj virinoj. Ŝi estas flato mem, kaj je mia netolero la objekto de ŝia flatado estas ŝi mem. El ĉiuj ŝiaj hartruoj blinda deziro je plezuro vaporiĝas kaj ŝin ĉirkaŭas. Ĉu vi rimarkis eĉ unu el ŝiaj dentoj similaj al la ĉevaldentoj, kiuj aperas de inter ŝiaj nigretaj lipoj? Sed, kun malbeleco ŝi havas samtempe ian purecon kaj iam mi eĉ sentas ŝian karakteran subpremon. Fine, pri fraŭlino J. mi nur povas diri la vorton „miro“. Antaŭ ĉi tiu miro estas tute senkolora la miro, ke la naturo kreskigas rozon el la malbela koto. Ŝi, kiun mi antaŭe vidis, estis infano, nenio; sed nun ŝi estas virino kaj ĉio. Ŝia karaktero iradas la vojon, sur kiu neorganikeco transiras al organikeco, kun tiaj rapideco, lerteco kaj certeco, kiaj per la scienco ne estas kompreneblaj. Kiu povus solvi ĉi tiun enigmon briletantan en ŝiaj grandaj okuloj, kiujn vi je ŝi karakterizas? Mi estis konvinkata, ke la virino estas forĵetata de la trono de l' mistero per plenumiĝo de amo. Sed al mi ŝajnas, ke en sia malgrasiĝinta korpo fraŭlino J. enhavas senfinan enigmon kaj per ĝi sin turmentas. Tio sugestias pri plena karaktero de nun ekkreskonta.

Do, la hejmo de Kobajaŝi estas kvazaŭ konfuzita skatolo de Pandoro. Kia stranga bruo eksonus, se mi ĝin prenis en la manojn kaj skuus? Malkovri ĝian kovrilon ne povas eĉ pensi senkuraĝuloj.

Post tagmanĝo mi rakontis al la familianoj detale pri via familio. La patrino ŝajnis, kvazaŭ ŝi sentas doloron je la oreloj. Kompreneble fraŭlino J. min aŭskultis kun grandaj fervoro kaj intereso ŝajne de scivolemo. Kiam

mi rakontis pri via fratino, ŝia fervoro atingis la supron kaj kiel la komandanto aŭskultas la raporton de l' spiono, ŝi avida min demandis pri la vizaĝo kaj karaktero, ke mi eĉ sentis iom da malagrableco.

Laŭ mia propra travivo la malsano de fraŭlino J. ne estas tute trankvila. Estas nun treege malvarme en Tokio, kaj mi timas precipe la sezonon, kiam la nuna malvarmeco transiros en varmecon. Mi ŝin konsilis, esti ekzamenata antaŭ ĉio de D-ro B. Mi enmetante sendas al vi la tabelon de ŝia korpa temperaturo.

Mi decidis, okaze de l' vizito al Tokio liberiĝi de la eklezio. Unue: mi ne estas la homo, kiu povas prediki pri la kredo al aliaj homoj; la eklezio min ne bezonas. Due: mi volas liberiĝi de ĉiuj katenoj, kiuj la agojn de miaj animo kaj korpo malliberigas laŭ reguloj de la ekstera mondo. Mi ne bezonas la eklezion. Trie: por diri malkaŝe, mia kredo estis ebrio. Timinte tuŝi la fundon de mia karaktero, mi penis forgesi mian malplenecon per ebrio. Unuvorte, mia kredo estis tia, kiam oni devas redoni. Kvare: ĉu Kristo ne kaŝis sin 40 tagojn en la dezerto? Kun kia senhontemo mi, kiu ne havas talenton kiel Kristo, nek travivon kaj aĝon kiel li, povos kunesti kun la homoj trankvila? Kvine: mi eksentis sensencaj la faktojn, kiuj estas skribitaj en la Biblio kaj klarigataj de la eklezio. Por ke vi min ne malkomprenu, mi ĉi tie klarigas, ke mi neniel neas la misteron kuŝantan sur la fundo de ekzistado; sed mi nur volas jesi, ke neniu klarigo ĝis nun provita povis iel ajn klarigi ĉi tiun misteron. Mi volas diri, ke mi ne povas krom akre senti, ke mi vivas en ĉi tiu mistero. Sese: mi ne ŝatas esti taksata pli valora aŭ malpli ol mi estas. Ke mi estas ekleziano ofte kaŭzas, perforti alian al erara taksado de mia karaktero.

Mi trovis vian sintenadon en malriĉeco tre konvena je vi. Vi antaŭeniradas ne timante la donitan cirkonstancon kaj kaptas nemoveblan veron per aŭ longa, aŭ mallonga travivo. Malakreco plena je vigleco, indiferenteco enhavanta puran konskiencon — tiajn mi en vi vidas; sed miaflanke — mi fariĝis iom nepacienca . . . teda. Hodiaŭ mi ne plu skribos.

Per la pago de mia helpanteco en la instituto kaj per redaktado de „Oficiala gazeto de biologia asocio“ mia mono sufiĉas por studelspezo; bonvolu trankviliĝi.

Mi nun konsiliĝas kun sinjoro prof. F., por eldonigi en Germanujo unu el la traktatoj verkitaĵoj en la insulo Ogasauara. Sed mi ofte havas febron, kaj mi malĝojas, ke febro min ne forlasas tiel frue, kiel mi esperas.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 12an de Januaro 1914.

Kara B.!

Ke vi vizitis nian urbon Sendai, estis bone ankaŭ por mia familio. En vi, kiu ŝajnas obstina kaj nealproksimiĝebla, mia patrino tuj trovis ion akordiĝantan kun mi; mia fratino vin nur adoras elkore.

Kaj mi vin dankas pro tio, ke vi akceptis mian peton, loĝi ĉe la familio de Kobajaŝi. Kiam mi proponis tion, mi sentis grandan doloron pensante, ke vi devas vivi kun la abomena patrino de mia J. Sed mi pensas, ke mia J. vin rekompencos por tio. Tion, kion vi observis pri ŝi, mi ankaŭ estis dironta. Ŝi ja havas karakteron plene ekkreskontan. Sed pensinte, ke estas delikata demando, kiel tiu karaktero ekkreskos, mi ne povis ŝin lasi sola en tia familio. Mi tutkore esperas, ke ŝi sub via zorgado disvolviĝu laŭ la volo de l' naturo. Samtempe

kun la via mi ricevis leteron ankaŭ de mia J. Ŝi tre ĝojas pri via kunloĝado, sed ŝi ŝajnas senti ian timon pro tio. Antaŭ vi, kiu ne povus timi instinkte malkovri malfortajn flankojn de sia karaktero? Mia J. skribis ankaŭ pri mia fratino N., pri kiu vi al ŝi parolis, kaj aldonis, ke ŝi, de vi aŭdinte pri mia fratino N., sentas specialan amon al ŝi. Ŝi ankaŭ skribis, ĉu ne estus bone, se ni penadus edzigi vin kun mia fratino N. Mi nun komprenis, kial mia J. vin demandis detale pri N.

Mi bezonas vian pluan klarigon pri mia karaktero, kiun vi nomis nepacienciga. Ĉu ne ekzistas diferenco inter ni en tio, ke vi ĉiam vivas celante la estontecon, dum mi penas vivi plej bone en la estanteco? Mi pensas, ke plifortigi la fundamenton de l' muelejo kaj certigi la vivon de miaj patrino kaj fratino plej facile promesas al mi vigan laboradon en la estanteco. Mi certe estas malsaĝulo, kiu estante en la stato, en kiu mi povas uzi helpon de l' aliaj, tion ne faras. Sed mia tro obstina sincereco ne permesas al mi tion fari; nome, tio estas disvolvaĵo de mia karaktero ne fleksebla.

Anoncite de vi pri la kaŭzoj, kial vi forlasas la eklezion, mi sentas diferencon inter niaj karakteroj kaj ridetas. Eble mi ankoraŭ ne havas rajton diri grandaĵojn, ĉar ne pasis longa tempo de tiam, kiam mi apartenas al la eklezio; tamen mi kredas, ke, se vi liberiĝas de l' eklezio, vi devas ankaŭ ĉesi esti unu familiano, unu nacio de l' samaj kaŭzoj. Se mi havus forton, mi ne liberiĝus de la eklezio, sed penus tiom por ĝin rekonstrui, kiom mi povus; kaj se mi ne havus forton, mi amasigus forton iom post iom de ĝi ĉirkaŭite. Mi min ne retiros de la donita pozicio, ĝis kiam mi facile subigos la ĉirkaŭon. Estos eble bone por vi, liberiĝi de la katenoj de la eklezio. Sed por mi ekŝiĝo el la eklezio sen batalo nur

signifas la malantaŭeniron de mi mem. Antaŭ ĉio mi pensas, ke vin perdante la eklezio sentis grandan baton. Mi pri tio bedaŭras la eklezion.

La afero de l' muelejo iel eksukcesis. Post nelonge mi ĝin povos memstarigi. Nokte mi legadas librojn kaj precipe pri mendelismo; sed tiaj eksperimentaj libroj min ne kontentigas, ĝis mi atingos la staton, en kiu mi povas fari eksperimenton. Mi aŭdis, ke en la venonta Aprilo jara kunveno de l' zoologia instituto okazos post tiel longa interrompo. Mi esperas, ke tiam mi ankaŭ povos ĝin partopreni.

Mi vin petegas zorgi pri mia J. Estas netolereble, aŭdi ke ŝia malsano estas pli grava ol mi atendis. Mi okaze imagas ŝian morton, kaj tiam en tiu momento mia kuraĝo tute kuntiriĝas. Se mia J. mortus, por kio estis mia naskiĝo kaj mia ĝisnuna vivo? Mi ĉiel penas por ŝi, por ke ŝi resaniĝu. Kaj, se estus necese por tio . . . ho, sed, kion fari?

Eble mia J. havas sekretojn, kiujn ŝi ankoraŭ al mi ne malkovris. Ofte al mi ŝajnas, ke ŝi sin kaŝas okaze en la sekretojn eĉ tiam, kiam ni solaj persone interkompreniĝas unu la alian, ne parolante pri tiam, kiam ni interkorespondadis. Malkaŝdire, tio min ne kontentigas. La konscio, ke mi ĉirkaŭiras nur ĉirkaŭ la periferio de ŝia koro, estas netolerebla. Aŭ, ĉu ĝi estas ordinara afero por amanto? Antaŭ ĉio, mi devas eniri pli kaj pli en la fundon de ŝia koro. Mi eĉ pentas kelkafoje, kial mi ne kuraĝis tuŝi ŝian karnon? Ĉar mi eĉ dubas, ĉu niaj koroj interkomunikiĝas malhelpate de la apartigo de l' karno.

Estas nun plej malvarme; mi deziras, ke vi ankaŭ zorgu plene pri via sano. Ĉu vi ne laciĝas pro troa laboro? Ĉu la diferenco inter maksimuma kaj minimuma tem-

peraturo de via korpo estas pli malgranda ol tiu de mia J.? Se ne, mi opinias, ke estus pli bone, decidĉesigi la laboradon iom da tempo.

Hodiaŭ neĝas de mateno. Vespere ĉe reveno el la fabrikejo mi alparolis al iu maljuna laboristo. Li rakontis ke antaŭ jaroj oni povis vivi facile, se nur la rizo kostis malmulte; sed nuntempe, ĉu ĝi estas kara aŭ malkara, riĉuloj vivas facile kaj malriĉuloj malfacile; kion tio signifas? Kaj tiel dirinte li enpensiĝis. Oni diras, ke li havas malsaneman edzinon, diboĉeman filon, fidelan bofilinon kaj multajn genepojn. La statoj de l' laboristaj familioj estas ĉie similaj, sed mirinde mi estas devigata pensi pri la sorto de nur tiu ĉi unu el ili.

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 14an de Januaro 1914.

Kara A.!

Vi diras, ke vi penas vivi plej bone en la estanteco kaj ke mi antaŭeniras celante la estontecon.

Povas ŝajni, ke vi estas grandanima konsumanto de la estanteco kaj mi ŝparema rezervanto de la estonteco. Mi mem esperas, okaze tia esti. La scienculo devas plenumi la devon esti rezervanto por la estonteco.

Sed kion fari kun tio, ke mi estas nesatigebla konsumanto?

Unuvorte, la homo estas aŭ konsumanto aŭ produktanto. Al la konsumantoj apartenas du tipoj: unuj, kiuj konsumas por produkti kaj la aliaj, kiuj konsumas por konsumi. Al la produktantoj ankaŭ du tipoj: unuj, kiuj produktas por konsumi kaj la aliaj, kiuj produktas por produkti. Vi apartenas al la plej racia tipo, kiu produktas por konsumi; sed ŝajnas al mi, ke mi fine ne povas esti

krom diboĉulo, kiu konsumas por konsumi. Per aliaj vortoj, mi estas plena egoisto en la fundo kaj se mi havas ion, kio povus utili por la homaro, tio eble nur estus, ke la homaro povas atesti per mia konsumado, kiom ĝi ĝis nun rezervis.

Tipa grupo de konsumantoj por konsumi estas la artistoj. Unuvorte, ili estas potencaj konsumantoj el la homaro kaj en tiu ĉi punkto mia karaktero havas ion, kiu estas komuna kun la artistoj.

Jam tiel naskite, mi deziras fari tian diboĉadon, ke mi elkonsumas la tutajn provizaĵojn, kiujn la homaro dum milionoj da jaroj amasigis.

La entrepreno produktas kaj la arto konsumas. En tiu ĉi senco Dio estas la plej granda entreprenisto kaj la diablo la plej granda artisto.

Mi transiru al alia temo.

Vi havas ne malgrandan estimon antaŭ la moderna scienco. Mi malestimas la memkontraŭdiron de l' moderna scienco.

La scienco deklaras, ke ĝi klarigas la veron, kaj por diri la veron ĝi nur ordigas la faktojn.

Ĉu la ordigitaj faktoj estas la vero? Se jes, en la kartujo de la biblioteko sin kaŝus la plej alta vero.

Kiam la scienco malsupreniros de la uzurpita trono kaj portos ledan laborveston kaj martelon, nur tiam ĝia aŭtoritato naskiĝos; ĉar, per malmultaj vortoj, la scienco estas nur servanto de praktika vivo, kiu produktas por produkti. Kiel la ordinara laboristo havas fortan korpon kaj obeemon, tiel la scienco havas klaran kapon kaj bonan paciencon. Same kiel la ordinara laboristo, la scienco ne scias, kion fari kun ĉiuj siaj produktaĵoj. La ordinara laboristo laboras en la fabrikejo. La laboristo de l' scienco laboras en la laboratorio.

Mi estas nuntempa scienculo, certe ne granda. La scienco liveras al mi panon, laŭpartan scivolemon kaj okaze enuan tempon kaj manieron de konsumado. En la nomo de l' scienco mi povas liberiĝi de la devo pripensi, kio estas la postuloj plej proksimaj al la homa vivo kaj min okupi je la demandoj nur instigantaj mian scivolemon, kaj ju pli malproksimaj tiuj demandoj estas de la plej necesa postulo de l' homa vivo, des pli laŭte oni emfazas mian scienculecon.

Sed mi ne povas kontentiĝi esti tiagrada konsumanto. Se konsumi, mi volas konsumi malkaŝe. Mi ne ŝatas konsumi trompante. Leginte vian leteron mi eksentis deziron skribi al vi tian leteron. Plue mi skribados en la sekvanta letero.

Via B.

(De B. al A.)

Tokio, la 15an de Januaro 1914.

Kara A.!

Atakite de pli alta febro ol kutime, eble pro malvarmumo, mi hieraŭ ne vizitis la laboratorion kaj estis zorgata de fraŭlino J. diversmaniere. Kaj, ĉar ŝia patrino forestis — pro vizito al prapatraj tomboj (kia memtrompo!) — mi ambaŭ interparolis iom pli intime ol ordinare.

Unue mi konsilis al ŝi iom tro severe, malfermi ŝian tutan koron kaj ĝin montri al vi. Fraŭlino J. min rigardis kvazaŭ dubante kaj plendis, ke kontraŭe vi estas, kiu ne malfermas sian koron. Trovante en mi malsaĝulon metitan inter geamantoj, mi ne povis krom maldolĉe ridi.

Kiam mi estis en la insulo Ogasauara, mi dufoje al ŝi sendis anonimajn leterojn, pri kio mi ankoraŭ al vi ne rakontis. Tio okazis, kiam la rilato inter vi ambaŭ ankoraŭ ne estis difinita. Do, antaŭ ol ŝi ricevis vian

unuan leteron, fraŭlino J. jam sciis pri via konturo kaj intenco. En la hieraŭa interparolado ŝi diris, ke ŝi tuj sentis intuitive, ke mi skribis tiujn anonimajn leterojn. Je mia demando, de kio ŝi tion eksciis, ŝi respondis, ke tian aferon povas ekkompreni eĉ homo sencia kiel ŝi kaj min rigardis fikse kaj malafable per siaj sentemaj okuloj.

Kompreneble vi jam scias pri la fakto, ke fraŭlino J. ne estas filino de tiu abomena patrino, nek de tiu patro; sed tion aŭdinte hieraŭ unuafoje, mi ne malmulte miris. Laŭ ŝia elkora rakonto mi povas klare imagi ŝian estintecon. Unue mi vidas malgrandan vaporŝipon forveturintan de Osako²⁷ al Tokio. Mi vidas en unu angulo de ĝia triaklasa ĉambro junan, de sia edzo forlasitan virinon, kiu kuŝas surventre sur la planko tute senkonscie, kiel la animo vaganta tra la transmorta mondo. Mi vidas unu animeton jam stampitan per la malĝojo de vagado en ŝia ventro. Mi imagas la — je laco kaj malĝojo plenan — cirkonstancan de la laboristino, kiu en la plej profunda fundo de maltrankvileco kaj konfuzo de la urbego Tokio ĝemante vendas sian mallertan laboron. Mi vidas grandkapan, malbelan infanon, kiu nur post la noktmezo povas suĉi el mamoj nesufiĉe liverantaj lakton kaj poste ekdormas. Mi aŭdas kortuŝantan kriegon, kiun la infano eligas, kiam ĝi estas transdonata kvazaŭ aĵo de sia patrino al sia onklino. Kaj nun antaŭ miaj okuloj staras la figuro de fraŭlino J., kiu el tiu velkonta ĝermo fine elkreskis virino. Mi unuafoje povis kompreni la kaŭzojn de ŝia kaduka konstitucio, profunda koro kaj malgajeco, kiu ofte ŝin atakas kaj ŝin faras soleca kaj bela kiel aŭtuna nebulo.

Per la malkovrado de ŝia estinteco tia, mi nun kvazaŭ rekonsciiĝis eĉ se malfrue. Dum vi povas doni ĉiujn konsolojn al ŝi, mi devas esti konsolata de tia homo;

mi miregis pri la diferenco inter niaj sortoj. Mi tre bedaŭras ankaŭ pri tio, ke la scienco ne povas trakti tian gravan aĵon de l' homa vivo minimume tiel, kiel mallerta instruisto traktas la korojn de lernantoj, kaj senkonscie mi skribis al vi lastanokte leteron.

Sed estas treege ĝojinde por mi, ke mi per kono de ŝia estinteco povis ekscii, ke fraŭlino J. ne ricevis sangon de sia tielnomata patrino. En la lastaj tagoj nenio min sentigis tian ĝojegon kiel ĉi tio.

Malkaŝdire, mia estinteco havas ankaŭ ion, dank' al kio mi precipe kompatas la ŝian. Tamen, pri tio mi ne rakontas eĉ al vi. Estas neniu kaŭzo por malkovri malfeliĉon de homa vivo kaj mallumigi tiom la homan vivon.

Ankoraŭ hodiaŭ mi ne povas ellitiĝi. Por mi malsanulo estas la malvarmo kvazaŭ penetranta. Fraŭlino J. min flegas kun amikeco, kvazaŭ ŝi forgesis pri sia malbonfarto. Mi timas, ke tio estas nebona por ŝia malsano.

Granda vivo forfluas fortege. Kia terura, sed kuraĝa bildo! Ĉu mi devas resti kiel flanka rigardanto ĝis la fino? Aŭ, eĉ se mi enirus en ĝin, ĉu mi baldaŭ malaperos kiel ŝaŭmoj pro malforteco de l' korpo?

Bone, estus bone!

Mi salutas viajn patrinon kaj fratinton N.

Via B.

(De B. al A.)

Tokio, la 3an de Februar 1914.

Kara A.!

Fraŭlino J. kreskadas ne bezonante kuneston de homo kiel mi. Kaj mia kunestado malutilas por ŝia farto. Timante, ke ŝi infektigos de mia malsano, mi ĉiam sentadas maltrankvilecon. Do, de la lasta tempo mi kelkajn fojojn konsiliĝis kun vi pri mia transloĝiĝo. Vi tion ri-

fuzis. Sed hodiaŭ neatendite la pastro min vizitis kaj konsilis min pri transloĝiĝo. Mi ne scias, ĉu tion kaŭzis mia liberiĝo de la eklezio aŭ alia afero? La pastro nur pretekstas la konvenecon. La plej malsincera vorto! Sed estas vi kaj la pastro, kiuj unue min konsilis pri la transloĝiĝo ĉi tien. Tial mi vin demandas ankoraŭfoje, kiel mi devos agi.

En ĉiuj punktoj mi ne povas diri, ke fraŭlino J. pli bone fartas. Iam mi vidis kavetojn en ŝiaj delikataj manoj kaj ankaŭ inter la fingroradikoj, sed lastatempe ili ĉiuj malaperis. Ofte al mi eĉ ŝajnas, ke ŝi, timante rompiĝon de l' kaduka korpo per la forto interne superfluenta, ne povas elporti malgajecon. Mi vidas, ke vi lastatempe pli malofte al ŝi skribas, kaj tio ŝin malcontentigas. Vi devas skribi al ŝi kun ĉiuj viaj pasioj, kompatoj kaj konsoloj.

Ĉu vi povas imagi, ke al ŝi en la okuloj staras larmoj de soleco? Estas tiel kompatinde, ke eĉ mi tion apenaŭ povas elporti. En la kontraŭa proporcio al ŝia sano, mia farto lastatempe pliboniĝas iom post iom. Mi pasigas tutan tagon en la laboratorio kaj laboradas kiel la leono . . . efektive kiel la leono. Mi volas subteni de Vries, kontraŭstarante la kontraŭparolantojn de l' mutacia teorio. Por mi subita vario, kiun de Vries insistas, estas ebla. Mia interna postulo min igas kredi je tio. — Ĉu vi malestimas mian nesciencan sintenadon elirintan el mia antaŭopinio? Sed estis neniu kredanto de nova teorio, kiu ne havis antaŭopinion kiel mi. Aŭtobiografio de Darwin plej bone rakontas pri tio. Kiam li estis sugestita de la fenomeno de disvolviĝo de vivantaj aĵoj, lia eksperimento ankoraŭ ne atingis la gradon, lin igi supozi pri ĉi tiu riska afero — krom tio, mi kredas, ke mi povis kolekti iom da kredindaj faktoj utilaj por

de Vries ankaŭ inter la faŭno. Forgesante sciencistan konsciencon kaj riskante neon de l' fakto, mi kompreneble ne kuraĝas defendi sugeston. Sed, ke la hipotezo de subita vario estos akceptata, kaŭzas al mi pli grandan kontenton de l' karaktero ol scienca venko.

Estis decidite, ke mia traktato estos publikigata en Germanujo.

Kun ĝojo kaj danko mi ricevis la monon, kiun vi donacis al mi el la profito de l' muelejo. — Divenu, amiko, kia mirinda fenomeno okazis tiun vesperon! Mi revenis hejmen tenante pupon en la brakoj kaj ĝi ornamis la nezorgitan malsanliton de fraŭlino J. kiel via donaco.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 5an de Februaro 1914.

Kara B.!

La nekomprenebla memdecido de l' pastro min mirigas. Kompreneble mi ricevis de vi simplan leteron; sed en ĝi vi nur skribis, ke, ĉar vi kaj mia J. havas saman malsanon, via kunloĝado ĉe ŝi estos danĝera por ambaŭflanka sano. Tio ne havas kaŭzon esti denove preparolata, ĉar ni sciis pri tio jam antaŭ via transloĝigo ĉe ŝi. Eble la pastro havas iun kaŭzon, kiun li ne povas malkovri antaŭ mi. Antaŭ ĉio estas mallaŭdinde, ke li sola vin konsilis min ne demandante. Kompreneble mi ne neas, ke sensecaj preparoloj atingis ankaŭ miajn orelojn. Sed tiuj, kiuj paroladas pri tio, estas aŭ malsaĝuloj aŭ degenerintoj, kaj mi deziras, ke vi loĝadu ĉe Kobajaŝi eĉ nur pro tiaj malsaĝuloj kaj degenerintoj. Mi konas pli grandan, pli belan amikecon.

Vi diras, ke mi pli malofte skribas al mia J.!? Vi eble pensos, ke mi vin reatakas; sed kontraŭe mi volas

plendi pri tio. Antaŭe ŝi al mi skribadis preskaŭ ĉiutage, kvankam mallonge, kaj en ŝiaj leteroj estis enteksitaj naiva sentimento kaj brila espero. Kiam mi revenis de la fabrikejo je la krepusko, mi kutime sidiĝis antaŭ la skribotablo, por „studi pri letero“ kiel mia fratino diris, kaj forgesis la zorgon en tiu tago. Kiam mi vizitas la fabrikejon, mi eksentas forton; kiam mi vidas la patrinon, mi eksentas kompaton al ŝi; kiam mi vidas la fratinton, mi eksentas varmon; kaj kiam mi vidas leteron, mi eksentas amon. Kaj mi sciis, ke amo estas ŝtonego taŭga por fundamento de ĉiuj spiritalaj funkciadoj. Tamen, la leteroskribado de mia J. fariĝis lastatempe tre senorda. Iun fojon tri poŝtkartoj min atingis samtempe kaj alian fojon al mi alvenis peza letero kun du poŝtmarkoj. Sed inter ili mi devas vane atendi du aŭ tri, kelkfoje eĉ kvar aŭ kvin tagojn kun malagrabra, senpacienca koro. Krom tio, je plua malbeno kaj je mia miro, eĉ via letero ne alvenas por min konsoli, kiam mia J. ne skribas. Eble vi ne povas imagi mian maldolĉan mienon de tiam, kiam mi ne ricevas leterojn el Tokio. En tia okazo mi sidiĝas antaŭ la skribotablo kaj kolektas literojn de la eklegita libro, sed inter la literoj estas intermetataj strangaj vortoj tute senrilataj al la libro kaj komenciĝas mirinda iluzio. Sentante malbenon mi enlitiĝas, sed tie min atendas terura maldormo kun brilantaj okuloj kaj enbatadas angulajn najlojn en mian cerbon.

Estas hodiaŭ jam tria tago, depost ŝi ĉesis skribi. Ŝia lasta letero enhavas jenajn liniojn:

„Ŝajnas al mi, ke en mi ekvekiĝis la memkonscio, pri kiu vi paroladas. Sed ĝi ne estas plezura aĵo kiel vi diras, sed nur terurega. Ĝis nun mi pensadis, ke mi konsistas el amaso de ĝisnunaj kutimoj, sed lastatempe

aperadis de tempo al tempo io, kio perfidas mian kutimon. Kie ĝi sin kaŝis ĝis nun? Ĉu ĝi sin kaŝis de komence sendepende de la kutimo, aŭ poste eniris en min, kiel Mario gravediĝis de la Sankta spirito? Lastatempe mi ekkomprenis la koran suferon de Sankta Patrino, kvankam malklare. Kio el mi fariĝos poste? Ŝajnas al mi, ke antaŭ mi iom post iom malheliĝas. Pensante, ke eĉ vi ne komprenas plene mian tutan pensadon, mi min sentas maltrankvila. Vi estas pli bona kaj pli aminda homo ol Jozefo. Mi . . . ho, kian teruran memkonscion mi ekkonscios! Ĉu mi devas malfermi larĝe la okulojn? Jes, vi ordonas tion fari. Mi ne malfidas al vi. Sed mi sentas grandan timon.

Mi refoje enlitiĝis. Sinjoro B. tiel diligente studas, ke li ne revenas, antaŭ ol lampo eklumas. Supozinte lian laciĝon mi kelkajn noktojn elleviĝis kun peno kaj faris al li nigran teon, sed li estas tiel diligenta, ke li nek diris dankon, nek levis eĉ la kapon. Kaj ofte okazis, ke trovinte la sekvantan matenon ne prenitante teon kun naĝanta polvo sur lia skribotablo, mi ekkoleriĝis. Sed estas strange, ke li bonfartas, kiam mi malbonfartas kaj mi sentas bonfarton, kiam li malbonfartas.“ —

Kompreneble mi povas imagi, ke ŝi sentas doloron de transira tempo, en kiu ŝi estas nek knabino, nek virino, sed fariĝos homo. Sed, kial ŝi diras, ke mi ŝian pensadon ne komprenas? Kial mia J. ne gustumigas siajn ĉiutagajn dolorojn ankaŭ al mi? Tio min treege malkontentigas. Mi scias, ke vi estas okupita; sed en tiu ĉi okazo mi vin petas ŝpari iom da tempo por helpi ŝian reviviĝon. Mi instigis mian J. al memkonsciigo. Mi nun ekscias, ke mi ŝin instigis al io, kiu estas super ŝia forto. Sed, nun mi jam ne povas reveni al ekira punkto. Mi min vidos pli forte kaj efektivigos mian

celon, al kiu mi ŝin instigis. Mia koro ne trankviliĝos, antaŭ ol mi atingos la fundon de la koro, kie la animoj de ni ambaŭ ĉirkaŭprenos unu la alian. Rubikono estas jam transpaŝita. Mi ne postenrigardos. Mia J. ankaŭ ne povas ankoraŭ rigardi malantaŭen. Ni staras en la krizo kaj mi deziras, ke vi komprenu tion.

Sed, kian solecon mi sentas ĉi tiun nokton! Ekster la fenestro brilas hela lunlumo. Malgraŭ malvarmeco mi plene malfermas la fenestrojn kaj aŭdas la bruon de l' rivero Hirose ludanta en granda kriptomerio en unu angulo de la korto. Solena bruo de l' akvo penetras tra la ŝeloj de kelkcentjara granda kriptomerio. Mia patrino enlitiĝis ĉi tiun nokton jam frue. N. eble kudras ion en la apuda ĉambro, de tempo al tempo sonas ŝia tondilo malvarme. Depost kiam ŝi min demandis antaŭ nelonge trans la interĉambra pordeto: „Kara fraĉjo! Ĉu la karbo estas ankoraŭ arda?“ ŝi nenion diris. Eble ŝia juna koro ankaŭ pensadas pri io.

Ho, kion do fari?

Vi laboradas? Vi laboradas venkante la malsanon kiel la leono? Mi ankaŭ laboras. Mi ankaŭ laboros venkante maltrankvilecon, kiu mian koron atakadas. Jes, mi laborados. Mi ne estas Roberto de Schiller, sed laborados, ĝis mia tempio sangigōs.

Antaŭ miaj okuloj aperadas via figuro laboranta: Vi rigardas libron tra ferkadraj okulvitroj, envolvite laŭkutime per ruĝa lankovrilo. Vi povas ridi, sed en miaj okuloj nun staras larmoj.

Kia luma lunbrilo!

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 6an de Februaro 1914.

Kara A.!

Do, mi restos ĉi tie laŭ via decido.

Mi ne batalas kontraŭ la malsano, sed kontraŭ la sorto. Vi estus feliĉa, se la tempo ne venus, kiam vi rememoros ĉi tiujn multmemajn vortojn.

Mi deziras, ke vi ilin ne ekkomprenu!

Mi aŭdis, ke antaŭ tagoj fraŭlino J. al vi skribis, kiel bone estus, se mi edziĝus kun via fratino, fraŭlino N. Mi lastatempe ekpensis pri tio serioze. Ĉu vi havas intencon, edziniĝi vian fratinton je homo kiel mi?

Mi rifuzis publikigi mian traktaton en Germanujo, ĉar mi mem eksentis naŭzon je mia bagatela vanteco. Kio ja estas entrepreno de l' homo? Kiel ajn granda ĝi estus, la entrepreno estas turo sur la sablo, kiu kun la terglobo pereigās kaj malaperas nenion postlasante.

Do, ĉar mi tiel pensas, certe estos granda, interesa ironio por la sorto, ke oni skribas traktateton iom originalan kaj pri tio fierigās.

Vi ne estas prava, postulante de fraŭlino J., ke ŝi tiel ofte skribu. Pro severa malvarmeco en Tokio fraŭlino J. tre suferas. Mi ankaŭ ne ĉiam legadas, sed ofte interparolas kun ŝi pri seriozaj aferoj kaj tiam mi nur miras pri ŝi.

Diversaj fortoj faras miraklon en la koro de l' viro, sed en la koro de l' virino nur amo faras tion. Se mi komparas ŝin sidintan kiel pupo antaŭ tri jaroj en angulo de l' dimanĉa lernejo kun ŝi nuntempa, mi denove sentas deziron krei, ke la aŭtoritato de l' scienco estas nenio.

Antaŭhieraŭ la patro de fraŭlino J. subite hejmenrevenis kaj hodiaŭ matene li jam malaperis. Saĝeta viro

kiel makleristo. Sed li al mi ne sentigas malagrablecon kiel la patrino. Ho, unika estas la malvarmeco, kun kiu ŝi lastatempe kondukas al mi! Tio estas alia kaŭzo por tio, ke mi sentas deziron, loĝadi ĉi tie.

Via B.

(De B. al A.)

Tokio, la 7an de Februaro 1914.

Kara A.!

Mi sentas naŭzon kontraŭ la ironiulo sin kaŝanta en mi. Kun honto mi al vi proponas, nuligi ĉion skribitan en la lasta letero. Ankaŭ permesu al mi, profunde pripensadi pri la edziĝo kun fraŭlino N. ankoraŭ unu fojon. Mi min malamas, ekstreme malamas. Kial mi ne havas kuraĝon rigardi la veron de fronto? Fraŭlino J. ankoraŭ ne matenmanĝis. Kiam mi ŝin ekrigardis, ŝi ŝajnis esti ploranta.

Antaŭ la vizito de l' laboratorio.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, nokte la 8an de Februaro 1914.

Kara B.!

Leginte viajn leterojn skribitajn la 6an kaj la 7an, mi ne scias, kiel mi devas kompreni la nunan staton de via koro. Mi nur povas supozi, ke antaŭ ĉio en via koro okazis terura batalo.

Sed estus pli preferinde, malkaŝe diri al vi tion, kion mi deziras, ol supozi pri vi laŭ mia fantazio. Kiam vi skribis al mi pri N., mia koro ekbategis, kvazaŭ mi mem estas virgulino demandita je edziniĝo; sed tuj poste mi eksentis malesperon. Por mi ŝi estas tiel aminda, ke mi povas ŝin pardoni pri kio ajn. Aŭdinte pri vi, ŝi

jam vin amis, antaŭ ol vin vidi. Depost kiam ŝi vin vidis, ŝi vin eĉ adoras, kiel mi jam skribis al vi pri tio. Ŝi estas tre simpla kaj pro tio ŝia simpla, diafana koro povas nur amegi la intiman amikon de sia frato pli forte ol sian fraton. Ŝi kompreneble bone scias, ke ŝi ne estas homo konvena por vi. Tial ŝi eĉ ne unufoje malkovris al mi sian koron vin amantan. Ŝi kvazaŭ enfermas vian rememoraĵon en la plej profunda kaj sankta anguleto de sia koro kaj sufiĉe kontenta je favoro tiomgrada, ŝi ĉiam laboradas vigle. Se oni ne rigardus ŝin per la okulvitroj de amo, eble eĉ por Dio estus malfacile, malkovri sekreton de ŝia koro. Mi ne estas Dio; sed ŝin amante pli forte ol ĉiuj aliaj mi povas travidi ĝis la fundo de ŝia koro kaj des pli ŝin kompatas. Por mi estas tre kompatinde, ke ŝi sen memfido kredas je tio, ke ŝi kiel via edzino ne estas sufiĉe saĝa kaj klera, nek prudenta, nek bela ktp. Kaj pli kompatinda estas ŝia koro, ĉar ŝi pensas sin oferi al vi tiel animon kiel ankaŭ korpon pli kore ol ĉiuj aliaj virinoj. Kiam mi okaze priparolas pri vi al mia patrino, ŝi, kiu apud ŝi ion kudras, senkonscie ĉesigas kudri kaj aŭskultas ravite mian parolon; mi pensas, ke tiam ŝian vizaĝon eĉ vi trovus bela.

En mia lasta letero skribinte nur iom pri mia fratino N. mi ĉesis, ĉar mi pentis, ke mi tro fiere skribis; ĉar mi ekmemoris, ke vi havas sufiĉan forton kaj indon edziĝi kun virino pli supera ol mia fratino N., se ne estas konsiderata la forteco de ŝia amo al vi. Mi firme kredas eĉ hodiaŭ, ke ŝi ĝin rifuzos, se vi petus ŝian manon. Kaj tio estas prava. Sed, ke tio estas prava, neniom malgrandigas mian kompaton al ŝi, ĉar neniu virino komprenas pli bone ol ŝi, kiel ami sian amaton.

Por kio mi skribis tiel? Jes, ĉar mi deziris, ke vi komprenu ŝin kaj montru iom da simpatio al ŝi. Bonvolu

skribi al ŝi, kiam vi havos liberan tempon. Mi kredas, ke tio donus al ŝi grandan konsolon kaŭzante neniun danĝeron al ŝia animo. Mi deziras, ke vi sciigu pri tio.

La 7an mi ricevis leteron ankaŭ de mia J. Lastatempe ŝia skribado eksimilis iom post iom al la via tiel, ke hodiaŭ mi preskaŭ ne povis ĝin diferencigi de la via. Pensinte, ke mi ricevis du leterojn de vi, mi malfermis la ŝian, kaj, trovinte, ke ĝi ne estas via, mi denove ekzamenis la koverton. Krom tio, dum kiam ŝi uzadis ĝis nun blankajn kovertojn, hodiaŭ ŝi subite sendis dubeverdan same kiel vi. Kaj kiel kutime mi miris pri via mirinda influemo sur la alian. Oni diras, ke en la laboratorio via emo aŭskulti levante la okulojn nun estas moda. Nu, kio fariĝis el ŝi lastatempe? Lastatempe neniu letero min atingas, en kiu ŝi ne skribas pri morto. Nome ŝi diras, ke inter Dia volo kaj homa vivo certe kuŝas kontraŭdiro ne enterigebla. Kiam iu formo de vivo estas necesa, sed kontraŭstaras Dian volon, ĉu morto ne estas la sola solvaĵo de kontraŭdiro? Ankaŭ ŝi skribis: „Mi neniom povas simpatii senrespondecan morton, tamen, ĉu la vivo, kiu ne povas efektiviĝi Dian volon, ne meritas esti transdonata al la morto?“ — Ŝi skribis ankaŭ tiel: „Ŝajnas al mi, ke mi malsana estos kaptata post nelonge de la morto. Se tiel, ĉu ne estus pli bele sinmortigi servigante al si la morton? Morto estas timinda, ĉar mi pensas, ke mi fariĝos nenio. Mi kaptis iun koron kaj pensas, ke tiu koro neniam min forgesos. Mi povas daŭrigi mian puran, altan vivon en tiu koro.“ — Mi povas kompreni ŝian koron ĝis iu grado. Ankaŭ mi ne pensas, ke la memmortigo estas peko, kiel iuj asertas. Mi pensas, ke neniu kaŭzo estas por riproĉi tian homon, kiu ne per sia volo naskiĝis en tiu ĉi mondo kaj nun rompas tiun okazon. Sed mi ne ŝatas, pensi ke mia J. sin kunligas

kun memmortigo. Komprenoble, se ŝi sin mortigus, ŝi alta, profunda kaj pura vivos por ĉiam en mia koro. Sed ĉu ŝi ne pensos pri tio, ke tiam mi, min kaŝante en ŝia koro, devas vane morti kun ŝi? Ŝi diras pri la kontraŭdiro inter Dia volo kaj homa vivo, sed, kie estas kontraŭdiro? Kial ŝi ne volas malkaŝe malkovri al mi pri detalaj punktoj? Mi pensas, ke mi ne estas tiel senkuraĝa, ke mi ne povas rekonstrui nian vivon laŭ Dia volo. Se mi tion pripensas, mi povas nur senti iun nekompreneblan malkontenton pro ŝia sintenado. Ofte maltrankvileco kaj malfido, kiaj ekkreskas ekzemple inter homoj havantaj sekreton unu antaŭ la alia, minacas konfuzi mian kapon.

Ni estas junaj kiel la ĉielo printempa, ĉu ne? Enspiregante aeron, ni interkomuniku korojn kiel lumon. Ni ĝoju aŭ malĝoju el la fundo de l' koro, se ni havos okazon ĝoji aŭ malĝoji. Kial ne estas permesate, agi kiel la nuda naturo mem? Vidu la naturon ekster la fenestroj!

Ekbloveginte de antaŭ horoj, la vetero pliteruriĝas iom post iom. Kiam subita ekventego sen neĝo eniras en la ĉambron plate kaj akrege kiel la segilo, mia dometo ekstremas, kvazaŭ ĝi estos forblovata. Kia terura bruego! Sed, kia solena orkestro! Mi nun devas iri al la fabrikejo por vidi, ĉu io okazas? Mi timas, ke la kamentubo konstruita per tertuboj amasigitaj unu super la alia falos; se ĝi falos, la sorto de l' maŝinaro estos endanĝerigata.

Kia terura bruego! Sed, kia solena orkestro!
Dia beno estu sur vi! Kaj sur mia J.!

Post nelonge mi vizitos vian urbon Tokio-n.

Via A.

(De B. al A.) (poŝtkarto).

Tokio, nokte la 9an de Februaro 1914.

Kara A.!

Uragano estas atakanta ankaŭ la ĉefurbon.

Kun rapideco, kiu ŝajnas atingi 10an gradon laŭ Beau-
forta skalo, ventego krias tra ĉielo kaj tero. Kia terura,
freneza bruoj! Kaj, kia solena akordo!

Timinda estas la naturo kaj vere kompatinda la homo!

Kiam la naturo, kiel ajn terure ĝi uraganas, kaŝas en
si solenan, nerompeblan akordon, kial la homo, kiu
naskiĝis kiel unu parto de la naturo, estas tiel lerta,
malakordigi ĉiujn aĵojn?

Vere kompatinda estas la homo kaj naŭziga mi estas!

Via B.

(De B. al A.)

Tokio, nokte la 9an de Februaro 1914.

Kara A.!

Leginte vian leteron mi skribis al vi senkonscie la las-
tan poŝtkarton kaj, elirinte tra uragano, mi ĝin enpoŝtigis.
Post reveno mi suferadis pro terura tusado ĉirkaŭ du-
onhoro. Pro troa terureco de l' tusado fine fraŭlino J.
ellitiĝis kaj min flegis. Eble mi estas malvarmuminta
de kelkaj tagoj. Febro plenigas mian kapon kaj min
malagrabiligas treege.

Mi ĵus parolis kun fraŭlino J. iomete. Mi ŝin demandis
senĝene, ĉu ŝi ne havas sekreton antaŭ vi ne malkovreblan?
Fraŭlino J. klare ĝin neis kun sincera mieno . . . en tia
okazo ŝia beleco estas kvazaŭ dieca.

Sentante ian strangan maltrankvilecon mi ne povas
legi ĉi tiun nokton. Do, oferante longan tempon, mi al
vi prezentos la plejlastan staton de fraŭlino J.

Oni pensas pri mi, ke mi estas tute indiferenta krom je legado. Estas ja prave, se homoj, kiuj vidis nur mian vestaron kaj malordon en mia ĉambro, tiel pensas. Sed mi pensas, ke al tiuj, kiuj ne estas indiferentaj, mi montriĝos kiel neindiferenta homo, kiel ili pensas. Iam nova servistino venis ĉe iu scienculo kaj por montrisian diligentecon ŝi ordigis ĝis ĉiuj anguloj de lia skriboĉambro. La scienculo konfuzite ŝin rigardis kaj diris al ŝi: „Kion mi kun peno malordigis regule, tion vi ordigis malregule.“ Vi povas fidi al mia raporto kun ne malgranda fideleco.

Se mi rememoras fraŭlinon J. en la epoko de l' dimanĉa lernejo, mi povas vidi antaŭ mi ordinaran, sed por la aĝo iom malgajan, knabinon. Se mi devas nomi ŝian karakteraĵon, mi povas alkalkuli terure malgrasan korpon kun maldikaj membroj, nigregan, riĉan hararon kaj grandajn okulojn kvazaŭ ion serĉantajn. Mi rememoras, ke tiuj okuloj min impresis neforgeseble. Estis antaŭ ses jaroj kaj ŝi estis dekkvarjara. La pastro proponis al mi, ke mi anstataŭu iun instruiston, ĉar li ne ĉeestis pro malsano. Mi lin anstataŭis — ho — estis la klaso, al kiu fraŭlino J. apartenis. El sep aŭ ok knabinoj ŝi estis eble la plej juna.

Estis komenco de la aŭtuno. Mi, kiu treege malamasian odoron — mi nomu ĝin malbonodoro — kiu flariĝas, kie virinoj kunvenas, memoras, ke mi unue plene malfermis apudan fenestron. Inter mi kaj miaj lernantoj fluis rivero de flava, varma lumo kaj mia rigardo, kiun mi volis doni al lernantoj, estis de ĝi interrompita. Ĉar la benkoj por lernantoj estis metatāj en la angulo de la ĉambro, por miaj okuloj saturitaj je lumo tiu loko montriĝis tute malluma. Palpebrumante mi penadis distingigi la lernantojn en la malluma loko kaj unue mi sentis, ke rekte antaŭ mi du grandaj okuloj min rigardadis fikse

iom sin levante. La okuloj de la aliaj lernantoj certe ankaŭ estis min rigardantaj, sed ŝiaj grandaj okuloj plej frue incitis mian rigardon. Mi pensas, ke nenio estas pli senharmonia kaj timiga ol la sklero dubeblua en malhela lumo. Ĝi min rememorigas je disŝeligita ostro, je malluma grizo aperanta en la rando de l' frunto de la mortinto; sed eble pro la pli nigra pupilo mi ne sentis tiel, sed iun profundan molecon, kvankam ne varman. Mi konsciiĝis, ke mi estis trankvile akceptanta la senton, kian oni sentas, kiam oni rigardas kurban linion, kiu komence similas al rektlinio kaj estas dika, sed iom post iom maldikiĝas en direkto de l' fino kaj malaperas supren; kian oni sentas ekzemple, kiam oni rigardas la kurban linion videblan en la nova luno duone kovrita. Tiuj ĉi okuloj min rememorigis ankaŭ je la sezono, kiu apartenas nek al la fino de l' somero, nek al la komenco de l' aŭtuno; kiu estante trankvila kaŝas fortan skuiĝon en la plej profunda fundo; kiu havas ion moviĝantan diversmaniere, sed samtempe ian solenan trankvilecon. Per ĉi tiu rememorigo mi ankoraŭ memoras, ke estis tiam komenco de la aŭtuno. Ankaŭ mi fikse rigardadis tiujn okulojn. La okuloj de plimulto de la virinoj, precipe de l' knabinoj, ŝanceliĝas fikse rigardate de la viro, precipe de akraj okuloj kiel la miaj; sed tiuj okuloj ne ektimis. Ili ne ektimis, ĉar la vizaĝo ja havis nenion prihontindan. Kontraŭe miaj okuloj sentis iun maljustecon kaj mi unue turnis la rigardon de ŝi. Mi eĉ nun sentas honton, se mi rememoras la tiaman malvenkon. Kaj ili estis la okuloj de fraŭlino J.

Deposte fraŭlino J. ne aperis en mia memoro. La antaŭlastan jaron, kiam mi vin prezentis al ŝi ĉe la enirejo de la preĝejo, mi nur ripetis la impreson, kiun mi antaŭe de ŝi ricevis. Ke ŝi deksepjara neniom ŝanĝiĝis

kompore kun ŝi dekkvarjara, pri tio mi nur ĝojis en mia egoista vidpunkto, kiu min dezirigis, ke ŝi por ĉiam restu tia, kia ŝi estas.

La temo flankeniros, sed bonvolu legi, supozante aŭdi ĉi tie nur babilaĵon. Mi pensas, kiel bela fariĝus la monda historio, se la virino tiel fiziologie, kiel ankaŭ en seksa deziro ne pliaĝiĝus pli ol 14 aŭ 15jara. Tiun penson mi nomas mia egoista vidpunkto. Ofte larmoj staras en miaj okuloj, se mi vidas aŭ pripensas belan knabinon en tiu aĝo . . . Vi povas diri, ke tia romantika parolmaniero ne konvenas por mi. Sed, ĝi ne estas romantika, nek sentimentala. Mi firme kredas, ke ĝi estas homa postulo kaj sentimento devenanta de la pli profunda fundo de l' vivo. Komprenoble mi ne parolas pri tiuj, al kiuj ankaŭ koroj rigidiĝas kaj krudiĝas, tuj kiam la ostoj rigidiĝas. Mi volas ne perdi la delikatecon de l' koro ĝis la morto. Tradukate en anglan lingvon kiel „gossamer-like“ tiu ĉi granda forto de l' koro estas treege malkomprenita. Delikateco ne signifas malfortecon de l' koro; sed tio ankaŭ neeviteble restados nekomprenebla por tiuj, kiuj perdis delikatecon de l' koro. Ili ne povos kompreni la grandecon de l' forto, kiun la knabino havas antaŭ pubereco. Ekzemple vi esploru la linion de la kruro de la genuo ĝis la kalkano, kiam la knabino staras. Kia modera, nekritikebla aranĝo de belaj linioj! Ilia tuta konturo prezentas mirindan misteran figuron en hela sunlumo. Sed mi devas diri, ke pli mirinda mistero elfluas el ŝia koro. Metu ekzemple floron antaŭ la knabino! Ŝi ĝin karesos kun ĝentileco konvena por ĝi. Tiom miloj da amindaj mensogoj de l' knabinoj kaj ankaŭ ilia mirinda ĉarmo, kiu terure incitante viran koron ne permesas perfektan alproksimiĝon, estas la solaj girlandoj ornamantaj surteran paradizon. Mi ofte havas diversajn iluziajn

asociaciojn de ideoj. Kiel ekzemple, se mi veturas per nokta vagonaro, mi ĉiam asociacias naturan morton; se mi enspiras matenan aeron, mi asociacias melodion de fajfado; kaj se mi vidas la knabinon, mi ĉiam asociacias la sorton de la homaro tre akre, kvankam per malklara konturo, kaj nevole larmoj ekaperas en miaj okuloj. Kaj mi firme kredas, ke inter tiuj ĉi du objektoj kuŝas tre proksima interrilato. Kaj la sorto de la homaro asociigata per la knabino havas neneeblajn belecon kaj mizerecon. Mi tion treege amas.

Sed fraŭlino J. jam trapasis la epokon de la knabino aŭ de la virgulino, kiu estas la plej ĉarma por la apuda rigardanto de la virino, kiel mi. La pordo de homa vivo estas la sama kiel la pordo de Paradizo. Ĝi ne havas ĉarnirojn malfermeblajn ambaŭflanken, sed nekomfortajn, kiuj malfermiĝas nur por la elirantoj. Kiu ajn jam eliris malferminte la pordon aŭ memvole aŭ okaze aŭ pro subpremo — ĝis kiam li plenumos la miraklon de revivigo — al li ne okazos, ke ĝi malfermiĝos por li la duan fojon. Tiuj, kiuj sciante, ke ili ne povas reveni al la estinteco, rigardas la pordon kun malĝojaj okuloj, estas nomataj sentimentalistoj. Mi konas la malsaĝecon de la homoj tiel sintenantaj kaj ilin kompatas, ĉar mi opinias tian sintenadon konsumado de energio. Mi adoras eternan knabinon. Sed, se mi scias la neeblecon de ĝia efektivigo, mi povas esti realisto, kiu tuj turnante la okulangulojn vidas virinon. Nun mi staras sur la vidpunkto rigardi fraŭlinon J. kun klaraj okuloj.

Kiam mi transloĝiĝis en tiun ĉi domon kun malmultaj posedaĵoj, pakitaj per la ruĝa lankovrilo, la metamorfozo de fraŭlino J. montris terure rapidan, fundamentan fazon. Longa tempo devis pasi, ĝis kiam la pupiloj de mia koro sin aranĝis por observado. Mi sentis kvazaŭ malagrabla, ke

la atmosfero de tiu ĉi hejmo forte maltrankviliĝas pro fraŭlino J. kaj en ĝi flugpendas io stranga kiel enigmo. Mi ne sciis, ĉu ĝoĝi aŭ malĝoĝi pri tio. Sur la muro de por mi decidita ĉambro estis pendanta belega kopio de „Beatrice“ de Rossetti kaj apud ĝi en malbongusta kadro portreto de knabino, kiu eble estas aldonajo de iu porknabina gazeto. Grimacante mi demetis la portreton de knabino antaŭ ol malpaki miajn posedaĵojn kaj sur la loko mi pendigis fotografajon de de Vries. Sed ĝi montris pli strangan kontraston je „Beatrice“. Tiun nokton mi tiun elportis, sed la sekvantan matenon, neniel trankviliĝante, mi demetis ankaŭ „Beatrice“ de ŝia sankta trono kaj ĝin anstataŭis per la geologia karto de Yorkshire. Havante karakteron ne konsideri opiniojn de aliaj homoj rilate al tia afero, mi tion ne povis elporti silente, kvankam mi sciis, ke tio dependas de bonvolo de fraŭlino J. Do, pro tio fraŭlino J. ekvidis, ke ŝia sintenado kontraŭ mi estos tre malfacila. Tiel komencinte de la ĉambro mi rebonigis ĉion ĉirkaŭ mi laŭ mia volo. Se ordigo de l' ĉambro, kion fraŭlino J. faris dum mia foresto, ne plaĉis al mi, mi senĝene reordigis antaŭ ŝi laŭ mia maniero. Ŝia maniero de ĉambropurigado havis multon al mi ne plaĉantan. Mi komence pensis, ke ŝia patrino purigas mian ĉambroon kaj montrante polvojn terure amasiĝintajn en la anguloj de la ĉambro mi iam diris al ŝi: „Oni devas konstrui la ĉambroon elipse por homo kiel via patrino,“ kaj ŝin ruĝigis, ke mi ŝin kompatas. Mi poste aŭdis, ke fraŭlino J. tiam pensis, ke mi estas malvarmsanga, al virinoj ironia viro. Aliflanke fraŭlino J. ofte kaŭzis al mi akrajn plezurojn kaj ofte mi ŝin dankis silente. Ekzemple ŝi ĉiam prezentas al mi dentolignetojn naĝigantajn en varmega akvo; se nin vizitos por almozpeti strata ĵonglisto kun leona masko, pigmeo aŭ orfinoj vestitaj per senko-

loriĝintaj superjako kaj instigantaj bonfaron per la voĉo simila al bambua balaileto, ŝi forkuras en la internan ĉambron kun la mieno, kvazaŭ ŝi pentas, ke ŝi naskiĝis kiel homo; ŝi ĉiam malestimas sian patrinon kiel private, tiel ankaŭ publike; ŝi ĉiam vizitas la tualetejon tute nerimarkite; kiam ŝi ricevas leterojn de vi, ŝi ekhavas tre belan vizaĝon kompare kun ordinare ktp. Sed, per malmultaj vortoj, la ĉarmo de fraŭlino J. estis en la tagoj de mia transloĝiĝo tia speciala, kian nur neelfarita verko donas atendigante sian perfektigon.

Sed, eĉ tiam mi ne estis inklina ŝin rigardi pli mal-supera ol mi. Eble mi jam skribis al vi en tiama letero pri tio, ke ŝi rezervas multe da nekonataj valoraĵoj, kvankam ŝi havas tian neperfektecon kaj kontraŭdiraĵon. Mi ne povis alie senti. Per plenumiĝo de amo la virino fariĝas ordinara, sed fraŭlino J. havas multon, kiun la amo ne povis rabi de ŝi — mi memoras, ke mi skribis al vi tiel. Mi kelkafoje sentis, ke ŝi, kiu devas pensi nur pri vi, enpensiĝas tute vin forgesante. Tio ne ŝajnis al mi nur sensenca revo, al kiu estas ema precipe la virino. Eble vi jam vidis fotografiaĵojn de fraŭlino J., kaj ĉu vi ne rimarkis, ke mienoj kaj vizaĝoj de ĉiuj fotografiaĵoj estas tiel malsamaj laŭokaze, ke oni povas pensi vidi ne la saman homon? Mi ofte sentis tremigan teruron, kvazaŭ vidi fantomon, kiam mia rigardo iel renkontis la ŝian. Kiel pri la impreso de l' naturo, tiel ankaŭ pri esprimoj de la homo oni ne povas diri, kiu estas lia propra; sed renkontante okaze tro neatenditan esprimon, kiu min tute ne memorigas al fraŭlino J., mi nevole ekmiras. Ĉu prapatroj de fraŭlino J. okaze rigardas la estantan mondon per ŝiaj pupiloj aŭ estonta fraŭlino J. pli frue aperis malklare en sia korpo? Iufoje ŝia vizaĝo esprimas ekstreman enuon kaj malĝojon kaj la alian

fojon ekstreman liberecon, kiel Prometeo disrumpinta ferajn katenojn. Iufoje ŝiaj pupiloj brulas kiel nigraj flamoj kaj alian fojon ŝiaj lipoj serĉantaj kison malfermiĝas kiel floro. Kaj admirinde estas, ke en ŝiaj esprimoj kuŝas neniom da memtrompo. Mi, kiu ĉiam malkonfidis al mia fideleco, havas rilate grandan eblon senti fidelecon de aliaj homoj kaj samtempe tiel akran eblon malkovrigi sian malfidelecon, ke ĝi min dolorigas. Kaj mi ja povas trovi nenion malfidelan en ŝiaj esprimoj. En iu senco mi eĉ koleris pri tio, sed mi estas tro sciencema por kripligi la fakton. La tradicia defnicio, ke la virino estas hipokrita en la fundo, la defnicio, kiun mi ĝis nun akceptis aksiomo, ekŝanceliĝis antaŭ ĉi tiu fakto. Mi ne povis krom eksenti ian subpremon. Ĝi min iel maltrankviligis kaj min minacadis. Brilon de la malplenaj, sed streĉitaj okuloj, per kiaj mortonta febromalsanulo senkonscie ion rigardas, mi iufoje atribuis al la perioda febro, kiu fraŭlinon J. atakadis. Efektive al ŝi tiam aŭ aperis, aŭ malaperis febro de ĉirkaŭ 38° C. Iun fojon mi ŝin demandis pri tio senĝentile. Kaj tiam ŝi ĉiam faris tre maltrankvilan mienon, sed regule respondis, ke tio devenas de ŝia malsano. Dum mi pensis, ke tio povas esti, mi en la koro diris: „Ne, vi mensogas!“

Okazas, ke ial terure abomena suspekto min atakas. Dum kiam fraŭlino J. diras, ke ŝi vin amas, la fideleco sin kaŝanta en la profundo ŝajnas al mi tion perfidi. Kun miro mi min riproĉis, sed mi estis ema pensi la samon. Sed, kiam mi vidas ŝin ricevintan de vi leteron, ĉi tiu abomena malklareco de mia koro senspure malaperas.

Hodiaŭ estas jam la 30a tago, depost kiam mi ĉi tien transloĝiĝis. Mallonga tempo faris ne malmultajn okazojn. Kiam mi transloĝiĝis, fraŭlino J. sentis timon antaŭ mia mizantropo, kaj miaflanke mi suferis pro la supre pri-

skribita stranga maltrankvileco; do interkomunikiĝo de
niaj koroj progresis netolereble malrapide. Ke mi la
14an de Januaro, kiam ŝia patrino forestis pro vizito
al la prapatraj tomboj, unuafoje kun ŝi interparolis iom
pli amike, mi jam skribis al vi. Mi kaj ŝia patrino mal-
kaŝe malamamis unu la alian de la komenco. Ŝia patrino
rigardis kun malestimemaj okuloj eĉ tion, ke fraŭlino J.
interparolas kun mi. En tia okazo fraŭlino J. alparolis
al mi amike, kvazaŭ intencante instigi ŝian malamamon.
Sed, ĉar la konscio, esti apud ŝi, estis sufiĉa por instigi
mian galveziketon al troa sekreciado, mi neniel povis
esprimi veran amikecon antaŭ ŝia patrino. La patrino
forestis kaj, ĉar mi ne fartis bone tiun tagon, mi ne vi-
zitis la laboratorion. De matene malvarma pluvo, kiun
oni povus nomi glaciĝinta pluvo, penetris nebule en la
ĉambron tra ĉiu fendeto, kaj estis unu el la dolorigaj
tagoj, kiujn nur ftizuloj komprenas. Krom tio mi songis
tre abomenan songon en la nokto.

Mi songis, ke mi estis, kvazaŭ mizera ŝtono forĵetita,
inter stranga homamaso en stranga salonego, kiun oni
povas priskribi nur per la vortoj kiel luksa, brila ktp.
Mi ne estas homo, kiu tuj malfidas al sia kapablo.
Malgraŭ tio mi sentis strangan premon kaj neniel al mi
flamis la koro. Mi min instigis perforte kaj kuraĝe
stariĝinte mi ĉirkaŭrigardis. Sed neniu el la homamaso
min rimarkis, ili ĉiuj staris turninte al mi dorsojn kaj
kun granda fervoro interesiĝis je iu afero. Kio la afero
estis, mi neniel povis vidi. Aŭ — ĉu mi ne estis ĉiel-
dotita je okuloj, kiuj povas vidi la plej gravajn aferojn?
Mi tiel pensis en la songo kaj tio estis min enkonduk-
anta en senfinan malesperon. Skuinte la membrojn, mi
baraktis antaŭ tiu ĉi malespero kiel antaŭ la malamiko
havanta la korpon. Oni ekridegas. Sed ili ne ridegas

je mi; ili ĉiuj ridegas turnante dorsojn al mi kaj eĉ ŝajnas ne scii pri mia ĉeesto. Pro ekkolero la vizaĝo estis al mi rompiĝonta. Refoje okazas ridego je mi indiferenta. Mi fikse manpremis kaj ekploris laŭte, sed miaj okuloj rigardantaj fikse la homamason estis sekaj. Mi ploris nur per voĉo, kiel obstina knabaĉo laŭte plor-egas, ne povante sola kontraŭstari multajn malamikojn. Trian fojon okazas gaja ridego je mi indiferenta. Kiam mi vekigis, tiel la vizaĝo, kiel ankaŭ la manoj estis al mi tute malsekaj pro noktoŝvito, kaj mi eksentis frostotremojn, kvazaŭ al mi ĉiuj hartruo- j kuntiriĝas. Kaj je mia miro mi perdis pro tiu ĉi sonĝo la kutiman memfidon kaj min sentis tre soleca. Malesperiga sento, ke „mi estas diboĉemulo kaj senkuraĝulo,“ sonis tra la tuta korpo. Kordoj de meditado havas senfinan longecon. Tute kovrite ĝis la kapo per litkovriloj mi pli kaj pli ekeniris en la labirinton pli mallarĝiĝantan, kaj ĝuste tiam fraŭlino J. eniris en la ĉambron, malferminte interĉambran glitpordeton, kaj je mia feliĉo ŝi sin tenis en la pozo, kiu ŝian esencon plej bone montras — la pozo, sidi gracie, vidigi la pli dekstran duonon de sia vizaĝo iom sin fleksanta, etendi manojn sur la genuojn malfikse kvazaŭ fluantaj kaj meti unu manon sur la alian montrante manplatojn. Estis komenco de bonŝanco en tiu tago. Ankoraŭ ne liberiginte de malbonhumoro, mi ŝin salutis levante la okulojn kaj subite diris al ŝi kun malĝentila tono: „Kial vi ne malkovras plie vian koron al sinjoro A.?” kaj tuj post tio mi pentis, pensante, kiel malafabla mi estas. Tiumomente fraŭlino J. ekmontris kutiman, maltrankvilan mienon, kian nur la homo kiel mi povas rimarki, kaj tuj post tio iom klininte la vizaĝon ŝajne pezan pro riĉa hararo, kvazaŭ tutkore malfidante al miaj vortoj kaj bedaŭrante mian malĝustan konduton,

kaj iom ruĝiĝinte — se la temo vin koncernas, tiam ŝi ruĝiĝas sub la okuloj — ŝi diris al mi jenon: „Kion ajn mia A. skribis al vi, mi ne povas plie malfermi la koron ol ĝisnun. Kontraŭe mi deziras, ke mia A. malkovru al mi ĉion pli malkaŝe. Ke la viro sin sentas forta, al mi ne plaĉas.“ Mi ne havas arton mimiki la vortojn de la virino kiel la literaturisto, tamen mi povas akre senti la tuŝon de la vortoj. Kiam fraŭlino J. diris, ke al ŝi ne plaĉas, ke la viro sin sentas forta, en ŝiaj vortoj bele vidiĝis iu dolĉeco kaj forta decido, ke ŝi portos por vi pezan ŝarĝon, ĝis al ŝi rompiĝos la skapolo. Aŭdinte tion mi unue sentis klara mian koron.

Poste mi iom detale rakontis al ŝi pri la insulo Ogasauara, pri mia speciala fako de la scienco kaj fine pri sekvo de meditado, je kiu mi min okupis post vekigo de la inkubo; do, pri aĵoj, pri kiuj mi rakontus al vi, se vi estus en Tokio. Mi min sentis tro soleca, refoje daŭrigi ĉi tiun meditado restonte sola, kaj mi volis depreni la ĝermon de tiu meditado per malkovrado al iu ajn, tute egale ĉu tiu ĝin solvus aŭ ne. Suferante doloron mi malelokvente rakontis al ŝi fragmente, sentante, kvazaŭ mi konfesas. Fraŭlino J. klinis la kapon kaj, ludante kun ruĝleda ujo de la klinika termometro tie kuŝanta, ŝi atente min aŭskultis. Sentante alian intereson ol antaŭ vi, mi rakontadis al ŝi pri idea konfuzo, kiun ŝi eble ne komprenis, kaj pri fragmentaj rememoraĵoj el mia infaneco, kaj mia sento ekscitiĝis, kio al mi malofte okazis. Mi antaŭvidis, ke mi refoje ekhavas febron, sed jen nenia helpo. La tono de mia parolo fariĝis pli kaj pli sentimentala kaj kiam mi subite ĉesis paroli kaj ni ambaŭ enfalis por momento en profundan silenton, mi rimarkis je mia miro, ke ŝiaj okuloj estis brilantaj per larmoj. La sango en mia korpo, kiu estis tute varmega

ĝis nun, fariĝis malvarmega kiel glacio kaj ĉesis cirkuladi. Vidante, ke la ŝultroj de fraŭlino J. tremetas, mi sentis, ke mia fiereco estis piedpremata. „Estas jam sufiĉe, se via egoismo fariĝis tiel malgranda!“ tiel pensinte mi ĉesis por momente spiradi.

Sur la vizaĝo de fraŭlino J., kies okuloj jam sekigis, montriĝis plena sincereco. Ŝi diris: „Mi ne ploris je vi, mi nur ploris pro mia estinteco por vi; pro doloro mi ne povis vin aŭskulti plue.“ Kaj kun iu laŭsistema parolmaniero, aludanta sagacecon kaj ne imitebla por la viro, ŝi rakontis al mi pri sia estinteco. Ju pli ŝia rakonto pluen iris, des pli ofte ŝi interrompis paroli kaj tremigis la ŝultrojn. Mi vidis ŝin eksplorantan, por subpremi doloron. Estis malĝoja rakonto, kiun vi jam konas. La vetero dum tiu tago ŝajnis al mi kvazaŭ fono de l' rakonto. Rememorinte, ke ŝi, ĝis kiam ŝi fianĉiĝis kun vi, ĉiujn problemojn ŝin turmentantajn — iufoje malfacilan, alian fojon malbelan kaj trian fojon mizeran — mem devis solvi kun naiva, delikata koro de knabino, mi sentis, ke mia koro estis premata per kortuŝo dolora, malĝoja kaj mizera, kaj mi ne povis krom ekopinii tute alie ol ĝisnun pri la kapablo de fraŭlino J.

La parolado inter ni ambaŭ ŝajnis ne havi finon. De la komenco ĝis la fino estis neniŭ gaja temo, sed ni ambaŭ ridis unu al la alia, kiel malĝojantoj ridas por konsoli unu la alian. Mi ne scias, kion fraŭlino J. volis, sed miaflanke mi volis, ke ŝi restu kun mi kiel eble plej longe. Por mi estis ja netolerebla la atendo, ke mi, post kiam ŝi estos for, daŭrigos la tiumatenan meditadon, kiu mian tutan animon subpremis.

Post kiam ni interparolis ĉirkaŭ du horojn, fraŭlino J. forlasis mian ĉambron vokite de sia avo. Sed la sekvo estis neatendita. Mi sentis en la anguleto de l' animo

iun varmeĉon, kiun mi ĝis nun neniam travivis, kaj mi tutkore vin gratulis pri via feliĉo edziĝi kun tia homo. Al mi la mondo eĉ ŝajnis pli bela ol antaŭe.

Sed la sekvontan nokton min atakis fortega reakcio, kiun vi povos kompreni, se vi relegos la lastan leteron. Denaskiĝaj difektoj de miaj karaktero, sano kaj sorto min severege turmentis. Kara A.! Mia kapo hodiaŭ perdas kvietecon; anstataŭ skribi pri ŝi mi emas paroli pli multe pri mi mem. Sed, ĉar mi, ne estante literaturisto, ne posedas arton priskribi unu homon tute apartiginte de mi, vi min devas pardoni pri tio kiel pri neeviteblaĵo. Sed mia spegulo, kiu reflektas fraŭlinon J., tute ne estas malebena, nek malklara.

De tiu tago ni ambaŭ eksciis la konturojn de ni ambaŭ. Post kelkaj tagoj mi resaniĝis kaj la animo akiris trankvilecon, kian oni sentas post la uragano, tiel ke mi ree eksentis intereson kaj amon je mi mem kaj mia laboro. Kaj ĉion, kion fraŭlino J. faras, mi ekrigardis kun bonvolo kaj kompatato. Mi povis iom ekkompreni ŝiajn maltrankvilajn esprimojn. La komforteco de la loĝejo, al kiu mi kutimiĝis, deprenis plie murojn de mia brusto. Vi ofte okupis la centron de la temo de nia interparolado. Kompreno de fraŭlino J. pri vi estis pli granda ol mi atendis. Vian kvietaniman, fortan kaj amoplenan karakteron ni traktis kiel trezoron. Pasis kvar aŭ kvin tagoj, kaj la supro de la paco inter ni foriĝis.

Iun tagon fraŭlino J. revenis kun pala vizaĝo de la preĝejo. Ĉar estis treege malvarme en tiu tago, mi pensis, ke ŝi estis refoje atakata de malsano, kaj jen ŝi eniris en mian ĉambron, dirante, ke ŝi havas ion por paroli kun mi. El ŝiaj okuloj stranga lumo radiis kaj ŝiaj lipoj tremis. Ŝi rakontis, ke en la preĝejo disvastiĝas onidiro, ke ŝia malofta vizito lastatempa al la preĝejo

estas kaŭzata de tentado de mi herezulo; ke, krom tio, mia tentado ŝin kaptis ne nur je kredo, sed ankaŭ progresis al la pli terura flanko; kaj ke ni sekse interalproksimiĝante forĵetas ĉiun moralecon kaj droniĝas en hontinda volupto. Apenaŭ fraŭlino J. eldiris ĉi tiujn vortojn, ŝi silentis. Ŝi bedaŭris, ke ŝi estis kaŭzo por difekti mian honoron. Mi denove malbenis la malnoblecon de l' homa karaktero. Kvankam ni silentis pri tio, ni ambaŭ tre bone sciis, ke la disvastiginto de tiu ĉi onidiro estas ŝia patrino mem. Apartigi fraŭlinon J. de vi, estis de longe la deziro de ŝia patrino. Krom tio ŝia lastatempa konduto al sia patrino estis sufiĉe por instigi ŝian malamon. Mia malamikeco kontraŭ tiu ĉi malaminda virino atingis supron. Post longa silentado mi subite ekstaris kaj iris al ŝia ĉambro. Fraŭlino J., kiu jam scias, ke estas vane min deteni, lasis min agi laŭ mia volo. Tio estis agrabla al mi. Mi persekutis la patrinon, ĝis kiam mi plene kontentiĝis, sentante akraj miajn intuitivon kaj volon, per kiuj mi povis ŝin venki, dum mi havis neniun konkretan atestaĵon pri ŝia perfido.

Sed, de tiu tago la farto de fraŭlino J. subite ŝanĝiĝis. Ŝi havis hemopteon preskaŭ ĉiutage kaj diferenco inter maksimumo kaj minimumo de ŝia korpa temperaturo pligrandiĝis tagon post tago. Al kio mi povus kompari ŝin turmentata de malsano? Al kio mi povus kompari la belecon de la muskolo, kiu post detruigo de bela muskolo nove aperas kiel miraklo? Ju pli ŝi malgrasiĝas, des pli bela ŝi vidiĝas kaj des pli forte oni povas senti la forton de ŝia profunda animo de ekstere. La nobleco, kian sanktulo tute kadukiĝinta pro Dia provo havas, ŝin briligas. Mi eksentas deziron min ĵeti antaŭ ŝi kaj konfesi ĝis kontentiĝo, anstataŭ ŝin flegi kaj kuraĝigi.

Sed mi devis pensi pri mi mem pli prudente. Unue, ne estas bone, ke mi, kiu havas saman malsanon kiel

ŝi, restas ĉe ŝi. Se mi pripensas nur pri tiu punkto, jen estas plena kaŭzo forlasi ĉi tiun domon. Due, fraŭlino J. havas en si forton, kiu, ne bezonante ekziston de la homo kiel mi, iom kaj iom disvolviĝas. Ŝia lastatempa progreso min mirigas. Kiel ekzemple la kredo je Ĉiopovulo estas miro tiel por mi agnostikulo, kiel ankaŭ por la tielnomata moderna kredanto. Sed ŝia kredo estas libera kaj malligata je ĉiuj dogmoj, kaj forĵeto de la dogmoj okazis al ŝi kiel sekvo de plua alproksimiĝo al Ĉiopovulo, ne pro malamo al kateniĝo. Tial ŝiaj pensoj kaj agoj apartenas al tiaj, kiaj povas esti malakceptataj laŭ la dogmoj, sed akceptataj kaj pardonataj de Ĉiopovulo. Kiel ŝi atingis tian komprenon, kvankam ŝi estas edukita en la dimanĉa lernejo plena je dogmoj kaj kreskis en familio tute indiferenta je la religio? Eble vi forte influis sur ŝin. Sed, se ŝia animo ne havus esencon brilan kiel juvelo, kie ŝi povus kulturi tian sanktan kampon en la fundo de l' vivo? Rilate al bagatelaj aĵoj mi ankaŭ povus iom influi sur ŝin, sed, per malmultaj vortoj; tio ne valoras pli ol ekscesa zorgemo por la homo, kiu jam plenumis grandan aferon. Tio estas neutila, se ne malutila. Mi decidis forlasi ĉi tiun domon. Ordinare, se mi povas trovi tian fiksan kaŭzon, mi nenium demandas pri la opinio kaj tuj plenumas mian decidon. Sed mi vin demandis letere pri via opinio kaj kompreneble vi tion kontraŭstaris. Mi vin demandis, ĉar mi havis iomete da riproĉeblaj kaŭzoj: unue, malgraŭ ke mi konfidis al la kapablo de fraŭlino J., mi kompatbedaŭris lasi ŝin sola ĉe ŝia patrino; due, mi sentis dolore disiĝi de ŝi. La stato de mia koro pli multe bezonis fraŭlinon J. ol ŝi min bezonis. Sed vi kredas, ke mi ne uzis artifikon skribi intence al vi, atendante de vi tian respondon. Nur la fendoj de mia koro min instigis agi tiel. La farto de fraŭlino J. malboniĝis pli kaj pli, kaj ŝiaj nervoj tiel

akriĝis, ke ili ŝajnas reakcii eĉ je la sesa sento, kiam la pastro nin vizitas. La pastro postulis de mi unue intervidon kaj konsilis al mi, ke mi forlasu ĉi tiun domon. Mi nur respondis al li simple, ke mi vin demandos pri via opinio, kaj ni ambaŭ kune iris al fraŭlino J. en ŝian litĉambron.

Kuŝante surdorse kaj plektante ambaŭ manojn ĉe la supra rando de l' litkovrilo, fraŭlino J. trankvile dormadis. La dormado estis tiel pura kaj trankvila, ke ni ne povis distingi, ĉu ŝi vivas aŭ mortis. Ŝia avo, rigide sidanta ĉe ŝia lito kaj iom klinanta ambaŭ brakojn sur la genuoj, kompateme karesis per la fingroj la finon de la nigra hararo, kiu kun melodio muzika elfluis el super la blanka kuseno. Mi deziris, ke tiu ĉi vidiĝo restu por ĉiam tia, kia ĝi nun estas, por ke mi ĝuu ĝian rigardon. Kiam ni eniris en la ĉambron, la avo lasis la hararon kun konfuzego kaj vekis fraŭlinon J. skuante ŝin. Ŝi larĝe malfermis la grandajn, klarajn okulojn kaj kiam ŝi ĉirkaŭrigardinte trovis la pastron min akompanantan, ŝiaj okuloj ekparolis malsimplajn vortojn, kiujn mi nur komprenis; sed, baldaŭ ekstaris en ili varmegaj larmoj. Neniu volis ekparoli. Regis silento momenton. Kun miro la pastro eble eksciis, kian mortigan doloron la afero, kiun la tria povas trakti sen zorgo, donas al fraŭlino J. Starante en la mezo de l' afero kaj ŝentante konfuzon pri sia ago, li fine ne povis ekparoli eĉ unu vorton pri mia transloĝiĝo kaj rapideme foriris. Ankaŭ en tio ĉi mi konstatis kaŝitan forton de ŝia karaktero. Mi, kiu ne povas ĝui triumfon ne batalante kun eltirita glavo, min sentis eĉ iom supraĵa.

Per la vizito de la pastro mia decido fariĝis definitiva pri la problemoj; mi decidis, se vi nur permesas, restadi ĉi tie por la mondo, por vi kaj ankaŭ por mi mem. Kaj forta kuraĝo al mi revenis, ankaŭ mia sano pliboniĝis

proporcie je ĝi, intereso je la laboro ekkreskis min instigante.

Kontraŭe al fraŭlino J. okazis terura malespero. Ŝi ekdubis pri via amo. „Mi ne estas amata ĝuste; alie, mi ne scias ĝuste ami. Ĝis nun mi kredis, ke mi povas senti fortan kontentiĝon de l' koro per humila, sincera akcepto de vira amo, kaj do penadis por tio per ĉiuj fortoj. Imagu malesperon kaj doloron kaŭzitajn de tio, ke ili ne estas kompensitaj. Ankaŭ ŝajnas al mi, ke senfina mallumo disvastiĝas antaŭ mi. La letero de mia A. estas por mi la plej kara. Ĝi fortigas la lumon de mia vivo; sed rekte malantaŭ ĝi terura krepusko minacas min ĉirkaŭvolvi. Ĉu mia amo ankoraŭ ne estas sufiĉa? Ne, ne, mi hontas eĉ dubi pri tio. Ju pli fikse mi povas kapti memkonsciencon, al kiu mia A. min instigis, des pli proksimen alproksimiĝas al mi ĉi tiu terura mallumo sekvanta la krepuskon. Sed mi mem ankoraŭ ne scias, kiel konfesi pri tio al mia A. Unuvorte, konfeso ne utilos. Se tio devenas de mia tro malsufiĉa aŭ tro sufiĉa pripensado, tio nur ĝenos mian A. Neniu estas pli soleca ol mi en la mondo. Estas nur mia avo kaj mia A., al kiuj mia amo alfluas. Sed pli vere mi nomu kompaton la amon al la avo. Do estas nur mia A., kiu povas esti la objekto de mia amo. Sed . . .“ Fraŭlino J. konfesis al mi tiel.

Krom tio, ŝia senfortiĝo ofte ŝin metis antaŭ la problemon de l' morto. Eĉ per viaj simpatioj kaj divenoj vi ne povus klare imagi la koron de l' homo, kiu devas rekte renkonti tiun ĉi problemon. Timo je morto fariĝas ludo per intereso de distanco — eĉ de la plej malgranda. Malproksimiĝu unu metron de morto, kaj oni povus laŭdkanti kun rido, malestimi kaj malserioze trakti la morton. Sed, kiu kuraĝas levi la manojn de laŭdo, mal-

estimo aŭ malserioza traktado nuligante la distancon de unu metro? Unu rigardo de Gorgono ŝtonigas la homon, unu rigardo de morto frakasas la homon en pecetojn. Mi ne povis krom senti maltrankvilecon, kvazaŭ mi rigardas la floron metitan sur la renverse starigita triangula piramido.

Feliĉe la terura doloro, kiu fraŭlinon J. minacis je morto, ekmalgrandiĝis post tri tagoj, kaj ekaperis ia trankvileco. En tiuj tagoj ni okaze kune legis „Aglavaine kaj Sélysette“ de Maeterlinck. Legi ĉi tiun poemon kun mirinda, mistera forto estis triafoje por mi kaj unuafoje por fraŭlino J. Kiel mi miris triafoje leginte, tiel ankaŭ ŝi miris legante unuafoje. Nuda vereco de l' sorto estis ĵetita antaŭ nin ambaŭ. Ni tute distriĝis, kvazaŭ ni vidis ion vere belan, sekve teruran. „Kial tia tragedio okazas, dum ili tri ja estas ĉiuj bonaj?“ tiel diris fraŭlino J. kaj mi ankaŭ diris: „La fakto, ke la malbonulo prosperas kaj la bonulo pereas, ne kondiĉas la tragedion. Tio estas nur burlesko, se mi povas diri. Vera tragedio okazas nur tiam, kiam, ju pli forte la homo vekigās per la terura forto — ĉu dia, aŭ diabla mi ne scias — perfidanta multoble homan atendon, li des pli profunden enfalas en la maldolĉan sorton. En tiu ĉi senco Edipo estas multe pli granda ol Hamleto.“ Kvazaŭ la personoj en la dramo, ni ambaŭ havis streĉitajn korojn nedifineblajn ĉu belan, aŭ malĝojan.

Dum kiam fraŭlinon J. vizitis iom pli bona stato de sano, min atakis malĝajeco. Tro fidante al mia vigleco — verdire al mia ŝajna vigleco — mi iris kolekti materialojn, kiam malvarma vento blovis. Mi daŭrigis studadon de mateno ĝis vespero. Ne donante okazon al la diablo, kiu spionas sin ĵeti sur min, mi okupigis je laborado kvazaŭ algluiginte al ĝi. Mi ankaŭ pentis, ke

mi malice restadis en ĉi tiu domo. Krom tio, mi, kiu ĝis nun sekrete sentis fierecon pri tio, ke mi havas sufiĉe da karaktero speciale supera, eĉ se ne plene elkreskinta, ne ekpovis toleri solecon, kiu sekvas tian karakteron. Paca karaktero, kiu, anstataŭ sin trudi al la aliaj, timeme sin retiras de ili, estas perfekta tiel, kiel ĝi estas, kvankam ĝi estas malgranda. Ju pli speciala la karaktero estas, per des pli speciala plenigaĵo ĝi perfektigaĵas. En homa vivo, treege limigita de tempo, spaco kaj tradicio, nenio estas pli stulta kaj malsprita ol atendi ĉi tiun specialan plenigaĵon. Povas ekzisti homoj, kiuj ne konsideras tian postulon. Sed al la homoj, kiuj forte kaj profunde deziras kreskadon de l' karaktero, nenio instruas ironion de l' sorto pli forte ol tio. La vera, fundamenta ideo de liberalismo kaj egaleco estas kristalo de la deziro, iom ajn liberigi eternan homan vivon de tiu kondiĉo. Liberalismon oni rigardas kiel plendaĵon de ordinaraj, nenion postulantaj malfortuloj. Kia senpripensemo! Nur per la simpla fakto, ke la fervora insistanto de tia ismo estas ĉiam posedanto de speciala karaktero, oni povas tion kompreni.

Libereco! Libereco! Vera libereco, kiu estas kapabla plenumi avidan postulon de nudaj animoj! Ni serĉu tiun liberecon! Ni rezervu kuraĝon, por ke ni povu senkondiĉe obei tiun liberecon!

Sonadis la vaporfajfilo de l' arsenalo. Ektagiĝis trafendoj de la fenestroj. Ree komencas tago de doloro. Ellaciĝinte pro ekscitiĝo kaj malsana febri mi estas devigita ĉesi ĉi tie.

Fraŭlino J. kaj aliaj ŝajnas ankoraŭ dormadi trankvile.

Ĉu mi jam rakontis al vi ĉion? Restas ankoraŭ multaj aferoj inter mi kaj fraŭlino J., pri kiuj mi devas rakonti

al vi. La okazo rakonti pri tio ree venos. Unuvorte, vortoj estas nur vortoj.

Mi aldonas ankoraŭ unu vorton, ke la motivo por mia deziro edziĝi kun fraŭlino N. estas laŭ instigo de fraŭlino J. Fraŭlino J. pensas, ke mia vivo maldolĉa kiel galo iom dolĉiĝos, se mi edziĝos kun fraŭlino N., kaj al mi konsilas nepre edziĝi kun ŝi. Iam mi interesiĝis je tio. Sed kiam mi pensis pri eksternormaleco de mia karaktero, mi malesperiĝis je mi mem. Bonvolu min pardoni pri mia senpripensema sintenado!

Jam finiĝis. Mia plumo elservis, mi ĝin rompos kaj forĵetos.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 11an de Februaro 1914.

Kara B.!

Ni havas hodiaŭ nacian festotagon²⁸.

Uragano jam forpasis kaj venis trankvila tago. Varma sunradio kvazaŭ profetanta venontan printempon vizitis eĉ la angulojn de l' fabrikejo dum la tuta tago kaj ŝajnis nepre purigi ĉion. La maljunulo, laŭleĝa posedanto de la fabriko, demetis hodiaŭ leporfelan dorskovrilon, kio ja malofte okazas, kaj diligente laborante li avide rigardis sunradion, kvazaŭ ĝi bone efikus al liaj okuloj. Kaj dum laborado li ĉiam elparoladis gajajn, komikajn aĵojn. Mi ankaŭ estus devinta havi intereson je laboro, sed mi ne povis; ial mi ne povis. Ju pli mi ne povis, des pli nur meĥanike miaj membroj moviĝis. Kaj vespere mi revenis hejmen kun lacegiĝinta korpo kaj kapo plenigita de io angulhava. Kvazaŭ antaŭsignon de malfeliĉo mi aŭdis ĉe enirejo doloran tusadon de mia patrino. De kelkaj tagoj ŝi subite kadukiĝis, kaj krom tio malvarm-

uminte ŝi kuŝas en la lito. Pri mia fratino N. ŝi ankaŭ estas en tre maltrankvila stato pro la problemo de edziniĝo, kiu subite okazis. Sentante ian maltrankvilon en la tuta domo mi plie fariĝis malgaja. Sed atendante ion mi iris al mia skribtablo kaj trovis sur ĝi leteron en verdeta koverto. Tiu koloro estis antaŭe la signo de via letero; sed, ĉar mia J. ankaŭ uzas la saman nuntempe kaj skribas samstile kiel vi, mi povas distingi nur per la koverto, kiu de vi skribis. Tio instigis mian koleremon. Senpacience mi esploris la nomon de la adresinto. Mia J. ĝin ne skribis. Por diri la veron, kaj eble je via malplaĉo, mi senesperigis; mi tute senesperigis kaj tie eksidis kvazaŭ falante.

Por vespermanĝo ni ambaŭ manĝis batatan kaĉon apud la malsanlito de nia patrino. Dum kiam mi ree sentis maltrankvilecon pri la edziniĝo de mia fratino, ŝi min demandis pri diversaj aĵoj. La viro, kiu proponis ŝin edzinigi, laboras kiel asistanto ĉe la fako de aplikita ĥemio de la scienca fakultato en tiu ĉi urbo. Mi iam lin vizitis por demandi pri la metodo de muelado. Tiam li estis leganta libron en la unuaetaĝa ĉambro de iu malpura pensiono. Kiam mi sidigis, li min eĉ ne rigardis kaj dirante, ke mi atendu iomete, li senĝene legadis turnante sian dorson al mi, ĝis li atingis la finon de l' paragrafo. Kaj kiam li fine sin turnis al mi, min rigardante fikse kun malgrandaj, amindaj okuloj, li tuj ekrakontis pri atomismo, pri kiu li ĝis nun legis. Tio al mi tre plaĉis, kaj deposte ni ekinterkomunikigis. Li ne havas monon, nek parencon, kaj humorema kaj amika li apartenas al tia tipo, kia estas malofta inter japanoj. Li ne estus kunvivanto ne konvenanta por mia fratino. Eble ŝi ankoraŭ ne havas iun definitivan decidon pri edziniĝo kun li, sed ŝajnas suferadi diversmaniere pro la

problemo de edziniĝo mem. Miaflanke, mi ne volas, ke mia fratino edziniĝu en la stato tia, kia ĝi nun estas. Ĉar al mi ne plaĉis, ke mia patrino ripete paroladis diversajn aĵojn pri ĉi tiu problemo, mi fine eldiris — por mi tre malofte — ion nenecesan, kio instigis mian patrinon al larmoj. Post manĝo mi sidigis antaŭ la skribtablo kaj senatente aŭdante, ke mia fratino lavas la manĝilaron, mi sidadis nenion pripensante. Sed kelkafoje, kvazaŭ ekmemorante pri ĝi, mi rigardis jen unu flankon, jen la alian flankon de via peza letero sur la tablo. Kaj noktigis. Krom tio, ke en la apuda ĉambro tuso de mia patrino aŭdigis en ne mallonga intervalo, silento ĉirkaŭe regis, kaj mia fratino eble jam endormigis. En tia okazo la malriĉeco minacas la homon en stranga forto, kvazaŭ ĝi atendis, ke la homa koro trankviliĝas. Mi nevole kuntiris la ŝultrojn, kvazaŭ mi portis pezan ŝarĝon, kaj fermadis la okulojn. Intertempe al mi revenis mia kutima, kara forto. La trankvila hejmo al mi ekŝajnis plena je paca amo. Kaj la interna forto egaligis kun la ekstera kaj poste ĝin venkis. Tiam mi unue kuraĝis malsigeli kaj legi vian leteron.

Via skribstilo, kiu laŭ la al- kaj forfluo de tajdo de sentimento fariĝas aŭ zorgema kaj neta, aŭ kruda kaj libera, estas bona gvidilo por kompreni vian sentadon. Antaŭ ĉio mi vin dankas pro tio, ke vi skribis al mi tiel detale pri la plej lasta stato de mia J. Ŝiaj lastaj leteroj ŝajnas esti skribitaj nur por min turmenti. Laŭ ili mi povas kompreni, ke ŝia koro estas streĉata pro io; sed tute ne estas klarigita, kiel kaj pro kio? Mi ne povis tion toleri, kaj kompare kun ŝiaj, kian diferencon via letero montris! Mi povis imagi iom videble, kiel la spirito de mia J. montriĝas en ŝiaj parolado kaj agado. Mi vin dankas pro tio.

Sed ne ĉiuj miaj malkontentoj estas forigitaj pro tio. Kontraŭe, kion signifas, ke, la malkontento ne nur estas forigita, sed ke ĝi pliprofondiĝis je mia miro, post kiam mi legis vian leteron? Se mi povas alkompari, vi desegnis al mi drakon kaj forgesis pentri gravajn okulojn. Estus tute ridinde, se mi ripetus, ke mia amo al ŝi nur kreskas. Eble vi povas min trovi kompatinda, kiu volas koni nur unu solan virinon. Sed, se vi min tiel trovas, tio estas via aĵo kaj min ne koncernas. Mi ŝin vidis laŭ providenco, kiel Adamo vidis Evon. Lasinte Evon, Adamo ne povis fariĝi kunvivanto de cervino. Por mi estas ankaŭ tiel. Mi scias, ke mi estas kreita nuda. Mi al Dio malkaŝe jesas, ke mi nenion havas denaskiĝe; sed, se mia J. estus deprenata de mi, mi ne povus krom plendi, ĉar tiam mi havus troan malfidon al Dia amo, por toleri eĉ tion. Mia J. penetris en ĉiun mian fibron, en ĉiun mian ĉelon, kiel la luno sin reflektas sur ĉiu rosguto. Troe saturiĝante je mia J., mi okaze eĉ pensas, ke mi ne bezonas ŝin vivantan. Sed tio ne estas vero, ne estas vero. Mi ne kontentiĝos, se mi ne ekposedos la koron, karnon, ĉiujn harerojn kaj ĉiujn haŭtomakuletojn de mia J.; ne, mi ne kontentiĝos ĝis tiam. Kara B., vi estas spertulo pri diversaj aĵoj, sed vi eble ankoraŭ ne estos travivinta tian kruelan turmentiĝon. Se jes, via kompato povus karesi mian vundon pli lerte. Ĝis nun mi klopodis kiel eble plej trankviligi la sentimenton kaj kvietigi la malkontenton, kiu okaze de interne sin ŝovas. Mi pensas, ke mi estis tiom humila, kiom mi povis. Mi volis labori, ĝis al mi la tempio sangos. Tage mi laboradis diligente kaj nokte legadis, ĝis mi falis sur la tablon kaj dormis. La noktojn, kiam mi ne povis endormiĝi, mi nur preĝadis. Kaj iel venkante la neatenditan sorton, mi ne perdis viklecon. Sed iam kaj iam tia klopodo

facile rompiĝas. Atendante okazon, terura, abomena forto sin ĵetas sur min. La grandaj okuloj kvazaŭ rigardantaj profundan, nesolveblan enigmon; la ĉarma hararo min instiganta ĝin mordi; ŝiaj du lipoj kaj dek fingroj, kiuj kvazaŭ brulstampite restas sur miaj lipoj kaj manoj — mi sentas, ke al mi respirado ĉesas — ili estas ĉiuj strangaj kuraĝigiloj por mi. Ŝia malluma, mizera estinteco, plimalboniĝanta sano, animo kreskanta en malkomprenemo kaj malico — ili ekstreme instigas kompaton kaj kunsenton de mi, de viro. Mi tion ne povas elporti, kaj kelkajn fojojn, jes kelkdekojn da fojoj kriante en la koro mi ĵuris: „Mi nepre ŝin feliĉigos. Mi ne kontentiĝos, ĝis ni ambaŭ fariĝos la plej feliĉaj. Helpu ŝin! Savu ŝin! Gvidu ŝin sur la plej bona vojo, por ke ŝi ne eraru!“ Ne mi sentis amon, sed amo sentis min kaj ŝin. Mi estas nur trenata potence kaj forte kvazaŭ de la ventego. Tion, kion mi faras, mia J. faras. Mi jam ne scias, kion skribi. Neniu vortoj ekzistas, kiuj esprimas mian koron. Tion vi eble komprenos. Sed mi skribas. La ĉielo kaj la tero pereas; nia amo ne devas perej, ne pereas. Dio faru ĝin neperebla! Se ĝi pereos, min mortigu antaŭ tio. Sed mi ne volas morti. Mi ne volas morti, ĉar mi estas juna, forta kaj nepre faros tion, kio meritas vivon. Mi ne deziras morti, ĝis kiam mi estos alvokinta mian J. al mia brusto kaj ŝi estos gustuminta veran feliĉon per mi. Morti mi ne deziras ĝis tiam.

(Skribinte ĝis tie ĉi, mi subite rimarkis sonon en la apuda ĉambro kaj kun ekmiro mi aŭskultis. Estas kaŝita plorĝemo de mia fratino, kiu laŭ mia opinio jam endormiĝis. Kiam mi vidis sur la tablon, mia naztuko ankaŭ estis tute malseka de larmoj. Mia fratino aŭdis, ke mi ploris, dum kiam mi tion ne rimarkis. Abomenulino! Mi sentis malvarmon kaj ekkonfuziĝis kiel la infano riproĉita neatendite.

Mi ne kuraĝas relegi tion, kion mi skribis ĝis ĉi tie. Sed, kiajn ajn sensencaĵojn mi estas skribinta, vi eble eltiros el ili mian veran koron. Do, mi ĉesas ĉi tie kaj iom trankviligos.)

— — — — —
Kun mallaŭta voĉo mi riproĉis mian fratinton. Ŝi ĝentile konsentis kaj eble kunpremis dentojn pro malĝojo. Mi rimarkis ankaŭ, ke la patrino ŝajnas maldormi. Kiam mi sciigis pri tio, larmoj komencis al mi denove elflui. Kvazaŭ tion eksentante mia fratino ankaŭ ekploris refoje. Fine mia patrino ankaŭ ekploris. Ni tri ploris silente ne volante ĝeni unu la aliajn. Mi ne povis toleri tion kaj fine, ĵus nun, mi ilin laŭte riproĉis. Fine ili ambaŭ ĉesis plori kaj mi skribados de nun.

Sed la letero de mia J. ne donas al mi eĉ dekonon da kontento de mi atendita. Ŝia letero ne rakontas al mi pozitive veran staton de iu ajn afero. Se mi ŝin demandas pri tio, ŝi respondas, ke ŝi ne povas skribi alie, ĉar ŝi mem ne povas ĝin klare kompreni. Mi povas vidi, ke ŝi forte rekomencas mian amon, eĉ se ne tiom, kiom mi ŝin amas. Sed samtempe ŝi ripete skribas, ke ŝi timas, ke ŝi ne havas rajton esti amata de homo kiel mi. Iam mi pensis, ke ŝi tion skribas pro troa humileco, ĉar ŝi malsaniĝis post fianĉiniĝo; sed mi ne povas pensi, ke ŝi komprenas mian koron tiel supraĵe. Aŭ, ĉu ŝi eksentis malkontenton pri mia kapablo? Se jes, kaŭzo povas ekzisti. Se la fundamento de ŝia amo al mi staras sur mia kapablo, estas prave, ke ŝi ekperdas sian amon al mi, kiu de fianĉiĝo ĝis nun prizorgas malgrandan fabrikejon kaj eĉ en praktika vivo ŝajnas neniom progresi. Se la afero staras tiel, pri tio mi estas kulpa. Mi, kiu erare kredis, ke ŝia koro estas pli profunda, almenaŭ estas ebla pliprofundigi, ne povas krom min riproĉi pri

mia malsaĝeco. Via lasta letero estas tiel sentimentala, ke ĝi ne konvenas por vi; sekve mi povis pli klare imagi malfacilan staton kaj suferadon de mia J. per ĝi ol per la letero de ŝi mem. Sed mi povas diri, ke ĝi similas al la ŝia en tio, ke ĝi ne priskribas gravajn punktojn. Mi pensas, ke per racia kapo kiel la via vi nepre komprenas malklarajn punktojn de ŝia karaktero. Mi deziras, ke vi sciu, ke sciigi pri ili estas por mi pli agrable ol ne scii, kiel ajn malagrablaj ili estas. Por viaj simpatio kaj amikeco mi ne maldankas vin, kiu vi malgraŭ febro pro malvarmumo al mi skribis ne dormante tra la nokto. Mi sentas ne nur profundan emocion pro tio, sed ankaŭ mi volas konsili al vi, nepre ne fari tian penadon refoje. Mi neniam pensas instigi vin ripeti la samon. Bonvolu nepre lasi tian perfortaĵon de nun. Mi vin nur petas, ke vi priskribu klare pri la koro de mia J., eĉ se malonge. Mi deziras, ke vi koncentru diverĝantan lumon en unu fokuson. Komprenu la doloron de mia koro!

Mi amas lumon. Igu min suferi en la lumo! Flirti en la krepusko kiel la vesperto estas por mi doloro, turmento kaj puno, kiujn mia karaktero neas.

Ial mi ne intencas skribi al mia J. Je mia malfeliĉo via afabla letero donis al mi pli ĝeneralan komprenon pri ŝi, sed samtempe metis antaŭ mi pli profundan dubon. Kiam oni ekdubas pri la alia, la koro fariĝas kvazaŭ fosa ŝlimo.

Verdire, laŭ la instinkto de la amanto mi kelkajn fojojn eksentis neatenditan dubon en mia koro. Sed mi ankoraŭ ne perdas virecon, ĝin forigi tute senreste el la koro kaj tial ne estas necese, detale rakonti al vi pri tio.

Kia estas via sano lastatempe? Timinda estas la vento, kiu eniras la ĉambron tra fendetoj. Bonvolu vin gardi kontraŭ ĝi! Ĉe la lasta uragano nia dometo, ne kun zorgo

konstruita, allasis venton de ĉiuj fendetoj kaj ni suferegis, tiel ke post trankviliĝo de la uragano mi eniris sub la plankon kaj inter la araneaĵoj algluis fortan paperon sur la fendaĵojn, helpate de mia fratino. Malgraŭ tio ŝajnas al mi, ke mia patrino malvarmumis pro ŝtelirinta vento. Sciiginte, ke mia J. estas resaniĝanta, mi preĝas, ke oni ne aldonu al ŝi karnan ŝarĝon sur la animon. Kia malnobla virino ja estas ŝia patrino!

Malvarmo en la norda provinco sub la hela ĉielo penetras tra la medolo. Ankaŭ morgaŭ ni havos belan veteron. Kia nekonvena vetero por mia koro! Konvenaj por la du virinoj, ili jam ŝajnas endormiĝintaj, forgesinte malĝojon. Estas nokto, kiu min igas terure pripensi la misteron de la sorto, kiu venis kaj venas sur ilin kaj min.

Se vi tion trovos necesa, bonvolu doni la leteron al mia J., ĉar dum tagoj mi ne inklinos skribi al ŝi.

Estas nokto, en kiu mi deziras elkore preĝi! Doloriga nokto!

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 14an de Februaro 1914.

Kara A.!

Vi nun staras en la krizo.

Sur la krutaĵo estas tero, kie oni povas sin teni. Kaj vi devas ĝin ŝati.

Sub la krutaĵo ne estas tero; tie nur morto kaj malpleno. Kaj vi devas ilin malŝati.

Nu, en ĉi tiu momento, kaptu fraŭlinon J. firme! Perdi ĉi tiun momenton signifas, ke vi perdos fraŭlinon J. Via tielnomata humoro, via tielnomata malfido ne estas kompensaĵo, kiu valoras por vendi fraŭlinon J. Tio estas klara fakto, pri kiu vi devas scii plej bone. Kie

estas la sinjorino, kiu kiel kompensajon por la perlo serĉas porkon? Kie estas la ĝardenisto, kiu elradikigante la rozon donas ĝin por la semoj de la kardo?

Via pasio min mirigas. Sed via plendo ne konvena por via pasio plie min mirigas.

Amo estas kiel du kanabaj ŝnuroj. Nur tiu, kiu tordas senlace, fariĝas la posedanto de pli forta ŝnuro. Metu unu kanabon tien, kaj la alian ĉi tien! Unu malĝojos kaj la alia bedaŭros, kaj ambaŭ pereos.

Vi devas veni Tokio-n; se ne, fraŭlino J. devas iri al Sendai. Jen estas neniu rimedo krom tio. La krizo minacas. Alproksimiĝinte al la torento akvo subite ekrapidas. Ĉe la krizo la sorto estas ĉiam tirano, kiu levas dikfingron.

Neniu estas tiel senpartia kiel vi. Sed ankaŭ neniu estas tiel tro fidele pripensema kiel vi. Vi estas tro fidele pripensema pri senpartieco. Vi estas tro fidele pripensema pri tio, ke vi estas viro. Vi estas tro fidele pripensema pri la infaneco kiel sola filo de P riĉulo. Vi estas tro fidele pripensema pri subita malriĉiĝo. Vi estas tro fidele pripensema pri la patrino de fraŭlino J. Je plia malbono vi estas ĉiam tro fidele pripensema kun senpartia koro. Tial vi komprenas viajn malfortajn flankojn eĉ kiel virton. Nur kapti fraŭlinon J. estas nun necese al vi. Estas nur problemo, ĉu kapti aŭ ne. Krom tio, kia problemo ekzistas, pri kiu vi devas esti tro fidele pripensema?

Viaj nervoj devas vidi pli akre la delikatecon de la aferoj. Ke vi konas la koron de nur unu virino, ne pretekstu por tio, ke vi tion ne faras. Vi devis veni pli ofte Tokio-n kaj malproporcie al fraŭlino J. vi devis skribi al ŝi pli ofte. Kiom da fojoj mi vin instigis al tio! Sed vi min ne aŭskultis. Eble via sincera karaktero al vi ne permesis min aŭskulti. Vi amas fraŭlinon J. Via amo al ŝi estas eterna. Same fraŭlino J. diris, ke

ŝi vin amas. Ŝia amo devas esti eterna. Tio estas evidenta dedukto. Sed, vi estas juna ulmo, kiu jam disetendis siajn branĉojn, dum fraŭlino J. estas pli juna betulo, kiu nun pripensas, kiel disetendi la branĉojn. Via senpartieco fine alportos al vi venkon brilan. Sed mi timas, ke vi devos antaŭ tio fali kelkajn fojojn, por ĉirkaŭpreni tiun trezoron. Do mi intence tion diras al vi.

Mia korpo suferas pro malsana febro; mia animo plie suferas pro interna febro. Mia pasio flamas, flamas kiel flamo. Sed mi ne scias, per kio kaj por kio ĝi flamas. Mi deziras tion plene scii, sed samtempe mi rifuzas sciiĝi pri tio. Ne, kiam mi forte konscios pri la pasio, la flamo fariĝos kiel la lumo de karbeto kaŝita en la jam forbruliĝinta cindro. Kiam mi estas en la stato de senkonscio, la flamo ekflamas por elbruligi miajn animon kaj korpon samtempe. Mi rapide ion entreprenas. Kaj vidu, mi nenion elfaras. Mi jam ne konas min mem. Mi ne povas min rigardi kun respondeco. Mia koro estas la kapo de Jano. La vizaĝo kontraŭanta la okcidenton ne vidas la vizaĝon kontraŭantan la orienton. La vizaĝo kontraŭanta la orienton ne konas la vizaĝon kontraŭantan la okcidenton. Kiel la estinteco kaj la estonteco ne konas unu la alian, mia koro ne konas mian koron.

Malbeninda estas duobla vivo!

Naturo ĉie vivas duoblan vivon. Mi tion malbenas.

Via B.

(De B. al A.)

Tokio, la 14an de Februaro 1914.

Kara A.!

Kiam mi revenis enpoŝtiginte mian lastan leteron al vi kaj eniris en mian ĉambron, mi trovis tie fraŭlinon J. min atendantan.

Fraŭlino J. legis vian leteron. Per larmoj ĝis nun verŝitaj ŝiaj grandaj okuloj tremis kiel la luno reflektata de la akvo. Alie mi ne povis esprimi. (La koro, kiu povas postuli larmojn de siaj okuloj, estas enviinda.)

Ni temis pri edziniĝo de via fratino N. Fraŭlino J. insistis, ke mi devas edziĝi kun ŝi.

Mi ne estis instigita al decido de tio, sed en tiu ĉi momento mia decido fariĝis. Do mi volas edziĝi kun fraŭlino N. Kvankam vi tion komprenos kiel mian kapricon aŭ ne, mi deziras edziĝi kun ŝi, se ŝi nur jesos tion. Tio ne estas petego, sed deklaracio. Niaj interparoladoj devas esti ĉiuj deklaracioj. Nuligi deklaracion ne estas hontinde. Kontraŭe ni devas honti pri tio, ke ni ne povas deklari.

La skatolo de Pandoro fine estas renversita. Kiam ni interparolis, ŝia patrino eniris. Ankaŭ al ŝi mi konsilis, ke sendi fraŭlinon J. al Sendai estus pli bone. La patrino tuj ekatakis nin ambaŭ per la glavo de miaj vortoj: Ili ankoraŭ ne geedziĝis efektive. (Ŝi triumfante aldonis, ke ŝi aŭdis de fraŭlino J., ke karna rilato ankoraŭ ne ekzistas inter vi.) Dume fraŭlino J. ekmalŝaniĝis. Tio devas esti sufero por vi. (Tiel ŝi memdecidis kvazaŭ kun konvinko.) Viaflanke okazis ruiniĝo de via familio. Vi nuntempe ne devas pensi pri la problemo de edziĝo. (Tiel ŝi refoje konkludis trudeme.) Tial estas prave, ke pro reciproka oportuneco ĉi tiu problemo de geedziĝo prokrastiĝu ĝis ambaŭflankaj malfacilaĵoj solviĝos — tiel ŝi diris. (Kaj ŝi aldonis, ke tio, ke ŝi restis ankoraŭ virgulino, antaŭ ĉio faciligas la aferon. Mi ne povas imiti ŝian dirmanieron, sed ĉi tiuj malbenitaj vortoj eĉ nun bruligas al mi la orelojn kiel abomena brulstampilo.) Ŝi ne forgesis, aldoni al tio ion aldonan: Ŝi diris, ke, se la rilato inter vi kaj

fraŭlino J. interrompus portempe, mia restado ĉi tiea perdus kaŭzon. Aŭdinte nian laŭtan disputon ankaŭ la avo venis tien. Al ili mi kondukis kiel batalanto, je kio mi estas tre lerta. Ironio kaj insulto trafadis iliajn vizaĝojn kvazaŭ hajleroj. Eĉ nun diabla rideto aperas ĉirkaŭ mia buŝo, se mi rememoras, kiel plezurige la fervoro en mi silente kaŝita eksplodis kvazaŭ vulkana elsputo. Kion la avo diris, estis vortoj de l' tielnomata edoano: Ĉu vi fariĝus milionulo aŭ malriĉegulo, promeso estas promeso. Malsaniĝo de lia nepino estas kulpo de ili, kiuj pri ŝi zorgas, ĝis la tempo venos. Tial, se vi nuligas promeson, ili ne povas krom rezigni pri tio; sed, se vi deziras ŝin edzinigi al vi, ŝi staras sub via volo, kion vi farus al ŝi, eĉ se vi ŝin kuirus aŭ rostus. Kion ajn oni dirus, la nepino nun devas aparteni nepre al via familio. Estas superflue, ke mi min intermetis en ĉi tiun problemon. Unue estas eraro, ke ŝia patrino ekparolis pri la afero antaŭ mi — tiel li diris. Ke la maljunulo, kiu fraŭlinon J. ekstreme amegas kaj estas kvazaŭ mortinta sen ŝi, grincigis la dentojn pro perforta insistemo, estis mizera aspekto. Mi antaŭ ĉio eldiradis, kion mi volis. Eĉ kun pacienco mi nun ne volas resti en la domo, kiu miajn nervojn incitas, sen speciala kaŭzo. Mi postulas de vi opinion. Kion ajn Budao predikis, mi estas unu ekzistaĵo en ĉi tiu mondo. Ĉu renaskiĝo okazos aŭ ne, la estanteco estas por mi trezoro. Mi ne povas kovri ĉi tiun trezoron per ĉifono.

Mi ripetas, ke mi deziras edziĝi kun fraŭlino N., via fratino. Mi aldonas, ke fraŭlino J. gustumas plejeble grandan turmenton. Nur vidi tion deflanke, mallumigas al mi la tutan mondon. Decide finu la aferon iel!

Via B.

(De A. al B.)

Kara B.!

Viaj du leteroj estis ricevataj. Ke mia vizito al Tokio havos nenian bonan sekvon, viaj leteroj mem rakontas. Nia urbo Sendai atendas mian J. kun ambaŭ manoj malfermitaj. Mi ne pensas, ke, eĉ se malfortiginta, ŝia nuna sano ne permesos al ŝi vojaĝon al Sendai.

Ĉu mia J. gustumas plejeble grandan turmenton? Kaj eĉ ne skribante al mi pri tio? Kian eraron mi faris? Ŝi ne volas eĉ diri tion. Kiel pensi pri ŝi? Amo kaj malamo estas parenca. Ĉu vi deziras, ke mi travivu ĉi tiun teruran veron?

Kiel vi diras en tia subiganta maniero? Justan motivon povas kompreni eĉ mi, se vi parolus al mi sur egalaj kondiĉoj. Kaj vi estas homo, kiu faras belan deklaron. Jes, nuligi deklaron ne estas hontinde, kiel vi diras. Sed, ĉu vi ne trovas iom hontinde refoje deklari jam unufoje nuligitan deklaron?

Kiel vi diras, mi estas senpartia. Mi ne konas alian vojon ol la sinceran. Sen via atentigo pri tio, mia simpla karaktero jam ofte min turmentis. Mi kelkajn fojojn provis transiri en la pli malsimplan karakteron, kaj ĉiam ripetadis iri la saman vojon de malsukceso kaj humiliĝo. Sed nun mi ne eraras. Tiujn, kiujn mi povas ami, mi amas; sed tiujn, kiujn mi ne povas ami, mi malamas. Kaj samtempe mi tre bone scias, kiel dolore estas malami la alian. Kiel la instinkta refleksaĵo de ĉi tiu doloro mia koro deziras ami ĉiujn. Pro tio, ke mi amis, kaj ke mi malamis, mi povos ne penti, se io perdiĝos al mi, kvankam mi travivos ekstreman malĝojon; ĉar ĝi propre ne apartenas al mi. Mi postulas nur tion, kion mia amo pure kaj juste povas postuli. Por mi nur tiaj

aĵoj estas veraj. Mia amo devas naski nur la veron. Miaj piedoj devas stari nur sur la vero. Tial mi estas tro fidele pripensema pri ĉio. Kiel fremdulo oni povas kritiki pri tio, ĉu tio estas bona aŭ malbona. Sed por mi, ĉu estas bona aŭ malbona, tio estas nur necesa kondiĉo. Ĉi tiu kredo estas karaktera. Min ne detrante, oni ne povas detrui mian kredon. Ke mi devas notadi tian klaran tialon, montras ke via opinio pri mi havas mankaĵon. Eĉ vi saĝulo iam eraras. Vin gardu!

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, la 17an de Februaro 1914.

Kara A.!

Nur pro tio, ke vi estas pliaĝa frato de fraŭlino N., mi al vi proponis, ke mi edziĝu kun ŝi; sed vi montris al mi kruelan sintenadon de indiferenteco.

Mi al vi ne konfidis.

Bonvolu transdoni al via fratino la leteron al ŝi skribitan, kiun mi enmetas. Vi estas ne malgranda senprudentulo, sed mi pensas, ke vi ne estimas mian karakteron tiel, ke vi ĝin al ŝi ne transdonos.

Via B.

(De B. al A.) (telegramo).

Tokio, la 17an de Februaro 1914.

Nuligu leteron al fraŭlino N. laŭ peto de fraŭlino J.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, la 17an de Februaro 1914.

Kara B.!

Mi de vi postulas, ke vi klarigu al mi la veran staton de l' afero. Vi estas, kiuj montras kruelan sintenadon.

Mia fratino ne estas tera pupo, kaj mi ne leterportisto. Mi tion diras, ĉar mi estimas ŝian karakteron; sed vi kondukis al ŝi malserioze. Feliĉe la telegramo min atingis pli frue ol la letero, kaj mia fratino ne legis ĝin efektive; sed estas fakto, ke vi kondukis al ŝi malserioze. Kiel ŝia frato mi havas malamikecon kontraŭ vi, ĝis kiam mi ekscios pravigeblan kaŭzon.

Ne, mi ne bezonas vian klarigon. Viaj malĝentilaj kondutoj ĝisnunaj elokvente parolas pri la vero. Vi volas mian J. (*de ĉi tie estas strekita*) . . . estas terurege. Kial mia kapo havas kapablon pensi? Kial mia kapo ne frakasigas?

Ne forgesu, ke vi mem estas, kiu min tiel turmentas, ke mi fine malkonfidis al miaj amatino kaj amiko. Kaj vi ne estos pravaj, se vi trovos tion bagatela.

Via A.

(De A. al B.) (telegramo).

Sendai, la 7an posttagmeze de la 19a Februaro 1914.

J. hodiaŭ venis, restos kelkajn tagojn; letero sekvos.

Via A.

(De A. al B.)

Sendai, matene la 20an de Februaro 1914.

Kara B.!

Mi nur mallevas mian kapon. Estas miro, ke mi povas daŭrigi mian respiradon.

Mia J. ankaŭ mallevas sian kapon apud mi. Ni ambaŭ ne povas eĉ plori.

Nun mi rapidas raportti al vi nur tiom.

Via A.

(De A. al B.)

Sendai, matene la 20an de Februaro 1914.

Kara B.!

Sciiginte, ke mia J. forlasis Tokio-n hieraŭ matene nenion dirante eĉ al vi, mi al vi telegrafis por trankviligi. Mi pensas, ke la telegramo vin atingis, kaj mia rekomendita, mallonga letero ankaŭ.

Lastanokte ni ambaŭ pasigis nokton ne enlitiĝinte, sed sidante. Iun momenton ŝajnis al mi, ke mia kapo frakasiĝos kun bruo, sed kontraŭe ĝi nun estas terure trankvila. Do uzante ĉi tiun okazon mi nun prenas plumon, por ke mi skribu al vi pri ĉiuj okazintaĵoj plej eble trankvile kaj sincere. La horloĝo nun haltas ĉe la dekunua kaj duono, sed laŭ alteco de la suno estas nun eble ĉirkaŭ la 9a.

Ankaŭ hieraŭ mi vizitis la fabrikejon kaj laboradis kiel frenezulo. Ĉirkaŭ la deka mia fratino rapide alkuris kun telegramo. Tuj min atakis la ekstrema maltrankvileco, kiu aperis sur ŝia vizaĝo pro tio, ke la sendinto estas mia J. Mia fratino rigardis mian vizaĝon kaj mi la ŝian, kaj en tiu momento ni sentis reciproke ian kompaton. Kun la koro kiel eble plej perforte trankviligita mi iris al la fenestro kaj sensigelis la telegramon.

Mi legis: „Hodiaŭ iros kaj konfesos; atendu ĝis tiam.“ Mi ordonis, ke ŝi revenu hejmen kaj aranĝu por akcepti mian J., kaj senpolviginte la kapon polvoplenan mi surmetis malnovan soldatmantelon kaj kune kun ŝi forlasis la fabrikejon. Ĉe la disiro mia fratino min demandis: Ĉu ne io maltrankviliga okazis? Kolere mi respondis: „Silentu, nur revenu kaj aranĝu por ŝin akcepti; tio estas sufiĉa.“ Se mia fratino estus ŝanceliĝinta pli longe, mi estus povinta uzi perforton.

Kiam mi min trovis sola, mi kuris al la stacidomo kiel eble plej rapide. Komprenoble ŝi ankoraŭ ne alvenis tie. Unue rekonsciiginte mi serĉis la telegramon por legi ĝin refoje, sed, dum mi tion ne rimarkis, la papero estis disfrotita kaj tute malseka pro ŝvito. Do devigite mi legis horaron en la stacidomo kaj trovinte, ke eĉ la unua ekspreso ne atingas nian urbon pli frue ol je la 12a, mi tute senesperigis. Ial ofte kolizianta la aliajn, mi forlasis la stacidomon kaj eksidis sur la digon sude de la gasfabrikejo. Tie neniu estis. Mi tiam eksciis, ke ankaŭ hodiaŭ ni havas belan veteron. La vento estis tranĉante malvarma. Kian konfeson ŝi al mi faros, mi ne sciis; sed pensinte, ke mi devas aranĝi por elporti neordinaran skuon, mi volis trankviliĝi. Mi volis unuigi ĉiujn miajn penserojn en unu; sed, kiam mi rekonsciigis, mi estis senatente rigardanta ŝelon de l' oranĝo, kiu antaŭ mi kuŝis. Mi kelkajn fojojn penadis rekomenci, sed mi ripetadis ĉiam la saman, kaj tiam mi tion ne trovis tiel koleriga. Kiom da horoj pasis tiel!

Dume, mi pli kaj pli ekhavis liberan spacon en la anguloj de l' kapo, kaj fikse rigardante la ŝelon de la oranĝo mi rememoris kvazaŭ en la songo tion, ke mi intervidis kun mia J. en la aparta ĉambro de l' preĝejo. Mi sentis tiam la akran koloron de l' pendpentraĵoj por la dimanĉa lernejo, kiuj estis metitaj en la angulo de l' ĉambro, malgraŭ ke ili estis ekster vidangulo; kaj mi povis hodiaŭ reprezenti al mi tiun senton. Ŝajne ne moviĝante — ne povante moviĝi — kiel malvarma, ŝtona statuo mia J. staras kun mallevita kapo. Mi staras antaŭ ŝi. Antaŭ ol paroli, ni ambaŭ jam komprenas la deziron de la alia. Sed mi ne trankviliĝas, ĝis mi parolas la plej bonajn kaj plej belajn vortojn. Kaj, kiel bone estas, ke ni staras tiel! Tion vidante, eĉ la anĝelo ne povus

krom ridi. En miaj okuloj malrapide ekaperis larmoj dolĉaj, sed malgajaj, kaj kiam ili plenigis la okulojn, ili fariĝis guto kaj donante varmeton al malvarma vango, ĝi senbrue ensorbiĝis en la teron. Kvazaŭ distrite mi ĝuadis ĉi tiun iomete plezurigan malgajecon.

Malgajeco naskis malgajecon kaj larmoj fluis iom kaj iom pli forte. Kaj ili estis anstataŭataj per varmegaj kaj maldolĉaj. Dum kiam mi ne rimarkas, ke la figuro de la pura knabino J. malaperis de antaŭ mi kaj en mia malklara konscio sensenca mallumo ekprofundiĝis. En la lumo de l' brila ĉielo mi min sentis tute ĉirkaŭita de mallumo. Nigrega malespero min ĉirkaŭis. Mi ne povis eĉ moviĝeti. Kial mi vidis mian J.? Subpremite de tiu ĉi demando mi kaŭriĝis kiel ŝtono sur la digo kovrita per herbetoj.

Dum iom da horoj sekvantaj mi estis vivante morta; mi vivis en morto. Mirigite de fajfado de la fabrikejo, kiu subite apud mi eksonis, mi renaskiĝis en la mondon de la horo, kaj trovis laŭ la horloĝo, ke estas jam 11a kaj duono. Sed ne restreĉinte la horloĝon de hieraŭ, mi ne vivis en la mondo de l' horo. Tuj kiam mi tion rimarkis, mi, kiu jam perdis mian J., refoje alkuris al la stacidomo, por ke mi ne perdu almenaŭ okazon vidi ŝian korpon. De la elirejo pasaĝeroj eliris svarme. Kiam mi trovis la figuron de mia J. malgrasa pro malsano, laca pro vojaĝo kaj malhela, ne memorigante la virgulinon en la plej malantaŭa parto de l' lasta amaso, mi sentis, kvazaŭ mi estis subite retirata malantaŭen kaj pro ekstremaj amo kaj malamo al ŝi mia kapo estis kvazaŭ frakasita en pecetojn, kaj antaŭ mi fariĝis tute mallume.

Sed la okazo min altrenis al ŝi. La okuloj de mia J., kiuj ŝajnis duone perdintaj konsciencon, min fikse rigardis, kvazaŭ ili aŭ miris pri mia vidiĝo simila al almozulo, aŭ

estis tute trankvilaj. La vortoj, kiujn la okuloj parolis, estis tute aliaj ol la antaŭaj, sed je malĝojo la okuloj mem rezervis antaŭajn figurojn neniom ŝanĝitajn.

Post malvarmaj salutoj ni duope ekiris. Kiam ni silente iris ĉirkaŭ 100 metrojn, mi ŝin demandis abrupte: „Ĉu sinjoro B. fartas bone?“ Kaj mia J. devigite respondis: „Jes!“ Ni ambaŭ aŭ koleris aŭ hontis pri tio, kaj poste ni atingis mian domon en silentado.

La maltrankvila mieno de mia fratino, kiu nin akceptis ĉe la enirejo, akiris plian palecon en tiu momento, kiam ŝi vidis nin ambaŭ. Mi pensas, ke niaj mienoj esprimis pli grandan gravecon ol la de ŝi atenditan. Kiam mia J. vidis mian fratinton, ŝi volis fratine diri al ŝi ridetante: „Vi estas fraŭlino N.?“ Sed apenaŭ ŝi tion eldiris, ŝi ekploris mallevante la kapon kun tremanta hararo. Pro tiu tro neatendita afero mia fratino faris nur grandajn okulojn. Plorante mia J. estis kondukata en la ĉambron, kaj mallevante la vizaĝon ĝis la mato, ŝi mallaŭte ploradis. Mia fratino, kiu alportis al ni teon, ŝanceliĝis ĉe la interĉambra glitpordeto, ne kuraĝante eniri en la ĉambron. Mizera atmosfero jam plenigis mian domon. Dum mi silente observadis mian J., mi eksentis ian kompaton al ŝi. Ŝi ploradis, ke mia kompato iom post iom ŝanĝiĝis en senpaciencon. Mia senpacienco ŝanĝiĝis iom post iom en koleron. Sed ne kuraĝinte ŝin riproĉi, mi subite ekstaris, malĝentile demetis la mantelon, ĝin pendigis al najlo kaj sovaĝe residiĝis. Mia J. ploradis, kvazaŭ ŝi tion ne rimarkis. Mi nur povis silente rigardi ŝian tremantan hararon kaj maldikan nukon. Dume kolero refoje transiĝis en kompaton. Profunda kompato, kiun travivas nur la patrino, al kiu estas lasita neniu rimedo krom nur rigardi ŝian solan infanon mortantan eĉ ne kriante — tiu kompato plenigis mian koron. Mi kelkajn fojojn

englutis ion, kio aperadis en la profundaĵo de l' nazo kaj laringaj kanaloj — preĝante en la koro fervore: „Estu trankvila! Estu trankvila!“

Kiam ŝi ekstaris forte premante la okulojn per naztuko tri fojojn, kvazaŭ ŝi jam rezignis kaj decidis, mi ankaŭ iom trankviliĝis. Metinte fajrujon inter ni, ni sidigis unu kontraŭ la alia. La fajrujo, sur kiun neniu de ni etendis la manojn, estis kvazaŭ malhelpaĵo inter ni. Mia J. ŝajnis ordigi por momento la vortojn dirotajn en sia kapo, kaj tuj ŝi komencis kun tremantaj, sed fortaj kaj klaraj vortoj:

„Mi vin nur petas min pardoni. Vian ĝisnunan sentadon mi kunsentis kun granda sufero neelportebla, sed ĝis hodiaŭ mi nenion povis diri al vi. Mi pensadis, kaj pensadis, sed estis vane. Sed kiam mi antaŭhierau petis sinjoron B. kontraŭ lia volo, ke li nuligu la edziĝon kun fraŭlino N., mi fine decidis kaj skribinte ĉi tion de tiam ĝis lasta nokto malfrue, mi forlasis la hejmon hodiaŭ matene ankoraŭ en krepusko. Mi hontas, ke mi tiel malbele skribis, sed mi, vin petas, ke vi ĝin legu min kompatante. Mi timas, ke mi ekploros, se mi ekparolos.“

Tiel dirinte, mia J. elprenis el sia poŝo ion skribitan sur la al mi jam konata, verdeta leterpapero en malgrandaj literoj, kaj ĝin metis antaŭ min. Tiu ĉi ceremonia maniero min instigis al ne malgranda antipatio; sed mi ne povis krom ĝin preni kaj legi. Tion mia J. kunportos ĉe reveno kaj montros al vi senpere.

(Skribaĵo de fraŭlino J.)

Kara A.!

Venis la tempo, kiam mi devas al vi konfesi tion, pri kio eĉ mi mem ne sciis. Mi deziras preferi morton ol

diri tion, sed mia malforta korpo ankoraŭ ne mortas. Dum mi ne mortas, mi ne povas vivi min mensogante. Bonvolu kredi mian sincerecon en tiu ĉi skribaĵo. Mi vin petas, ke vi bonvolu kredi nepre tion, ke tion ĉi skribas tiu, kiu al vi fidas.

De infaneco mi ne povis liberiĝi de l' inklino, min senti kompatinda, kaj kiam mi atingis aĝon 15- aŭ 16 jaran, mi ekhavis malgajan koron timantan antaŭ la estonteco. Precipe antaŭ la viroj mi nur timadiŝ sen kaŭzoj. Ankaŭ en Noboribecu, kiam mi eksciis, ke vi min vidis de l' unua etaĝo, mi kompreneble ektimis, ke mi sentis malvarmon en la koro. Mi jam decidis en la koro, ke iam viro aperos kaj min ĵetos en la pli profundan malfeliĉon. Kelkajn fojojn mi kontraŭparolis sen iaj kaŭzoj eĉ mian avon nur pro tio, ke mi lin timis pro lia vireco. Kiam mi unue aŭdis pri Dio, mi en la koro pensis, ke Li estas viro, kaj nur timis.

Sed, vi eble ne scias, ke mi la trian tagon antaŭ forlaso de Noboribecu min kaŝis en loko rigardebla de neniu kaj longe vin rigardis, kiu ludiŝ en la ĝardenoj kun geknaboj. Estis tiam, kiam mi min sentis plej hontema. Ĉiutage, kiam vi vin turnis al mi, mia koro batis kvazaŭ tumultosonorilo; sed mi ne kuraĝis foriri de tie. Poste, kiam mi revenis al mia ĉambro kaj vidis mian avon, mi sentis ian neeldireblan riproĉon de l' koro, sed mi neniel volis forgesi, kiun mi vidis. Mi volis tion rezervi en la profundaĵo de l' koro kaj vivadi tiel, kiel mi estis tiam. Pri l' ideo de edziniĝo mi sentis timon, eĉ nur pripensi pri tio. Mi decidis, ke mi dum mia vivo rakontos pri tio al neniu. Sed, kiam mia avo diris, ke ni forlasos la banurbon la sekvantan tagon, mi deziris restadi pli longe. Pretekstinte difektiĝon de la fervojo pro superakviĝo mi eĉ plorante insistis restadi plie.

Kiam mi intervidis kun vi en la preĝejo, por diri la veron, mi ne sciis, kion respondi. Eĉ se mi estus devinta morti pro tio, mi ne povis toleri, ke vi edziĝos kun alia ino; sed al mi estis nepenseble terure, edziĝi kun vi kaj apogi mian estontan sorton sur vin.

Unu semajno post la solena fianĉiniĝo estis por mi neforgesebla, ĉar mi tiam ekpensis, ke mi ne plu povas disiĝi de vi. Mia koro estis kvazaŭ la akvo apud la akvoturniĝo. Dum mi sentis terure, mi estis altirata al vi. Bonvolu min pardoni, se mi uzas esprimon ne konvenan por la virino, ĉar nun mi ne devas diri la malveron. Unue tiam naskiĝis en mia koro seksa deziro, kaj mi ekgustumis solecon, doloron kaj malĝojon, kiujn mi neniel povis forigi, se mi estas sola. Mia koro pli mallumiĝis kvazaŭ translokita de la supra breto sur la malsupran. Mi hontis kaj suferis turmentege antaŭ Dio, kaj iufoje eĉ preĝis kun larmoj, dezirante ree fariĝi antaŭa mi; sed kompreneble mi neniel tion povis kaj deposte mia koro komencis duoblan vivon. Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke mi ĉe disiĝo de vi fariĝis senespera kvazaŭ histeriulino kaj vi min terure riproĉis? Mi ekpensis kvazaŭ perfidita. La instinkto de l' virino min igis forgesi kutimon de l' mondo. Kaj krom tio, mi tiam sentis intuitive, ke mi devas disiĝi de vi por eterne. Nun mi trovas tion tre mirinda, sed eble mia koncentrita koro travidis la estontecon, kvankam tre malklare. Kiam mi disiĝis de vi en Ueno kaj forlasis la stacidomon, mia koro ploris dirante: „Jam finiĝis, jam finiĝis!“

Longan tempon mi ne liberigis de tiu sento. Deposte mi fariĝis virino, kiu pli timis la estontecon ol antaŭe, kaj ĉiam travivadis sendormajn noktojn kaj dumtagajn kapdolorojn. Dume mi ricevis sciigon, ke via patro mortis, kaj poste teruran sciigon pri la bankroto. Tiam,

kiel mi deziris tuj veturi al vi kaj plori kun vi! Sed tiam mia kaduka korpo jam havis teruran malsanon kaj mia patrino insiste malpermesis al mi iri al vi. La pastro ankaŭ diris, ke mia alveno vin nur malhelpos. Suferante en la koro mi min fermadis silenta en la domo kaj pensis nur pri vi. Sed, mi devas diri al vi la veron, ke en la profundo de mia koro estis kaŝita io stranga, kio ne volis iri al Sendai. Mi ial sentis, ke, se mi senpripenseme iros al Sendai, io pli terura devas okazi. Mi ne povas trovi alian rimedon ol nur legi viajn respektindajn leterojn kaj min plibeligi kaj plialtigi. Ĉiam, kiam mi ricevis leteron de vi, por momento mia koro sin sentis klara, kvazaŭ subite tagiĝis, en kia ajn malĝoja stato ĝi estis, kaj mi intencis tuj respondi al vi.

Tiel, dum kiam la aŭtuno sekvis la someron kaj la vintro la aŭtunon, mi iom kaj iom eksciis disvolviĝon de l' koro, pri kiu vi parolis. Senkonscie mi pli kaj pli perdis timon antaŭ la viro kaj pli kaj pli sentis forton de l' virino. En la koro mi juĝis pri la ago de mia vera kaj mia adoptinta patrino, kaj mi sentis senfinan malamon al la adoptpatrino, pensante, ke mi devas senti ĉiam honton pro ekzistado de tia patrino, dum mi sentis kompaton al mia vera patrino pro tio, ke ŝi reteneme vivis ne vekiginte kaj timante la viron. Sed pri mi mem mi tute ne scias, kion fari. Nur tiam, kiam mia patrino sciiginta pri la nova stato de via familio subite ekprojktis min apartigi de vi, mi ne povis resti obeema kiel antaŭe. Mi eksciis, ke mi ne devas resti obeema.

Ĉi tiun jaron sinjoro B. subite revenis el la insulo Ogasauara. Skribinte nur la nomon de sinjoro B., mi sentas, kvazaŭ la koro al mi rompiĝas.

Ĉar sinjoro B. rakontis al ni rakontojn du—tri fojojn en la dimanĉa lernejo, mi jam lin konis laŭvizaĝe. Tiam

el la viroj mi neniun pli timis kaj malamis ol lin. Kiam mi aŭdis, ke vi estas intima amiko de sinjoro B., mi ektimis eĉ vin. Sed mi trovis en vi ion ĝentilan, dum mi tiam trovis en sinjoro B. nur ion timigan. Antaŭ ol mi fianĉiniĝis kun vi, mi ricevis du anonimajn leterojn. Ial mi tuj eksciis, ke ilin sendis sinjoro B. En ili li skribis al mi pri viaj karaktero kaj inklino sen ia ajn trograndigo. Leginte ilin mi decidis, montri ĉiujn viajn leterojn al la pastro. Se mi ne estus ricevinta leterojn de sinjoro B., mi ĉiufoje, kiam vi al mi skribis, estus nur pensinta, ke la viro estas timinda. Ĉar mi sentis, ke mi devas lin obei en ĉio ajn, mi en la koro sekrete maltrankviliĝis, kiam mi sciigis pri lia transloĝiĝo ĉe min. Jes, tiam mi ankoraŭ ne liberiĝis tute de la antaŭa antaŭjuĝo.

Kiam sinjoro B. transloĝiĝis ĉe min, li estis tute malhumila, kaj ne trankviliĝis, ĝis li faris ĉion laŭ sia volo. Dank' al tio mi iom povis ĉesi lin timi. Tuj kiam li transloĝiĝis ĉe min, mi pensis, ke estus bone, se li edziĝus kun via fratino fraŭlino N. Sed mi mem ĉiam lin evitadis, kaj en la fundo de l' koro eĉ sentis antipation al li.

Iam — en pluva tago — sinjoro B. rakontis al mi pri diversaj aĵoj tute amike. Tiam mi lin ekamis, dum sinjoro B. kompreneble tion ne eksciis — bonvolu min pardoni, mi petas. Bonvolu min pardoni, ke mi konfesas al vi tiel malkaŝe. Tio, kion mi devas diri, estas tute sama, kia ajn estus la dirmaniero. — Tiam, kvazaŭ mi estis sorĉita de la diablo, mi diris al sinjoro B. ĉion, kion mi rezervis en la koro. Sed mi ne deklaris al li mian amon. Li ankoraŭ neniom aŭdis de mi pri tio, ke mi lin ekamis de tiam. Mi mem eksciis tion rememorinte. Tiam — mi ĵuras al Dio — mi decidis kaj pensis, ke mi estos via edzino.

Ju pli mi komprenis la parolojn de sinjoro B., des pli klare mi sentis mian vekigon. De kiam mi konis sinjoron B., mi trovis mian seksan deziron vekigantan en la koro ial natura, kaj mi ne sentis jam penton. Ankaŭ mia religia kredo tute ŝanĝiĝis, kvazaŭ renversite. Al mi ekprosperis vidi klare, kio en la mondo estas vera kaj kio malvera; sed tion mi nun diras nur rememorante tiamajojn. Tiam, kiel via edzino ĝisfine, mi klopodis forjeti la strangan forton de sinjoro B. eĉ riskante la vivon. Deposte al mi komenciĝis doloraj tagoj. Ĉiun fojon, kiam mi ricevis leteron de vi, mi sentis alvenon de fortaj helpantoj, sed iel mia koro alkutimiĝis al la sento de doloriga katenon; tamen, ĉu mi ĉesis eĉ momente vin estimi? Mi nun pensas, ke estus pli bone, se mi estus farinta tion! De tiam ankaŭ sinjoro B. estiĝis meditema. Ni aparte suferis apartajn suferojn. Kiam mi iel povis malproksimiĝi de li, tiam lia farto ĉiam malboniĝis; kaj kiam la meditemo de sinjoro B. iom malpli profundiĝis, tiam mia koro suferis pro netolerebla soleco kaj mi ekhavis aŭ hemopteon, aŭ febron. Sed pri tio mi tiam ne konsciis klare. Ĉu vi kredas al mi? Mi bataladis, kiom mia korpo permesis, kiom mia koro permesis. Mi insiste pensis, ke mi pri tio ne rakontos al sinjoro B., eĉ se mi mortus; ke mi apartenas al vi. Pro doloro mi kelkfoje proponis al sinjoro B., ke li edziĝu kun via fratino fraŭlino N. Tio estis mia egoismo, mi ne pensis pri la estonteco de fraŭlino N. Mi nur klopodis, kiamaniere ajn min liberigi de sinjoro B. Kaj sinjoro B. decidis edziĝi kun via fratino; sed, kiam mi terure febrigiĝis post tio, li tuj tion nuligis. Aliflanke vi de mi postulis en ĉiu letero, malkovri al vi mian koron. Kiel vi vidas, mi neniel povis respondi. Kiam mi prezentis al mi dolorojn, kiujn vi devas senti, dum

vi flegante vian maljunan patrinon kuraĝe laboradas por vivo de mateno ĝis vespero kaj min rigardas kiel solan lumon, kiom da fojoj mi ja deziris eĉ preferi morton. Efektive morto estis pli facila por mi; sed mi jam estis la homo, kiu, kiel mi antaŭe skribis, ne povas trakti la aferon malserioze. Mi jam havis forton, ke mi pensis, vivi en kia ajn suferado, dum mi vivos. Ju pli forte ni, mi kaj sinjoro B. suferis, des pli profunde ni amis unu la alian; ne, ne ni, sed mi. Do kontraŭ lia volo mi refoje al sinjoro B. proponis, ke li edziĝu kun via fratino fraŭlino N. Li skribis al vi tiun ĉi fojon kun pli granda decido ol antaŭe.

Mi unuan fojon spiradis kiel la homo elsavita el vakuo, sed samtempe mi vidis alian profundan veron. Kun kia koro mi povos edziĝiniĝi kun vi? Kaj kun kia koro sinjoro B. edziĝos kun fraŭlino N.? Kiam mi tion eksciis, mi trovis en mia koro malnoblan, malbelan penson mal-superantan eĉ mian adoptpatrinon. Depost tio mi ne konas dormon, nek malsanon. Mi nur pensadis pri tio ne ĉesante eĉ momenton, kaj fine mi ankoraŭfoje petis sinjoron B. telegrafe nei edziĝon kun fraŭlino N. Kaj mi decidis, konfesi al vi ĉion persone.

Ĉar mia koro estis konfuza pro malkvieteco, mia skribaĵo povas havi malĝustajn kontekstojn kaj esprimojn; sed mi kredas, ke vi ekkomprenos gravajn punktojn per tio.

Mi konfesas, ke mia koro amas sinjoron B.

Mi vin ne malestimas. Kiel antaŭe, tiel nun vi estas por mi viro pura kaj forta. Mi vin estimos por eterne, kaj vin petas, ke vi permesu al mi tion fari. Sed mia sincera karaktero min igas vin estimi kaj ami sinjoron B.

Mi estas via fianĉino. La promeso de gefianĉiĝo estas reciproka; tial, se vi postulas plenumi la promeson, mi

devas fari tion. Mi ne povas krom edziniĝi kun vi kun malplena koro.

Mi amas sinjoron B., sed pri tio mi al li ne diris eĉ unu vorton; kompreneble mi estas libera de la ago, kiu estas permesata nur inter la geamantoj.

Mi vin petas, ke vi rakontu al via fratino detale pri la afero, por ke ŝi ne malkomprenu ĉion. Se vi permesos, mi senpere ŝin pardonpetos pri tio.

Via J.

— — — — —
Legante tion, miaj okuloj kelkfoje ĉirkaŭkuris sur la papero ne funkciante. Mi revenis kaj revenis al la komenco, kaj kiam mi finis legi, estis jam krepusko.

Kiam mi ricevis telegramon de mia J., kiam mi ŝin akceptis en mia domo, mi preĝis Dion, ke mi trovu ian rimedon eĉ la plej malfacilan, dum mi sentis aliflanke alvenon de la fino; sed ĉio ĉi tio estis vana. La sorto min batis blinde rekte al la fronto. Viaj lastaj leteroj pike min rememorigas pri ĉio.

Al vi, kiu legos ĉi tiun leteron, nun solviĝos ĉiuj enigmoj; same al mi jam nun solviĝis ĉiuj. Viaj ĝisnunaj leteroj havis ĉiuj gravegan signifon. Mi koleris, kiam mi devis ridi, kaj ridis, kiam mi devis koleri. Mian malfortecon mi nur priploras, kompatas.

Mi povas bone kompreni la koron de mia J. Ŝi estas prava. Kaj mi miras, ke ŝi ne perdinte la vojon marŝis pli antaŭen ol vi. Se ŝia vekiĝo estus pli malforta! Se ŝia agado havus iun ajn riproĉindajon! Se mi estus naskita pli malnobla! Tiam, tie ankoraŭ restus la rimedo, ŝin konduki refoje al mia brusto.

Mia fratino ĝentile eniris en la ĉambron kaj foriris almetinte karbon en la fornon. Tiam mi kuraĝis levi la kapon kaj diris al ŝi kun decido, je l' laŭdo: „Mi vin

bone komprenis. Miaflanke mi havas nenion por diri.“
Ŝi ankaŭ levis la kapon kaj min aŭskultis, sed jen varmegaj larĵoj ekfluis sur ŝiaj vangoj. Kontraŭe en mia koro regis forta trankvileco, en kiu mia lasta ĵaluzo kaj memrespekto sin kaŝis. Pri tio mi nun hontas.

Krom tio, ke mia patrino de tempo al tempo tuis, la du virinoj estis tute trankvilaj eksentinte timon pro graveco de l' afero, kvankam ili ne sciis pri ĝia enhavo. Ni ambaŭ nur sidadis unu kontraŭ la alia. Krom tio, ke mia J. de tempo al tempo ŝtelploris tremigante la ŝultrojn de rememoro, la tuta ĉambro estis morte kvieta, kaj dume la nokto pasis kaj tagiĝis. En silento ni vidis lumon de l' mateno, kiu iom post iom solece kaj malakre pliblanĝis.

Ĉi tiun nokton mia J. forveturos por reveni al vi. Mi atendas vian deklaron.

Mi aldone skribas, ke mia J. intervidis kun mia fratino. Estos nenecese, detale raporti al vi pri la malĝoja intervido de la du virinoj. Mia fratino diris, ke antaŭ ĉio ŝi pardonas mian J.

Via A.

(De B. al A.)

Tokio, nokte la 21an de Februaro 1914.

Kara A.!

Malprava mi estis, kiu vin instigis elporti la sorton.

La ondoj de l' sorto senkompate ĵetis nin tri al la ŝtonego de l' vero. Kiu povas liberiĝi de ĝi?

Ni tri ĉiuj vundiĝis, terure vundiĝis. Vi devas plori, fraŭlino J. devas plori, kaj unue eksciinte verajn larĵojn mi ankaŭ ploras.

Ĉiuj homoj ridas je ni tri. Senmodereco, senhonteco, senprudenteco, frivoleco kaj nemoraleco!

Malkaŝan veron, veran sincerecon ni tri eksciis. Ni tri, kiuj estas nerepacigeblaj malamikoj kaj samtempe samsentaj martiroj, devas iri ĉiu sian vojon ne erarante, nek ŝanceliĝante.

Estu beno sur via malvenko!

Estu kompatato sur la renaskiĝo de fraŭlino J.!

Estu malĝojaj larmoj sur mia venko!

En fraŭlino J. mi trovis mian kompletajon. Mi unue al vi dediĉas ĉi tiun bonan sciigon.

Mi ĵuras, ke mi kun mia J. kuraĝe batalos ĉiujn ventontajn batalojn nenion evitonte — por ni ambaŭ, por vi kaj por la homa vivo, kiun ni devas kreskigi.

Vian amikecon kiel oro, vian materian helpon, vian konfidon, vian malbonstaton, bonvolon de fraŭlino N. — ĉion ĉi tion mi kuraĝas oferi. Tio estas mia atestaĵo por tio, kiel mi povas ami kaj estimi mian J.

Sed mi timas, ke mia malbona farto min ne starigos longe sur la batalkampo. La aferoj de homa vivo estas malfacilaj kaj malproksimaj. Malĝojigite vi devos ekstari tie, kie ni pereos. Akceptu nian senfinan bondeziron por via estonteco malĝoja, sed eble vivoplena.

Mia deklaro finiĝis. Venis jam la tempo, en kiu mi devas preni glavon.

Via B.

(De A. al B.)

Sendai, matene la 23an de Februaro 1914.

Kara B.!

De la nesto, kie loĝas mia patrino, kies malsano iom post iom pligraviĝas, kaj mia fratino, kiu perdis amon...

Sur mia tablo nun kuŝas eluzita horloĝo kun viaj leteroj.

Kvazaŭ kompatante sian posedanton la horloĝo haltas
ĉe la 11a kaj duono. Malsaĝa, sed iom kompatinda
horloĝo!

Je mia miro, mi nun neniel intencas restreĉi risort-
eton de tiu ĉi horloĝo.

Ho, mia koro, atendu pacience!

Ĉe l' rando de la matena ĉielo nun la suno de la
23a de Februaro ekleviĝis.

Mi estas ĝin rigardanta.

Via A.



KLARIGOJ DE LA NOTOJ EN LA TEKSTO

- 1) (p. 8) Ŝiobara: Unu el la plej famaj banlokoj en Japanujo.
- 2) (p. 9) Haneda: Apudmara vilaĝo inter Tokio kaj Jokohamo.
- 3) (p. 10) Koiŝikaŭa: Unu el 15 kvartaloj de la urbo Tokio.
- 4) (p. 16) Inari-templo: Templo de diigita vulpo. Superstiĉemaj japanoj vizitas ĉiam tian sanktejon, se al ili io mal-feliĉa okazas.
- 5) (p. 17) Sendai: La plej granda urbo en la nordorienta provinco de Japanujo.
- 6) (p. 18) Noboribecu: Fama banloko en la insulo Hokkaido.
- 7) (p. 18) Hokkaido: Unu el 5 grandaj insuloj, kiuj formas ĉefan parton de Japanujo; kuŝas plej norde.
- 8) (p. 18) Jukatao: Simpla, kotona vesto, kiun la japano portas post banado, precipe en la somero.
- 9) (p. 27) Aomori: Urbo kaj haveno kuŝanta en la plej norda parto de Honŝuu, la plej granda insulo; de ĉi tie la ŝipo veturas al diversaj lokoj de Hokkaido.
- 10) (p. 27) Edoano: Edo estas malnova nomo de Tokio, kaj kiu naskiĝis kaj kreskis en Edo, sin nomas Edoano kaj estas fera.
- 11) (p. 33) Ponto Oĉanomizu: Ponto kondukanta trans la rivero Kanda, kiu fluas inter la kvartaloj Hongo kaj Kanda.
- 12) (p. 38) Niŝinasuno: Urbeto apud Ŝiobara; vizitanto de Ŝiobara forlasas la vagonaron ĉie tie.
- 13) (p. 38) Ĝinrikio: Primitiva japana veturilo, kiun la homo mem trenas, sidigante la gaston sur ĝi.
- 14) (p. 39) Zoonio: Speco de supo farata el kelkaj legomoj, kokajoj kaj nepre moĉio (kuko farata el rizo); japano ĝin manĝas matene de la 1a ĝis la 3a de Januaro festante la novjaron.
- 15) (p. 41) Ogasauŝara: Insuletaro kuŝanta ĉirkaŭ 700 kilometrojn sude de Tokio.
- 16) (p. 46) Kadan: Ĉirkaŭurbo de Sendai, signifas florgardenon.

- 17) (p. 46) Hirose: Rivero fluanta apud Sendai.
- 18) (p. 46) Ĝinrikiisto: Veturigisto de la ĝinrikio.
- 19) (p. 47) Ueno: Komenco punkto de l' fervoja linio al la direkto de nordorienta provinco.
- 20) (p. 48) Sinjoro J. Hukuzaua: Granda homo en la komenco de Meigi, kiu fondis la Keio-Universitaton.
- 21) (p. 48) Buŝidoo: Moralo de japana kavaliro.
- 22) (p. 48) Meigi-Monarhirestarigo: 1806 Keiki Tokugaŭa, la 15a ŝoguno, rezigninte je la ŝoguneco redonis regadon al la imperiestro, kaj tiel monarĥio restariĝis.
- 23) (p. 48) Lauce: Fama ĥina filozofo antikva.
- 24) (p. 49) Bakei: Fama japana pentristo.
- 25) (p. 49) Toohoku-Instituto: De fremdaj pastroj fondita lernejo en Sendai.
- 26) (p. 54) Mato: En Japanujo la planko de l' ĉambro estas ĉiam kovrita per matoj kaj oni esprimas la amplekson de l' ĉambro laŭ la nombro de matoj. Unu mato estas longa ĉirkaŭ 0,9 metron kaj larĝa ĉirkaŭ 0,45 metron.
- 27) (p. 63) Osako: La plej granda komerca urbo kaj samtempe haveno en Japanujo.
- 28) (p. 94) La 11a de Februaro estas tago de kronado de la unua japana imperiestro Ĝinmu. Japanoj festas ĉi tiun tagon kun la novjaro kaj la naskiĝtago de la imperiestro kiel tri grandajn, naciajn festotagojn.

INTERNACIA MONDLITERATURO

La kolekto estas submetita al la gvidado de **Prof. D-ro Joh. Dietterle**, direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko. Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĉis nun aperis:

Volumo 1:

Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo. Eposo idilia. El la germana originalo trad. *B. Küster*. 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo de *Prof. D-ro Joh. Dietterle*. 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

Niemojewski, A.: Legendoj. El la pola originalo trad. *B. Kuhl*. Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski*. 2a, korektita eldono. 1923. 74 paĝoj. Kartonita.

Volumo 3:

Turgenev, Ivan S.: Elektitaj noveloj. El la rusa originalo trad. *A. Mexin*. 1923. 81 paĝoj. Kartonita.

Volumo 4:

Raabe, Wilhelm: La nigra galero. Historia rakonto. El la germana originalo trad. *Prof. D-ro Fritz Wicke*. 2a, korektita eldono. 1922. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 5:

Hildebrand: El la „Camera Obscura“. El la holanda originalo trad. *H. C. Mees*. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 6:

Irving, Washington: El la skizlibro. El la angla originalo trad. *H. L. Elvin*. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl. El la germana originalo trad. *Eug. Wüster*. 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:

Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj. El la bulgara originalo trad. *Iv. H. Krestanoff*. 1922. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 9:

Ŝalom-Aleĥem. Perec.: Hebreaj rakontoj. El la hebreaj originaloj trad. *Is. Muĉnik*. 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

Volumo 10:

Puŝkin, A. S.: Tri noveloj. El la rusa originalo trad. *D-ro A. Fiŝer*. 1923. 67 paĝoj. Kartonita.

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

INTERNACIA MONDLITERATURO

Volumo 11—12:

Ariŝima, T.: Deklaracio. Romano. El la japana originalo trad. *T. Tooguu*. 1924. 125 paĝoj. Kartonita.

Volumo 13:

Poe, Edgar, Allen: Ses noveloj el „Rakontoj de mistero kaj imago“. El la angla originalo trad. *A. Frank Milward*. 1924. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 14:

Balzac, Honoré de: La firmao de la kato, kiu pilkludas. El la franca originalo trad. *Paul Benoit*. 1924. 75 paĝoj. Kartonita.

Volumo 15:

Doroŝeviĉ, Vlas: Orientaj fabeloj. El la rusa originalo trad. *Nikolao Hohlov*. 1924. 64 paĝoj. Kartonita.

Prezo po volumo 1.—Gmk.
La kolekto estas daŭrigata!

Dietterle, Prof. D-ro Joh.: La Vendreda Klubo.
11 originalaj artikoloj. Kun unu portreto kaj kelkaj desegnaĵoj. 1921. 115 paĝoj. broŝurita 1.60 Gmk.

Forge, Jean: Abisĉoj. Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj. broŝurita 1.80 „
bindita 2.75 „


Luyken, H. A.: Stranga Heredaĵo. Romano originale verkita. 1922. 320 paĝoj. broŝurita 3.— „
bindita 4.— „


Luyken, H. A.: Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babela historio. Originalo verkita. 1924. 304 paĝoj. broŝurita 3.— „
bindita 4.— „

Privat, D-ro Edmond: Historio de la lingvo Esperanto. Deveno kaj komenco 1887—1900. 1923. 2a eldono. 74 paĝoj. kartonita 1.25 „

Privat, D-ro Edmond: Vivo de Zamenhof. Kun portreto de D-ro L. L. Zamenhof. Speciala eldono por mezkaj malbonvalutaj landoj. 1923. 109 paĝoj. kartonita 2.— „
bindita 3.— „

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO





200

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0000084

